

# Esperanto U S

Bi-monthly bulletin published by the Esperanto League for North America ★ 2005/2, 3, 4  
Dumonata bulteno eldonata de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko ★ 2005/2, 3, 4

## En la Numero

- ★ Kio Novas en la CO? . . . 3-4
- ★ Konatiĝu kun la Novaj Estraranoj de ELNA! . . . . . 5-13
- ★ Esperanto USA Havas Novan Redaktoron . . . . . 14
- ★ Impresoj pri la Aŭstina ELNA-Kongreso . . . . . 15-17
- ★ 90-a UK: per la Okuloj de Usonaj Partoprenantoj . . 18-20
- ★ Kiel Progresas Pasporto al la Tuta Mondo. . . . . 21
- ★ Kie Estas Junaj Usonaj Esperantistinoj? . . . . . 22-26
- ★ Esperanto – por Ĉiuj! . . . 27
- ★ Kiel Organizi Landan Klongreson . . . . . 28-29
- ★ Projekto Gutenberg. . . . . 30
- ★ Recenze . . . . . 31-32
- ★ Novaj libroj . . . . . 33-35
- ★ Vojaĝu kun Esperanto . . . 36

## “Austin is frenez about Esperanto!”

### *Impresoj pri mia unua ELNA-kongreso*

“Se vi ŝatis mian servon, mia nomo estas Thomas Clinton, se ne – mi nomiĝas Fred”, – diris la unua ŝoforo de la *Greyhound*-buso kiu veturigis nin de Atlanto al Aŭstino. Mi sincere ĝuas usonan humursenton, ŝercemon kaj (almenaŭ en la Sudo) emon babili kun nekonatoj. En la vica haltejo iu viro demandis al mi de kiu urbo mi estas. “El Kievo.” – “Kievo?” – la viro ŝajnis iom surprizita. – “Jes, Kievo”. “Mia nevino loĝas en Odeso, kaj vi iom similas al ŝi”. “Odeso? Ukrainio?” – estis mia vico surpriziĝi. “Ne, Odeso, Teksaso”... Ŝajne en Teksaso oni povas trovi absolute ĉion, pensis mi. Kaj ŝajne estas tiel! La sola afero kiun ni ne trovis estas dolĉa glaciteo: malsimile al georgianoj, kiuj preferas dolĉan glaciteon, ŝajne teksasanoj trinkas nedolĉan glaciteon. Sed – mi deflankiĝis!

*(daŭrigo sur p. 15)*



FOTO: SHANE SHERMAN

Esperanto League for North America  
PO Box 1129, El Cerrito CA 94530  
USA/USONO

☎ 510/653-0998; 2510/653-1468

✉ elna@esperanto-usa.org

President/Prezidanto: Philip G. Dorcas  
Vice President/Vicprezidanto: Steven D. Brewer  
Secretary/Sekretario: Anna Bennett  
Treasurer/Kasisto: William B. Harris  
Other Board Members/Aliaj estraranoj:  
Thomas Alexander, Joel Amis, D. Gary Grady,  
Anjo Harlow, Lusi Harmon, Jerry Johnson,  
Orlando E. Raola, Robert L. Read, Julie Spickler

Director, Central Office/Direktoro de la  
Centra Oficejo: Don Harlow

### Esperanto USA

Bi-monthly bulletin published by the  
Esperanto League for North America  
Dumonata bulteno publikigata de la  
Esperanto-Ligo por Norda Ameriko  
Vol. 41, No. 2-3

ISSN 1056-0297

Editor/Redaktoro: Joel Amis

Assisting editor, layout/Vicredaktoro,  
kompostado: Ĵenja Amis

✉ yevgeniya\_amis@yahoo.com

Materials for **Esperanto USA** should be  
sent to/Materialojn por **Esperanto USA**  
oni sendu al:

### Esperanto USA

16800 Phillips Rd., Alpharetta, GA 30004  
USA/ USONO

or by e-mail/aŭ retpoŝte al:

joelamis@yahoo.com

The opinions expressed in this bulletin  
are those of the authors, and don't neces-  
sarily represent the point of view of  
ELNA or its bulletin/La opinioj esprimi-  
taj en tiu ĉi bulteno apartenas al la  
aŭtoroj, kaj ne nepre prezentas la vid-  
punkton de ELNA aŭ ties bulteno.

Reprinting materials from this bulletin is  
permitted, provided that due credit is  
given, and a copy of the reprinted mate-  
rial is sent to ELNA/Estas permesate  
reaperigi materialojn el tiu ĉi bulteno,  
kondiĉe ke oni ĝuste indiku la fonton kaj  
ke oni sendu ekzempleron de la repub-  
likigita materialo al ELNA.

Deadline for issue 2005/5-6 Limdato por  
numero 2005/5-6: **2005.12.01**

## Saluton karaj gesamideanoj!

*Lastatempe certe mankis al vi nia  
malnova amiko **Esperanto USA**...  
kaj nun eble eĉ iom surprizis vin re-  
vidi ĝin – kun nova aspekto! Vi  
ankaŭ rimarkas ke la redakcio  
ŝanĝiĝis. Efektive, antaŭa redaktoro  
Don Harlow transprenis la direk-  
torecon de la Centra Oficejo de  
ELNA, kaj mi transprenis la redaktadon de **Esperanto USA** (kvankam mi  
estis elektita fare de la Estraro al la redaktoreco dum la ELNA-kongreso  
en Aŭstino, mi tamen ne povis plene transpreni la redaktadon ĝis la  
komenco de oktobro, kiam mi ricevis ĉiujn redakciajn ilojn kaj materi-  
alojn). Ni tamen faros nian plejblon por rekapti la aperritmon (la unua  
paŝo tiudirekten, kiel vi jam rimarkis, estas ĉi tiu **triobla** numero – la  
sekva numero [2005: 5-6] estos duobla).*

*Sed, kompreneble, estas limoj al la povoj de redaktoro – redaktoro evi-  
dente ne povas mem verki ĉiujn tekstojn, do li/ŝi dependas de la **kon-  
tribuoj de membroj**. Nur vi, la membroj, povas fine decidi la enhavon de  
nia revuo! Ni senpacience atendas viajn artikolojn, leterojn kaj al-  
ispecajn kontribuojn (ĉu en Esperanto, ĉu en la angla)!*

*Agrablan legadon!*

Joel

## Hello dear samideanoj (fellow Esperantists)!

*Lately you've surely missed our dear old friend **Esperanto USA**... and  
now you're maybe a little surprised to see it again – with a new look!  
You've also noticed that the editorial staff has changed. Actually, former  
editor Don Harlow took over the directorship of the ELNA Central  
Office, and I took over the editing of **Esperanto USA** (although I was  
elected by the Board to the editorship during the ELNA convention in  
Austin, I was unable to fully take over editing until the beginning of  
October, when I received all the editing tools and materials). We will,  
however, do our best to catch up (our first step in that direction, as you've  
already noticed, is this **triple** issue – the next issue [2005:5-6] will be  
double).*

*But, of course, there are limits to the powers of an editor – evidently, an  
editor cannot write all of the articles himself, so he/she is dependant  
upon the **contributions of members**. Only you, the members, can, in the  
end, determine the contents of our newsletter! We can't wait to receive  
your articles, letters and other contributions (whether in Esperanto or in  
English)!*

*Pleasant reading!*

Joel



# What's New in the Central Office?

There have been some changes made here. After more than five years as Director of the Central Office (CO), Joel Brozovsky recently decided to return to his original home in Spokane, Washington, and take up a new career which, as I understand it, will involve writing full-time. Writing about Esperanto does not pay very many bills, but I certainly hope – and I expect that everyone in ELNA hopes, as well – that Joel will find at least some time to write about Esperanto; he is, as I've had occasion to observe over the past few years, as knowledgeable and competent a spokesperson for Esperanto as one can find in the United States.

At the ELNA Congress in Austin, the *Estraro* chose me to take over in the Central Office when Joel left. I've had some experience here – I was Director from 1979 through 1983, served in the second slot from the beginning of 2002 through the middle of 2003, and have been working here on a consulting basis since the end of 2003. I hope that I can maintain the high standards for which the Central Office has become known in recent years. I've made a few minor changes, and will discuss them when they become relevant in the article that follows.

First: CO hours. The office will generally be open from 7:30 A.M. to 4:00 P.M., Pacific time. The earlier starting time is largely a function of (a) heavy traffic on the way to work at later hours, and (b) the paucity of parking spaces in Emeryville; if I arrive here at 7:40, the building parking lot (which is now marked "public parking") is generally full-up. If you need to contact the CO, those are the hours in which to do it. We'll occasionally be open on weekends as well, depending on what we're doing and how much of it there is to do, but that's not something to be counted on.

When I worked here before as Director, I figured out that the Central Office has three main tasks:

- Serve the members;
- Handle the book service;
- Reply to information requests.

As far as I can tell, that has changed very little, though the emphases have

changed somewhat (the book service seems to be somewhat more important; information requests have dropped off, though they've been increasing again over the past few months) and the ubiquitous computer now plays a significant role in our work, so much so that I spend most of my time not at the Director's desk but at the computer table.

Here's an overview of a more-or-less typical day:

## Get those books out the door!

I start work for ELNA before I ever get to Emeryville; halfway from my house to work, I have to swing off the freeway onto surface streets to visit our post office box in El Cerrito and pick up any mail that may have arrived. This is not an onerous task and adds perhaps five minutes to the total trip.

(Why our PO box is in El Cerrito, six miles from the Central Office, and not in Emeryville, where the office itself is located, is an interesting story, but one primarily of historical rather than topical interest. It has been maintained there over the years primarily because it's been advertised in books such as *Teach Yourself Esperanto*, and requests for information will typically go there. This was perhaps more important 20 years ago when almost all our information requests arrived by ordinary mail; today we receive one or two such requests a month, at most, at our PO box – most information requests now come over the internet. Perhaps it's time to start thinking about moving the PO box to the Emeryville post office, which is only about four blocks from the CO. This won't affect me much, one way or the other, but the next Director may have transportation problems.)

Once in the office, I switch on lights (as required) and turn on all three of our computers – a Windows 2000 machine that I use for most of my work, a Macintosh for graphical work, and a legacy Windows 98 machine that does very little these days. First thing to do is to grab any orders sent in over the internet, as well as checking the paper mail for book orders. Before doing anything else,

I process each book order, pack it and ship it. The purpose is to make sure that every order goes out the same day that it is received. You can check on how well this works, if you provide your e-mail address with your order; the office now sends an e-mail confirmation that your order has been sent as soon as we have it packed and prepared it for the postman. (Note: if you pay for special expediting, and we select UPS as our shipper of choice for your order, I'll personally be delivering your package to UPS that afternoon on my way home – there's a UPS center about a mile from my house.)

Incidentally, our book service has many offerings, some of which may be of particular interest to you personally. They range from sundries (patches to sew onto the coat you wear while hiking, pens that advertise Esperanto, Esperanto flags, etc.) through textbooks, dictionaries and audio-visual learning aids such as *Esperanto: Pasporto al la Tuta Mondo* (now on DVD) and the CD sets for *Jen Nia Mondo*, to reading material, some of which may already be familiar to you (e.g. Shakespeare's *Henry V* and Hemingway's *The Old Man and the Sea* and *The Snows of Kilimanjaro* in Esperanto), some of which will probably not be (e.g. Hašek's *The Good Soldier Shveik* as *Svejk*, the Chinese three-volume classic *Water Margin Book* as *Āe akvorando*). If you want to take a look at what's available at ELNA, visit our on-line storefront by going to our website (<<http://www.esperanto-usa.org/>> and clicking on "Books & Other Materials") and selecting an interesting-looking category to inspect. There's now a special section for "New Arrivals".

Right now, I'm working on a new version of our book service catalog. I hope to send it to the printer early in October.

## Memberships and Subscriptions

There's not a lot to do in this category right now; memberships and subscriptions are coming in few and far between, as a result of the fact that both categories function on a calendar-year basis. Never fear — sometime in November we'll start being inundated.

When I receive a membership (and/or a subscription) there are several things to be done. I receive payment and prepare a receipt (called, conveniently, an "invoice") which will be sent to the member or subscriber. If the person is paying for a membership, and has indicated a willingness to join the on-line mailing list `elna-anoncoj@yahoogroups.com`, I send him an invitation to join that list. Then I enter his membership and/or subscription into our database.

Since our database is what we use to produce lists for sending the newsletter and other mailings, we don't really have to do anything else with membership payments. We do, of course, send out a membership card and, depending on the time of year, other materials. Early in the period, the turnaround on this will be a day or so. Late in the period, it may be a couple of weeks. (The reason is to conserve the relatively expensive stock on which the cards are printed; during the membership renewal period in November, December and January we receive enough memberships to fill up an entire sheet of membership cards in a day, sometimes half a day; late in the period, it may take a month to fill up such a sheet.)

If the payment was for a membership in UEA or for a subscription to one of the magazines for which we serve as agent, we have to report that person's membership or subscription to UEA or the publisher, respectively. We do this in special reports which are sent every week or so (early in the year) or every month or so (late in the year, when we have very few names to report). If you subscribe early in the period to, let us say, *Monato*, you can expect that *Monato* will know of your subscription within a couple of weeks; but if you subscribe in July or August, it may take us a little longer to let them know. It's best to subscribe early.

### "I want to know about Esperanto"

A long time ago, most of our information requests came on paper, in the mail. Today they mainly come over the internet. Our 800 number is a secondary source.

Traditionally, we have replied to such requests by sending a small packet of information (always including a copy of the first lesson of the free ten-lesson postal

course) to the requestor. We continue to do this. Follow-up has not always been the best it could be; hopefully, this is going to change.

From time to time, ELNA has tried to make a habit of collecting lists of people from a particular area who, over the previous year or so, asked about Esperanto, and sending those lists to the appropriate local group. At best, this system seemed to function by fits and starts. Two fundamental problems with the system: (1) it was never thoroughly embedded in the office culture and so worked to some degree only when the Director remembered it; (2) even when it was functioning, far too often the names sent were long out of date. "Strike while the iron is hot" is very, very good advice when it comes to information requestors.

Today, as I process such information requests and enter them into our database, I'm sending an e-mail message containing the name, address and, where available, e-mail address of the requestor to the local Esperanto group or contact person. How well this will work depends to a great extent on whether the local Esperanto group or contact person has a program in place for contacting these people. In many parts of the country, such programs are sorely lacking. If your group, or you as an individual (in the absence of such a group), would be willing to receive such names and addresses, please let the Central Office know. I'll give our phone number and e-mail address below.

At Austin the *Estraro* authorized publication of the *ELNA Update* again. This is another way of following up on information requestors. The *Update*, as it will appear during the coming year (probably four times), will not be as ambitious as its predecessor; I anticipate that it will be a single-sheet publication (two pages), containing only short news-notes about Esperanto and will not do double duty as part of *Esperanto USA* as it did for a while before; it is, after all, aimed at people who are unfamiliar with the Esperanto movement, not at members of ELNA.

One problem with information requests is that, today, there are so few of them. Over the last three months they've been arriving at the rate of 500 per year, which is lower than we'd like to see them. After

all, people aren't going to learn Esperanto (or join ELNA) unless they know something about Esperanto (and that ELNA exists). There are ways to increase the number of people asking for such information. One way that seems to work fairly well is the addition of a "mailto:elna@esperanto-usa.org" link to your most popular web page, or to your local group's web page. (What? You say your local group doesn't *have* an up-to-date web page, or even a web page at all? Maybe it's time for you to look into this!)

### Getting in touch

I've rambled on long enough, especially given that I am supposed to be working on the new book catalog. So let me end by giving you two things you should always remember about the Central Office:

**(510) 653-0998**

**elna@esperanto-usa.org**

**ELNA, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530**

You guessed it! These are our telephone number, e-mail address and postal service address, respectively. If you want to tell us something – especially that you or your group want to do some work for Esperanto – these are how to do it.

Until the next issue ...

Don Harlow

## Tutkalifornia Esperanto-Konferenco 2006

VENU AL DAVISO! Faru markon sur via kalendaro! La semajnfina TKEK 2006 (Tutkalifornia Esperanto-Konferenco) okazos en Davis, CA la 24-26-an de marto 2006 ĉe la Hallmark Inn. Se vi havas sugeston pri iu dezirata programero, aŭ se vi volas prezenti iun programeron, informu nin jene: Henry Studer, 908 Villanova Dr., Davis, CA 95616; tele: 530-753-4906; aŭ retpoŝte: `hestuder@ucdavis.edu`.


*Intervjuo kun Filipino Dorcas, Prezidanto de ELNA*

**“Rigardu la liston de lokaj grupoj je la fino de la jaro 2007. Ĝi enhavos pli ol 100 kontaktpunktojn!”**

*- Unue – gratulojn pri via elektiĝo kiel prezidanto! En via sinprezento vi listigis la gravajn celojn al kiuj vi strebos: plibonigi lokajn grupojn, instrui pli ofte al pli grandaj aŭdantaroj, instigi al pli forta internacia amikeco, kunlabori kun aliaj organizoj kaj ĝenerale plifortigi la Movadon en Usono kaj en la mondo. Tiuj estas ja bonegaj kaj tre indaj celoj! Ĉu vi povus rakonti pli multe pri tiuj ĉi – kaj eble aliaj celoj al kiuj vi strebos dum la oficperiodo kiel prezidanto de ELNA? Kiel eblos atingi ilin?*

*- Dankon pro la gratuloj. Jen la celoj por mia (unua) deĵoro kiel prezidanto de ELNA.*

*Unue, mi konfesas ke ĉi tiuj celoj estas mia plano, kaj aliaj estraranoj kaj aliaj*



Filipo studas mapon de Usono por trovi la plej grandajn urbojn kie troviĝas membroj de ELNA sed kie ankoraŭ ne ekzistas lokaj grupoj

## “Ni havos pli multajn plenkreskulojn, pli multajn junulojn, kaj pli multajn infanojn...”

membroj havas eble pli altajn aŭ pli malaltajn aŭ eĉ tre malsimilajn celojn. Sed ĉi tiuj celoj, miaopinie, frapas ĉe la koro de la usona movado. Tial mi metas ilin antaŭ ni nun, por vidi, por konsideri, por pritrakti, por plenumi. Ni devas havi celojn, kaj jen la miaj.

La celoj kiujn mi donis por esti prezidanto estas ne nur celoj por mi, sed por la tuta movado en Usono. Kiam mi menciis “pli internacia movado”, aperis en mia menso lokaj grupoj kiuj havas internaciajn projektojn. Eble ili havas amikan kontakton kun grupo en alia lando. Eble ili havas internaciajn programojn en la kunvenoj. Eble ili raportas pri eksterlandaj vojaĝoj. Sed tio estas la celo de Esperanto, ĉu ne? Ni havas lingvon kiu estas ponto al aliaj landoj, aliaj kulturoj. Tio estas ne nur celo por mi, sed mia celo por multaj lokaj grupoj en Usono.

Mi listigas nun la plej gravajn celojn el mia vizio. La unuaj du celoj estas mezureblaj. Memoru la celojn.

1. **100 lokaj grupoj** en pli ol 40 ŝtatoj. Kiel ni mezuros tion? Tion ni vidos sur la paĝo por lokaj grupoj en la retpaĝaro de

ELNA <<http://www.esperanto-usa.org/local.html>>.

Kial tio gravas? Kiam novulo ekinteresiĝas pri Esperanto, ni deziras ke tiu homo povu kontakti alian esperantiston en la sama urbo. Tio ofte okazas per la interreta listo de lokaj grupoj. Se en tiu urbo ekzistus loka grupo kiu ne aperas en la listo, eble tiu persono perdus intereson, kaj tiel ni perdus komencanton. Eble tiu persono skribus aŭ telefonus al la Centra Oficejo por trovi lokan esperantiston. Tiuokaze, Don Harlow devus doni la peton al estrarano aŭ konato en tiu regiono. Tio estus malŝparo de tempo. Ni kompreneble uzus la tempon kaj farus la kontakton, sed la vojo estus pli glata per pli ampleksa listo en la interreto.

Kiel tio okazos? **Se via urbo ne estas en la listo, se vi havas lokan grupon kiu ne aperas en la listo, aŭ se vi estas la sola esperantisto en via urbo kaj konsentas esti kontaktpersono por via urbo, nepre informu aŭ min aŭ la Centran Oficejon!** Ni kun ĝojo aldonos vian nomon aŭ vian grupon al la listo. Tio estas ankaŭ mia tasko – trovi novajn

grupojn kaj personojn kiuj konsentos esti reprezentantoj. Tio multe helpos la Movadon.

Ĉu via urbo estas en tiu retpaĝo? Jes? Ne?

Rigardu la liston de lokaj grupoj je la fino de la jaro 2007. Ĝi enhavos pli ol 100 kontaktpunktojn!

2. Altigi membrokvanton en ELNA al la nombro ĉ. **1500 membroj**. Ĉu ni povas fari tion? Certe jes, se ni deziras kaj kunlaboros. Se ni faros tion kion ni povas, ni sukcesos. Tiu kvanto estas ligita al la aliaj celoj. Se ni sukcesos en la aliaj celoj, ni havos 1500 membrojn en la jaro 2007. Ĉu vi kredas tion? Eble jes, eble ne. Mi konas komencantojn kiuj ja kredas ke ni atingos tiun kvanton. Ili havas vizion pri la estonteco de ELNA, kaj tio estas bona bildo. Sed mi konas ankaŭ longtempajn membrojn kiuj dubas pri la ebleco atingi tian altnivelan celon. Havu la vizion kaj memoru la nombron. Laŭ mi, tio estas malgranda nombro kompare al nia kapablo.

Pri tiu kvanto ekzistas diversaj demandoj. Kiel ni scias kiom da membroj ni havos? Kiajn membrojn ni havos?

Individuajn? Familiajn? La direktoro de la Centra Oficejo, Don Harlow, kiu pritraktas la membriĝojn komputile, raportos. (Dankon por via laboro, Don.) Laŭ la membraj specoj, ĉu individuaj, ĉu familiaj, ĉu dumvivaj ktp., ni kalkulos kiel eble plej precize la kvanton de homoj kiuj estas membroj. Ni trovos ke fine de 2007 ni havos 1500 membrojn. Ĉu mi nun aŭdas vian reagon al tiu deklaro? Skribu al mi <filipo@grupoj.org>, diskutu en via klubo aŭ alimaniere komuniku viajn pensojn, ideojn, planojn.

Kial tiu kvanto (1500) gravas? Tio signifas ke ni denove eltenos la koston de du dungitoj en la Centra Oficejo. Ĉu vi scias la kvanton de laboro kiu okazas en la CO? Ni bezonas du dungitojn tie nun, kaj ni nun laboras por atingi la membraran nivelon kiu pagos por tio. Kun du plentempaj laborantoj ni pli bone servos la membrojn, laboros en la libroservo, respondos al la publiko, pritraktos novajn membriĝojn kaj faros multajn aliajn taskojn kiuj atendas ĉe niaj piedoj. Ĝis kiam tio okazos, Don Harlow laboras multe kaj plejparte sole.

Eble vi pensas ke estas problemo havi nur unu laboranton en la Centra Oficejo. Eble vi pensas ke vi ne ĝenu tiun kiu laboras tiel multe per viaj petoj. Tamen, se vi havas problemon pri mendo aŭ alian plendon pri io en la landa movado, bv. tujtuj kontakti aŭ la Centran Oficejon aŭ estraranon. Kompreneble, se vi havas intereseon pri libro aŭ alia varo de la libroservo, NEPRE MENDU ĜIN! Tio ankaŭ helpas nin en nia celo subteni la Movadon, kaj vi havos la librojn kiujn vi deziras.

3. **Pli aktivaj lokaj grupoj.** Lokaj grupoj estos pli aktivaj, laŭ la celoj de la membroj. La kunvenoj havos internacian aspekton. Pli multaj grupoj havos kursojn. Ni prizorgos la novajn membrojn pli bone. Ni uzos la lingvon pli ofte, sed ne iel fortimigos la novulojn per ĝi. Ni planos kalendaron de agadoj. Ni anoncos regionajn kaj landajn eventojn. Ni diskutos literaturon kaj lingvon pli bone kaj bele. Ni aŭskultos diversajn ideojn afable. Ni kunlaboros. Ni pli bone kaj pli forte komuniĝos kun la aliaj membroj de la loka grupo, kun aliaj grupoj, kun estraranoj, kun internaciaj amikoj. Ni pli bone konos la varojn en la Centra Oficejo. Ni havos pli multajn plenkreskulojn, pli multajn gejunulojn kaj pli multajn infanojn. Ni

havos membrojn sanajn kaj malsanajn. Ni havos pli multajn handikapulojn. Ni kontribuos al la bulteno kiun vi nun legas. Ni kuraĝigos novajn membrojn, helpos ilin, trovos iliajn celojn. Ni pli ofte partoprenos kursojn, kunvenojn kaj kongresojn – lokajn, regionajn, landajn, internaciajn. Ni servos la komunumon pli ofte. Ni petos Esperantajn librojn en niaj librovendejoj kaj bibliotekoj. Ni kreos rilatojn kun la fremdlingvaj fakoj en lernejoj kaj universitatoj. Ni informos la raportistojn de la lokaj kaj naciaj gazetoj kaj ĵurnaloj pri niaj eventoj. Ni raportos pri la okazaĵoj al la Esperantaj komunikiloj. Ni kunvenos, ni planos, ni legos, ni lernos, ni informos, ni ridos, ni laboros, ni kantos, ni studos, ni ludos, ni ĝuos, ni reklamos, ni varbos, ni instruos, ni esploros, ni ekskursos... Ho ve, kia listo! (Rimarku. “Ni” signifas “Vi” kaj ĉiu esperantisto en Usono) Kio plej gravas? Ni pli forte **informos la publikon.**

Mi eniris la Movadon en 1998 kaj ne ĉeestis la grandan Universalan Kongreson en Varsovio en la centjara festo en 1987. Sed mi legis prelegon el tiu UK, kaj nun ripetas kelkajn gravajn vortojn de ĝi. Tie prelegis D-ro Humphrey Tonkin, iama prezidanto de UEA. Legu tiujn ĉi vortojn kaj pripensu ilin.

“Venas nun la periodo de disvastigo. Ni kreis murojn ĉirkaŭ ni: sekuraj en niaj kluboj kaj kongresoj, ni ne bonvenigas adekvate la novulojn, ni ne sufiĉe pledas por nia lingvo, ni ne alfrontas la publikon, ni ne agas sufiĉe discipline kaj celkonscie.

Dirante tion, mi neniun akuzas, mi neniun kritikas. Mi simple faras tiun ĉi konstaton: ke la lingvo ekzistas unue por disvastigi, due por ĝui.” Se vi volas legi la tutan prelegon, vidu la libron de Boris Kolker *Vojaĝo en Esperanto-Lando.*

**“Ni staras sur la ŝultroj de gigantoj”**

- *Kiel vi taksas la nunan staton de la organizo – kiuj estas fortaj kaj malfortaj flankoj de ĝi?*


- La stato de la organizo estas sufiĉe forta por atingi la celojn. Nia pli malforta flanko estas nia komforto. Relegu la vortojn de D-ro Tonkin el la jaro 1987. Tiuj vortoj ankoraŭ taŭgas ne nur por la Movado monda, sed ankaŭ (kaj eĉ pli taŭge) por la lokaj grupoj.

Pri fortaj flankoj mi mencias tri benojn.

1. Ni dankas la **longtempajn membrojn** pro la grandaj taskoj kiujn ili faris kaj faras. Ni staras sur la ŝultroj de gigantoj. Ni jam ĝuas la laboron de tiuj kiuj jam laboris arde, ĝuste, longe kaj kunlabore por la Movado. Tiu laboro rezultis rekte de la verdaj koroj de tiuj kiuj konis la internan ideon kaj batalis kontraŭ la bariloj de jarmiloj. Sen tiu laboro, kie ni estus?

2. Ni dankas la **novajn membrojn**, kun novaj ideoj, nova energio, nova sango kaj nova vivo.

3. Ni havas la plej bonan parton de la Movado, kiu estas **la lingvo mem.** Esperanto estas la bazo de la Movado, la fundamento de niaj agadoj. Tiu genia kreaĵo de D-ro Zamenhof donas al ni la es-



ELNA-prezidanto Filipo Dorcas (maldekstre) kun sia antaŭulo, Aleksander Shlafer, kaj eksdirektoro de la CO, Joel Brozovsky

peron por la estonteco. Mi kredas ne nur je la bono de homoj, sed ankaŭ je la bono de la lingvo mem. Ĝi estas la konkretaĵo, kiun ni ĉiam havos kaj uzos.

**“Ni bone laboras je la nacia nivelo, sed la plej grava afero estas labori en la lokaj grupoj”**

*- Kion ni ĉiuj povas fari por forigi malfortajn flankojn kaj pligrandigi kaj plifortigi la malfortajn – je la nivelo de la estraro, kaj ankaŭ je la nivelo de lokaj grupoj kaj unuopaj membroj? Alivorte, kiel ni ĉiuj povas helpi al vi labori por la bono de ELNA?*

- La ĉefa laboro estas plibonigi kaj plimultigi la lokajn grupojn. En ĉiu loka grupo ni devas plenumi la celojn de la membroj. Miaopinie, tio estas la ĉefa tasko de ĉiu loka grupo. Eble vi opinias ke loka grupo devas fari ĉi tion aŭ jenon, sed kio estas la celo de via grupo? Kial vi kunvenos? Kial vi estas grupo? Mi ne donos al vi la respondon. Tiu respondo estas tasko por via grupo. Vi devas diskuti viajn celojn kaj plani viajn proprajn agadojn laŭ via propra decido.

Se iu grupo faras nenion, tio estas nia malforta flanko. Se vi diskutos viajn celojn, planos viajn eventojn, plenumos viajn taskojn, tio estos nia forta flanko. Pro tio ni dankos vin. Pro tio ni havos pli fortan movadon en Usono kaj en la mondo.

Kiel mi helpos vin? Kiel mi povos? Mi laboros por krei pli bonan komunikadon inter lokaj grupoj kaj informos vin pri la agadoj kiujn vi povas fari. Via laboro estas **via** laboro, kiun vi akceptas kaj faras. Tio ne estas mia laboro, mia plano por vi. Vi kreu vian propran planon por via grupo. Diskutu planojn en viaj kunsidoj. Planu la kalendaron. Informu min kaj Joel Amis <joelamis@yahoo.com>, la redaktoron de ĉi tiu bulteno, pri tio kion vi planos kaj faros.

Eble vi opinias ke la diversaj komitatoj estas pli gravaj ol via laboro. Certe, ni havas komitatojn en ELNA. Ni havas estrojn por diversaj projektoj, multaj el kiuj progresas bone. Ni bone laboras je la nacia nivelo, sed la plej grava afero estas labori en la lokaj grupoj, kie ni pli ofte informas la publikon, pli ofte akiras novajn membrojn.

**“Estas la tasko por ĉiu grupo decidi kiel ili antaŭeniru”**

*- Grava problemo de la E-movado en Ukrainio estas “forfalo” de membroj. Homoj jam lernintaj E-on ofte foriras el la E-movado, aŭ simple ne eniras ĝin. Ekzemple, en unu liceo en Kievo, Esperanto estas instruata kiel ordinara studobjekto, kaj malgraŭ ke ĉiujare multaj infanoj lernas ĝin, mi konas nur kelkajn kiuj restas en Esperantujo. Ĉu ankaŭ en Usono estas la sama problemo? Se jes, kiel ni povus teni la malnovajn membrojn, kio, laŭ mi, estas eĉ pli grava afero ol varbi novajn membrojn?*

- De tempo al tempo ELNA vidis “forfalon” de membroj. Sed nun ni vidas kreskadon. Se ni ne vidos kreskadon en ĉi tiu jaro, mi donas la kialon. Malgraŭ niaj klopodoj, ni batalas kontraŭ diversaj katastrofoj. Mi vidas en mia propra ŝtato, Teksaso, rezultojn de uraganoj kaj fajroj. Nur unu straton for de mia hejmo estas apartamentaro en kiu loĝas cent suferintoj de la uraganoj Katrina kaj Rita. Mi helpas ilin rekte per agadoj en mia preĝejo. En tiu sama apartamentaro loĝis membro de mia klaso en la preĝejo. Tiu familio suferis pro granda fajro kiu okazis antaŭ kelkaj monatoj. Ankaŭ multaj aliaj esperantistoj en aliaj lokoj helpas tiujn kiuj suferis pro katastrofoj. Tiaj eventoj postulas multon de la membroj kaj iliaj monujoj kaj povas kaŭzi forfalon de membroj en tiu ĉi jaro. Kaj ekzistas aliaj aferoj (ekz., aliaj organizaĵoj kaj la prezo de benzino) kiuj vokas al niaj verdaj koroj por atento alikadre.

Sed malgraŭ ĉio, ni vidos kreskadon. Jam aperas novaĵo ke eble en ĉi tiu jaro ni vidos revenon al kreskado.

Pri nia kreskado mi donas demandon al vi. Kion vi opinias pri nia estonteco? Ĉu vi tenas la esperon? Kial? (Kial ne?) Kiun rolon, kian rolon ludas **espero** en nia Movado? Kiel ni aldonos al la espero? Kiel ni konstruos la estontecon kaj plifortigos tiun esperon?

Se paroli pri tiuj kiuj foriras el la Movado – multfoje tio okazas ĉar ili ne trovas tion kion ili serĉas. Kiam oni unue trovas Esperanton, oni trovas bonon kaj esperon. Oni atendas agadojn kaj kunlaboradon. Novuloj ofte deziras plibonigi la mondon. Eble oni deziras havi taskojn por plenumi la celojn. Eble oni deziras studi en klaso. Eble oni deziras vojaĝi tra la mondo, ĝuante la lingvon kaj la diversajn kulturojn de la mondo. La demando leviĝas, por kio

ili ekhavis la intereson? Ĉiu persono unikas. La vizitanto al via grupo havas sian propran kialon por viziti. Kio tio estas? Vi devas demandi. Vi devas diskuti en via grupo la prizorgadon de vizitantoj. Kiel vi bonvenigas ilin? Kiel vi invitas ilin al la venontaj kunsidoj? Kion vi donas al ili? Kion ili deziras fari per Esperanto? Kio estas lia/ŝia ŝatokupo? Ĉu ili jam vizitis aliajn landojn? Kio estas ilia sperto? Ĉu ili jam konas aliajn lingvojn? Kiel ili uzas aliajn lingvojn? Kiel ili planas lerni Esperanton? Kiel vi povas helpi ilin pri aliaj celoj? Kion ili povas fari por la grupo? Kion la grupo povas fari por ili? Kion ili bezonas? Kiel ili trovis Esperanton? Kiajn projektojn, pri kiuj ili interesiĝas, la grupo planas? Ĉu ili havis rilatajn spertojn en aliaj grupoj? Ĉu ili konas la servojn de ELNA? Ĉu vi informas ilin pri regionaj kaj landaj eventoj? Kion ili pensas pri la metodoj instrui lingvojn?

Uzu vian propran sperton kaj pri novuloj kaj pri via grupo por pli bone pritrakti la vizitantojn. Pensu laŭ ilia vidpunkto. Donu al ili kialon por reveni. Donu al ĉiu membro kialon por resti en la Movado. Pripensu la celojn kaj planu la eventojn kiuj plenumos tiujn celojn. Tiel la membroj kaj vizitantoj trovos tion kion ili celas. Tiel ni ne spertos forfalon de membroj.

Ĉiu grupo malsimilas de aliaj grupoj. ELNA, kiel la landa organizaĵo, ne povas regi super lokaj grupoj, kvazaŭ ili ĉiuj estas la samaj. Estas la tasko por ĉiu grupo decidi kiel ili antaŭeniru. Ni bonvenigas viajn komentojn kaj raportojn.

**“Esperantistoj en Usono ne havas sufiĉajn voĉdonojn en landaj aferoj por regi la decidojn pri milito, ekonomio, aŭ politiko. Ni devas agi alimaniere”**

*- Vi jam partoprenis multajn kongresojn en aliaj landoj – eble vi povus kompari la staton de la Esperanto-movado en Usono kaj en aliaj landoj? Ekzemple, mi ofte komparas la E-movadon en Usono kaj en Ukrainio, kaj ofte konstatas ke oni alfrontas tute malsamajn problemojn. Ekzemple, en Ukrainio estas relative facile inviti al E-festivalo ĵurnalistojn kaj poste ricevi pozitivajn artikolojn kaj eĉ raportojn en la nacia televido (kio, verŝajne, tre malfacilas en Usono) aŭ organizi senpagan E-kurson, sed samtempe la landa asocio eĉ ne revas pri eldonado de libroj pro manko de mono. Kaj – estas*

*iom malegala kvanto de inoj kaj viroj: en la ukraina junularo inoj estas multe pli multaj, dum en Usono oni alfrontas malan problemon. Unuvorte – kiuj estas specifajoj de E-movado en Usono kompare al aliaj landoj?*

- La movado en Usono malsimilas la movadon en aliaj landoj multkiale. Unue, en Usono ni havas nian faman nacian lingvon. Multaj opinias ke la angla estas la “internacia lingvo”. Por multaj ĝi ja estas, ĉar ili vojaĝas nur kie la ŝoforoj komprenas ke ili volas iri al la granda hotelo en la ĉefurbo, nur kie la kelneroj en la plej fama restoracio komprenas ke ili mendas tason de kafeo, kaj nur kie la komizo de la plej granda hotelo komprenas ke ili bezonas ĉambron por tri tagoj. Aŭdinte pri la ideo de Esperanto, multaj usonanoj respondas ke ĉiuj en la mondo uzas la anglan, ĉar tio estas ilia sperto. Pro tiaj okazoj ni esperantistoj havas en Usono pli malfacilan taskon por allogi novulojn en la Movadon. Tamen, en Usono ni havas pli multajn okazojn ol en aliaj landoj por reklami niajn eventojn al la publiko. Ni havas ĝenerale pli da tempo, pli da mono, pli da manieroj por libere sekvi niajn revojn. Se ni ne sekvas nian vokon, tio kutime estas nia eraro. Se ni decidus fari tion, ni ĝenerale povas. Tio estas la “Usona Revo”. Ni sekvu tiun revon.

Due, Usono malsimilas aliajn landojn pro la graveco de nia Movado. Ĉar Usono estas tre forta multkadre, ni havas grandan respondecon al la mondo. Pro nia ekonomia kaj milita povo, ni devas agi saĝe. Esperantistoj en Usono ne havas sufiĉajn voĉdonojn en landaj aferoj por regi la decidojn pri milito, ekonomio aŭ politiko. Ni devas agi alimaniere. Se ni agos sufiĉe saĝe kaj forte, ni kaptos pli multe, pli ofte, pli forte la atenton de neesperantistoj en Usono. Ni havos la povon ankaŭ por helpi la Movadon mondscale per nia kreskado, per nia partopreno en internaciaj aferoj, per nia amikeco kun aliaj kulturoj, per nia kapablo konstrui pontojn al aliaj landoj kaj kulturoj. Ni povos kaj ni faros. Fakte, ni povas kaj faras.

Kion aparte ni povas fari? Ni kreskas per kvanto de membroj. Ni pli forte kunlaboras kun aliaj organizaĵoj, alilandaj, fakaj kaj internaciaj. Ni uzas nian spiriton kaj povon por krei novajn ligojn al amikoj en aliaj landoj. Ni ankaŭ subtenas la amikecon kiun ni nun ĝuas. Ĉefe, ni pli

forte kaj bone kunlaboras en lokaj grupoj kaj interkomunikas inter la lokaj grupoj per la interreto, per telefonado, per helikpoŝto kaj per tiu ĉi bulteno.

La plej simpla kaj plej grava celo estas la kvanto de membroj. Kvanto mem ne gravas – gravas la signifo sub tiu kvanto. Tio signifas ke ni faras bonan laboron, plenumas niajn celojn, lernas la lingvon, pritraktas la membriĝojn kaj informas la publikon.

Nia malfacilaĵo estas ke nia lando estas tiel granda ke eĉ kun kelkmil esperantistoj ni devas veturi por kunveni. Niaj membroj loĝas en ĉiu angulo de Usono, en multaj ŝtatoj, multaj urboj. Ni devas kreski kvante por ke ni povu kunveni pli facile. En multaj aliaj landoj pli multaj esperantistoj loĝas en malpli granda spaco. Tie ili pli facile kunvenas post malpli longa veturado.

En Usono ni feliĉas ke ni povas pritrakti kaj superi niajn obstaklojn. Ni feliĉas ke nia movado gravas, same kiel en aliaj landoj.

Kio mankas al ni? Diru.

**“Ju pli multe mi legas pri aliaj landoj kaj kulturoj, des pli forta estas mia sento pri nia graveco. Mi forte kredas ke ni konstruas pontojn trans bariloj”**

*- Kvankam vi estas en la ofico ankoraŭ tre mallongan tempon, tamen ĉu vi povus iom rakonti pri viaj taskoj kiel prezidanto? Kion tio signifas por vi persone – esti prezidanto de ELNA, kaj kiujn taskojn vi plenumas lige al via posteno? Ĉu la prezidantaj taskoj okupas multe de via tempo?*

- Esti prezidanto povus esti plentempa laboro, sed mi ja havas mian propran taglaboron. Mia taglaboro ĉe oficejo postulas 9 ĝis 11 horojn tage. Dum miaj liberaj horoj mi respondas multe al retroŝtoj. Mi devas pli bone plani mian propran horaron por atingi miajn celojn. Mi havas longan liston de taskoj, kiujn mi faros kiel eble plej bone. Mi kontaktis kelkajn grupojn, sed devas pli bone plani tion kaj raportiri la rezultojn al la Estraro.

Mi plibonigas mian uzadon de la lingvo per kurso sub la instruado de Boris Kolker, membro de la Akademio de Esperanto. Tiu perkoresponda kurso uzas lian libron *Vojaĝo en Esperanto-lando*. Mi partoprenas lokajn, regionajn kunvenojn kaj estrarajn diskutojn. Mi helpas pri la planado de la landa kongreso de ELNA por 2006. Kiam

mi povas, mi ĉeestas kurson ĉe NASK, la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto. Tion mi faris in 2001, 2003 kaj 2005.

Mi legas librojn el mia libraro. Kiel tio estas ligita al taskoj de la prezidanto? Mi enmetas min mem pli profunde en Esperantujon, en literaturon, kulturon, historion kiun la antaŭaj pioniroj spertis. Mi lernas tion kion ili faris – kio funkciis, kio ne, kiajn obstaklojn ili renkontis. Ju pli multe mi legas pri aliaj landoj kaj kulturoj, des pli forte estas mia sento pri nia graveco. Mi forte kredas ke ni konstruas la pontojn trans bariloj.

Tio estas mia persona misia deklaro, “antaŭenigi mondpacon per konstruado de pontoj inter landoj, kulturoj kaj klasoj”.

Mia tasko havas multajn flankojn. Mi vidas la laboron kiu okazas en ELNA. Mi aŭskultas raportojn, ideojn kaj planojn kiuj venas de multaj fontoj. Mi legas retmesaĝojn kiuj venas ne nur de Usono, sed ankaŭ de multaj landoj, de multaj estroj, multaj societoj, multaj fakoj.

Mia tempo por Esperanto nun pligrandiĝas, ĉar neesperantaj taskoj malpligrandiĝas. Mi serĉas kaj trovas helpon por mia taglaboro kie mi estas ĉefingenero por malgranda softvara kompanio.

Entute, mi klopodas uzi mian tempon saĝe, ĉar mi opinias ke mia tempo kiel prezidanto treege gravas. Pardonu min, se mi taksas mian tempon altvalora, sed mi opinias ke la tempo de ĉiu esperantisto en Usono gravas.

Mi laboras kiel eble plej arde por la plibonigo de la mondo, por pli klara interkompreno inter kulturoj de la mondo. Mi opinias ke mia tuta pasinteco helpis prepari min por la tasko de ELNA-prezidanto. Tamen, la tasko estas granda. Mi petas vian helpon en via loka grupo.

**“Mi vidis militon. Mi vidis ankaŭ pacon. Pacon mi preferas. Preferegas”**

*- En via sinprezento mi legis ke vi estis kapitano en la usona aerarmeo en 1969-1974 kaj flugigis la aviadilon C-130 “Hercules” tra pli ol 80 landoj, plejparte por savi homojn de tertremoj, inundoj, vulkanoj kaj aliaj katastrofoj. Sonas nekredible interese! Ĉu vi povus rakonti iom pli pri tio?*

- Mi estis navigisto en la usona aer-





FOTO: STEVE BREWER

Filipo en la rolo de metodista pastro el 1861

armeo en la aviadilo C-130. Tio ofte estis mirinda sperto. La pli malbona afero estis ke mi partoprenis en milito. Mi kompreneble deziras paroli pri la pli feliĉaj taskoj – pri la savado de homoj el grandaj katastrofoj. Tamen, la pli profunda vero estas ke en mia vivo mi vidis militon. Mi vidis ankaŭ pacon. Pacon mi preferas. Preferegas. Mi vidis militon tre proksime per miaj okuloj. Mi akiris 2000 horojn de flugsperto en diversaj flugoj, kelkaj pacaj, kelkaj ne. Mi akiris pli ol 600 horojn de *milita tempo* dum la milito en sudorienta Azio. Pri kelkaj aferoj mi tute ne fieras. Ŝajnas ke tio estis por mi alia vivo. Tial mi pli bone rakontu pri la servaj misioj.

En 1970 okazis granda tertremo en Peruo. Tie mi flugigis la aviadilon inter la montoj de Peruo kaj la flughaveno en Limo por subteni la laboron de la medicinaj laborantoj. Ni transportis medicinajn provizojn. Ni transportis homojn, vivantajn kaj ne, el la tertrema regiono al sendanĝera loko ĉe la flughaveno. Ni vidis lokojn kie vilaĝoj iam ekzistis, sed ne plu pro la tertremo. La Internacia Ruĝkruco kalkulis 300 mil mortintojn...

Mi ĝojas ke mi havis iom da bonaj spertoj en la aerarmeo por memori, sed ankaŭ estis nepacaj rememoroj. Mi uzas mian rememoron de tio por labori por paco, por interkompreno, eĉ por la simpla ideo pri internacia lingvo, lingvo de egaleco, lingvo kiu estas pli facile lernebla – nia vivanta lingvo Esperanto.

**“Ne per mono, sed per amikeco, laboro, sperto, saĝeco kaj pacienco”**

- *Alia interese momento en via prezento estis pri via laboro en Nikaragvo, por la helpmisio por malriĉuloj kiuj “vidis nek kuracistojn nek dentistojn”. Rakontu pli!*

- Mia eklezio havas kelkajn misiojn: unu estas medicina kaj dentista misio. Ni helpas malriĉulojn en aliaj landoj per medicinaj servoj. Teamoj iras al aliaj landoj en Centra Ameriko kaj Azio. Mi iris kun teamo al Nikaragvo. Mi pagis mian propran koston kaj aliĝis al 14-homa teamo. Ĝi inkluzivis tri dentistojn, du kuracistojn, tradukistojn, kelkajn flegistinojn, aliajn medicinajn helpantojn kaj min. Mi ne estas medicinisto nek tradukisto de la hispana lingvo. Mi scias preskaŭ nenion pri tia laboro. Mi veturigis la aŭtobuson kaj lavis la ilojn por la dentistoj.

Ni estis en Nikaragvo ok tagojn, kelkaj el kiuj estis por la veturado tien kaj reen. Mi veturigis la teamon de Managua al Matagalpa en la interno de Nikaragvo. Ni kreis klinikojn en kvar vilaĝoj dum kvar tagoj proksime al Matagalpa. En tiuj kvar tagoj ni donis servojn al pli ol 600 malriĉuloj kiuj treege multe bezonis nian helpon.

Ni ne predikis al ili, krom konsilado pri la graveco de dentobrosado.

Mi jam scias vian demandon. Ĉu mi uzis Esperanton tie? En la misia laboro mi ne havas la okazon uzi Esperanton, sed en Managua mi renkontis esperantiston, Eddy Antonio Silva Molina. Li estas studento pri fiziko. Ni pasigis posttagmezon en Managua babilante kaj promenante. Ni diskutis preskaŭ ĉion – religion, politikon, militon, pacon, amikecon, fizikon, muzikon, ekonomion ktp.

Tiu posttagmezo kun mia nova Esperanta amiko estis la lasta tago en Managua antaŭ ol ni revenis hejmen al Usono. Mi lernis multe tie, kiel ĉiam kiam mi estas en alia lando. Mi supozas ke la kutima usonano ne trovas multe da interesajoj en Nikaragvo, sed mi ĝuis multe. La kulturo, laŭ mi, estas mirinda – kiel la malriĉuloj venkas malfacilaĵojn en sia vivo ne per mono, sed per amikeco, laboro, sperto, saĝeco kaj pacienco. Kiel ĉiam kiam mi estas en alia lando mi ricevis pli ol mi donis.

En Nikaragvo ne estas multaj esperantistoj. Mi vidis la lingvan barilon inter la

kulturoj. Mi ne parolas la hispanan, kaj la malriĉuloj en la interna regiono de la lando ne parolas la anglan.

**“Mi ĝuis rolludi, sed ne deziris partopreni en “milito”. Mi decidis roli kiel pastro”**

- *Vi ankaŭ havas interesan kaj nekutiman hobion – reludado de historiaj eventoj. Tiuj kiuj partoprenis la kongreson en Aŭstino certe ne forgesos vin en la rolo de metodista pastro el la jaro 1861. Kiam (kaj kiel) okazis ke vi fariĝis “metodista pastro” el la jaro 1861?*

- Antaŭ nemultaj jaroj mi amikiĝis kun homoj kiuj rolas laŭ la jaro 1861. Mi decidis ke ankaŭ mi partoprenu, tial mi akiris manfaritajn vestaĵojn en la stilo de tiu jaro en Norda Teksaso. Mia unua sperto en tiu rolo estis kiel viro kiu estas en ies hejmo dum la kristnaska sezono en 1861. Mi tre multe ĝuis tiun sperton. Mi estis en tre malnova domo kun amikoj antaŭ kameno. Mi legis kandle de la libro *Kristnaska Karolo (A Christmas Carol)* de Charles Dickens. Mi legis el la unua eldono de tiu fama angla libro. Ni ankaŭ manĝis kaj babilis laŭ la modo de tiu jaro.

Tio estis neofta okazo. La pli ofta evento en tiu ŝatokupo estis rolludi la “militon inter la ŝtatoj”. Kion mi povis fari? Mi ĝuis rolludi, sed ne deziris partopreni en la milito kiu okazis en 1861-1865. Mi decidis roli kiel pastro. Mi rolis kiel viro kiu kutime estis vojaĝanta pastro, sed tiam estis pastro en medicina organizaĵo. Tiu grupo helpis la “vunditojn” el la “milito”, en kiu la plejparto de la aliaj partoprenis. La decido por fari tiun rolon estis facila. Mia avo estis vera vojaĝanta pastro, kaj mi sciis iom pri tiu laboro. Mi ankaŭ lernis multe pri la historio de Teksaso kaj Usono.

Tiu jaro estis malfacila jaro en la historio de Teksaso, sed ĝi ankaŭ estis la plej interesa. Ĝi rilatis al milito, sklaveco, libereco, egaleco, homaj rajtoj kaj multaj aliaj aferoj kiuj rekte aŭ nerekte rilatas al Esperanto. Tiu rolo ankaŭ donas al mi la rajton, per rolludo, esti pastoro sen granda religia studado en universitato.

Preparis Ĵenja Amis



*Intervjuo kun Steven Brewer,  
Vicprezidanto de ELNA*

*- Gratulojn pro via elekto! Ĉu vi povus rakonti pri viaj planoj kaj celoj kiel vicprezidanto? En via sinprezento vi listigis tri gravajn aferojn pri tio kiel ELNA povus kontribui al la bono de Esperanto en Usono ĝenerale kaj al la lokaj grupoj aparte: produkti reklamojn por informaj kampanjoj, agi kiel peranto por senimpostaj donacoj por lokaj kaj regionaj celoj kaj – plej grave – proponi al la membroj la ideojn pri tio kiel ili povas kontribui al la organizo. Ĉu vi povus rakonti pli detale pri tiuj (kaj eble ankaŭ aliaj viaj) celoj dum via oficperiodo? Kion necesas fari por atingi ilin? Kaj kiel ni, la membroj de ELNA, povas kontribui al la organizo?*

- Antaŭ jaroj, mi sendis mesaĝon al dissendolisto elna-membroj kaj demandis ĉu ni starigu tutlandan kampanjon por reklami Esperanton. Bedaŭrinde, mi rikoltis nur malgrandan respondon kaj malmultan entuziasmon. Oni aŭ ne interesiĝas aŭ ne pretas kredi ke io tia povus sukcesi. Do mi decidis ke mi simple agos, kaj se iu alia volas fari ion, mi pretos helpi. Ekzemple, por la Esperanto-Societo de Nov-Anglio ni nun presas kaj disdonas paĝtenilojn (Vidu: <<http://esne.net/bookmarks.html>>). Iu en Nov-Anglio kiu deziras paĝtenilojn povas peti centon, kaj iu kiu volas subteni la projekton povas donaci \$10 aŭ \$20. En mia urbo, ni lasas la paĝtenilojn en la biblioteko kie oni povas preni ilin. Kaj ni nun havas

## “Ĉiu unuopulo estas grupo kiu simple ĝis nun ne organiziĝis”

sufiĉe viglan grupon kiu kreskas kaj kreskas. Mia celo nun estas montri ke nur malgranda laboro loke povas produkti tre fruktodonajn rezultojn kiuj plibonigas la lokan Esperanto-movadon.

*- En via sinprezento vi donis apartan atenton al la lokaj grupoj, sed ankaŭ substrekis ke la landa organizaĵo devas esti pli ol ĝia sumo. Ĉu vi povus rakonti pli pri via vido de la stato kaj funkcio de ELNA? Kiel eblas plibonigi ĝin? Kio ĝenerale, laŭ vi, estas la fortaj kaj malfortaj flankoj de ELNA? Kion oni faru por plifortigi la malfortajn flankojn kaj fortigi la fortajn?*

- Estas multo kiun ELNA povas fari, sed devas esti ekvilibro inter ELNA, unuflanke, kaj ĝiaj membroj, aliflanke. ELNA ne povas devigi. La aktivuloj de ELNA povas konsili kaj gvidi, sed ELNA mem devas fari kion la membroj deziras. Se ili volas kreskigi la nombron da esperantistoj, ELNA povas helpi pri tio. Kaj, se ili preferas sidi hejme kaj spekti televidon, ELNA mem neniel povas deteni ilin. Mi proponas min kiel sukcesan modelon pri tio kiel malmulte da laboro pri reklamado kaj organizado povas produkti viglan lokan agadon. Se iuj aliaj volas havi viglan lokan grupon, ni povas montri kiel fari tion. Kaj, se sufiĉe volas, ni povus bone subteni tion per afiŝoj kaj reklamiloj. Sed la bezono devas ekzisti antaŭ ol ni kreu ilin.

*- Vi skribis ankaŭ ke la loka grupo subtenis vian intereson kaj donis la kialon studi kaj lerni ĉiusemajne, kaj, kiel mi komprenis, lokaj grupoj estas tre gravaj en via agado – kaj kiel la vicprezidanto de ELNA kaj kiel la prezidanto de la Esperanto-Societo de Nov-Anglio. Kiel ELNA povus helpi al la lokaj grupoj fariĝi pli fortaj, belaj kaj grandaj?*

- Tri aferoj: substreki la valoron de lokaj grupoj, diskonigi ke lokaj grupoj ekzistas, por ke ili estu facile troveblaj, kaj proponi modelojn de sukcesaj grupoj kiuj helpas ke oni starigu novajn lokajn grupojn. ELNA ne mem povas

krei lokajn grupojn, sed ĝi povas helpi ke lokaj grupoj estu sukcesaj.

Estas facile starigi lokan grupon. Oni decidu pri loko kaj tempo, publikigu tiun informon, kaj iru por horo ĉiusemajne al la loko por studi Esperanton — jen la strukturo de loka grupo.

Se neniu venas, oni uzu tiun tempon por desegni afiŝojn, esplori kiel pli bone disvastigi la informon, aŭ simple por legi ion en Esperanto. Tiel, oni facile havas okazon fari iom da Esperanto ĉiusemajne. Kaj, iom post iom, se vi iomete reklamas kaj sciigas al la gazetoj ke kunvenoj okazas, vi trovos ke homoj interesiĝos kaj venos, kaj via loka grupo vere ekvivos.

Sylvan Zaft instruis al mi ke se io estas farinda, indas fari ĝin, eĉ se malbone. Se vi deziras lokan grupon, starigu, eĉ se malbone. Eble surprizos vin kiam ĝi estos sukcesa.

*- Kiel mi komprenis, multaj esperantistoj en Usono ne apartenas al iu ajn loka grupo – kompreneble, estas tre fortaj lokaj grupoj en multaj grandaj urboj de Usono, sed estas ja pluraj homoj ekster lokaj grupoj simple pro ties manko... Ĉu ni do ne preteratentas la unuopulojn? Kaj ĉu entute eblas iel allogi kaj instigi ankaŭ tiujn kiuj ne apartenas al iu ajn loka grupo resti en la Movado?..*

- Ĉiu unuopulo estas grupo kiu simple ĝis nun ne organiziĝis. Antaŭ jaro estis en Amherst nenia loka grupo — estis nur mi. Mi simple decidis ke mi volis ke estu loka grupo. Nun kutime estas almenaŭ kvin kaj foje ĝis sep kiu venas al la semajnaj kunvenoj. Preskaŭ ĉie ajn estas sufiĉe da homoj kiuj interesiĝos pri Esperanto, se ili sciis kio ĝi estas kaj ke eblas lerni ĝin. Oni nur devas ebligiton, kaj homoj venos kaj partoprenos.

Preparis Ĵenja Amis

# “Faru Esperanton bone konata al usonanoj ĉie!”

*Intervjuo kun Robert Read, Estrarano*

*- Gratulojn pro via elektiĝo! Vi estas komputikisto, kaj, kiel mi lernis de via sinprezento, multaj viaj ideoj kaj agadoj estas ligitaj kun la uzo de la interreto. Mi absolute konsentas kun viaj vortoj ke la interreto estas la plej bona metodo disvastigi E-on, aparte en grandega Usono. Vi skribis ke ELNA devas vigligi la desuban kreskon de E-o per faciligado de interkomunikado kaj apogado de lokaj kluboj, ĉefe per la reto. Sed kiel plej bone tion fari? Kiel faciligi interkomunikadon kaj apogi la klubojn per la reto? Ĉu vi povus rakonti pli pri via vido kaj ideoj pri tio?*

Dankon, jes, mi havas ideojn. Mi pensas ke ELNA povas gastigi la retpaĝarojn de lokaj kluboj senpage, laŭ vikio-softvaro aŭ eble komunumo-softvaro kiel Drupal. Mi deziras proponi al ĉiu esperantisto kiu volas krei aŭ estri klubon senpagajn, facile serĉeblajn retpaĝojn por anoncoj, diskutoj, forumoj, ktp. Ĉi tio ne estas nova ideo — sed oni devas fari tion pere de la ELNA-retpaĝaro, ĉar mi supozas ke ofte la usonaj ne-jam-esperantistoj vidos unue la ELNA-retpaĝaron. La estraro de ELNA ne devas krei la enhavon de ĉi tiu retejo; ĝi devas nur malfermi ĝin al la membroj, kaj eĉ al la publiko mem.

Ankaŭ, mi supozas ke eble ni povas krei “ilaron por lokaj kluboj”, kun lernolibroj, lumdiskoj, flagoj, afiŝoj, k.t.p. kiun ni donos al klub-kreontoj. En miaj revoj, gimnaziaj lernantoj povos facile krei lokajn klubojn eĉ se ili ne havas, aŭ ne konas, proksimajn samideanojn.

*- En la sinprezento, vi menciis ankaŭ “creative commons” – “kreema komuna verkado”, kiu plifortigus la jam fortan liberhaveblan E-an literaturon per organizado de tradukado. Ĉu vi povus rakonti pli pri tio? Kiel ĝi funkcios? Kiu povus partopreni – kaj kiel? Kaj ĉu la kvalito de la tradukitaj*

*verkoj estos kontentiga (t.e. ĉu iu kontrolos la kvaliton de tradukoj kaj ĝenerale la kvaliton de la lingvaĵo)? (Ĉu temas pri retaj libroj aŭ paperaj?)*

Mi kutime pripensas retajn aferojn unue – ĉar ne-jam-esperantistoj ne facile trovas niajn librojn! Unue, ni devas nur sekvi la gvidadon de aliaj, ekzemple Don Harlow, kiu enretigis multe da E-a literaturo. Ni ne devas traduki dum ankoraŭ restas ne-rete haveblaj tradukoj kiuj jam estas bonegaj. Mi feliĉe raportas ke Prof. Edwin (Edveno) Grobe jam donacis lian tutan E-an tradukaron kaj originalan verkaron al Projekto Gutenberg (vidu la plenan artikolon en tiu ĉi numero sur paĝo 30). Ĉi tiu permeso ebligas grandegan kontribuon al la mondo de liaj 18 libretoj. Ili ekzistas nun nur papere, sed post malfacila, multhora skanado kaj elektronika tekstigado, ni havos ĝin rete. Ĉi tiu estos donaco al esperantistoj, sed, pli grave laŭ mi, ĝi estos videbla pruvo al ĉiuj uzantoj de Projekto Gutenberg (kiuj nombras centmilojn!) ke Esperanto jam vivas. La usonanoj kutime ne konstatas tiun fakton.

Post kiam ni estos kolektintaj grandegan literaturaron, ni devos traduki la klasikajn infanlibrojn, tiujn kiujn la kopirajtleĝoj permesos. Ekzemple la libroj de Edith Nesbitt, kaj *Peter Pan*. Kvalito certe gravas, sed mi persone neniam zorgas pri ĝi; mi preferus malbonajn tradukojn anstataŭ mankon de traduko.

*- Vi skribis ankaŭ ke vi tradukis tri sciencfikciajn rakontojn en E-on. Al mi ŝajnas ke estas multaj komunaj trajtoj inter esperantistoj kaj ŝatantoj de sciencfikcio, kaj ni ja havas multajn allogaĵojn por ili. Ĉu vi provis varbi novajn membrojn el la medio de sciencfikci-ŝatantoj?*

- Mi ne jam provis tion. Sed, estas bone konata teorio pri varbado/propagando ke oni devas venki komunumojn



kiuj estas pretaj kaj amikemaj. Por ni usonanoj, mi pensas ke la du komunumoj ja estas komputilemuloj kaj amantoj de sciencfikcio. Certe, oni trovis multajn junulojn kiuj interesiĝas pri la klingona lingvo kaj la elfa lingvo de Tolkien. Sed ĉi tiuj lingvoj estas ludoj (belaj ludoj, ja, sed ludoj) kompare kun Esperanto. Do, ni devas jungi la energion de ĉi tiuj lertaj junuloj kaj turni ĝin ankaŭ al Esperanto. Eble ni povas verki klingonan leteron al la “trekioj” kaj inviti ilin al Esperantio. Ĝi estus la plej longa verko kiun ili iam estus legintaj en la klingona!

*- Eble estas aliaj viaj ideoj kaj celoj kiujn vi strebos atingi dum via ofic-periodo en la ELNA-estraro?*

Plibonigi la retpaĝaron, krei komune verkeblan vikion, instigi (laŭ Earl “Jarlo” Bills) “slam”-poezi-konkurson, apogi la kreskon de la E-a Vikipedio, enmeti grandan literaturaron en la reton pere de Projekto Gutenberg, krei fakajn kongresetojn pri diversaj aferoj, peni akiri subvenciojn de fondusoj post kiam ni ekhavas bonan laborplanon, elspezi monon por reklamoj en zorge elektitaj gazetoj, kuraĝigi ĉiujn e-istojn vojaĝi per Esperanto, varbi instruistojn de la latina kaj latinidaj lingvoj. Pensu grande. Faru Esperanton bone konata al usonanoj ĉie.

Preparis Jenja Amis



Intervjuo kun Julie Spickler, Estrarano

- En via sinprezento vi starigis du grandajn celojn: reklami, kaj varbi novajn esperantistojn. Ĉu vi povus rakonti pli pri tiuj ĉi – kaj eble aliaj viaj celoj – kiel estrarano de ELNA? Kiel vi planas atingi ilin?

- Nuntempe mi havas nur unu ideon, kiun eble oni antaŭe elpensis: uzi senpagajn “publik-servajn” anoncojn per radio por reklami Esperanton. En mia loka grupo estas kvazaŭ-komencanto kiu estas volontul-laboranto por loka radiostacio, kiu helpas min verki bonefikan

## “Kion ajn ni povas fari por reklami – tiel ke homoj sciu pri nia ekzisto kaj komprenu nian celon – helpos”

mallongan reklamon por “ŝia” stacio kaj aliaj en nia regiono. Mi pensas ke en la historio de ELNA tiu rimedo estis uzita — mi devas serĉi pli por lerni plu. Mi supozas, espereble ĝuste, ke ekzistas nekonata grupo de homoj kiuj ŝatus Esperanton se ili scius pli pri ĝi, kaj eble ili eklernus per lernu.net aŭ alia senpaga hejma metodo.

- Vi estas prezidanto de la regiona klubo SFERO, kaj vi certe scias ĉion pri la bezonoj de la lokaj grupoj. Kiel, laŭ vi, ELNA povas helpi al ili fortiĝi, kaj kiel ili siaflanke povas fortiĝi ELNA-n? Ĉu estas io kion ELNA povus fari pli bone por lokaj grupoj – ekz., eldoni varbmateriojn ktp.?

- La situacio de ELNA kaj SFERO estas iom stranga, dank’ al la proksimeco de la Centra Oficejo kaj nia ĉefurbo San Francisko — ĉar multaj el la plej aktivaj SFERO-anoj estas ankaŭ estraranoj de ELNA, aŭ eks-estraranoj. Tial mi ne certas ke mi vere konas la bezonojn de lokaj grupoj aparte de la bezonoj de ELNA —

ni ĉiuj serĉas pli da membroj, pli da publika kono de nia mesaĝo, k.t.p. Mi opinias ke la materialo kiun ELNA havas kaj uzas por reklami estus uzebla por lokaj grupoj, se oni nur aldonus informojn pri lokaj adresoj, kunvenoj, k.t.p. — sed verŝajne iu kiu membras en grupo malpli kunligita kun ELNA ol SFERO povus pli bone respondi.

- Kion, laŭ vi, necesas fari por plibonigi kaj plifortigi la E-movadon en Usono ĝenerale kaj ELNA-n aparte?

Nu, la baza neceso estas pli da membroj, ĉu ne? Kaj tio estas la longtempa problemo — kaj mi deziras ke mi havus simplan kaj certan rimedon! Krom tio, estas grave ne fariĝi tro serioza: laŭ mi, Esperanto estas plezura afero, grava kompreneble, sed ne peza kaj severa. Do, kion ajn ni povas fari por reklami, tiel ke homoj sciu pri nia ekzisto kaj komprenu nian celon, helpos.

Preparis Ĵenja Amis

### Rezolucio pri Joel Brozovsky

Pro tio, ke

## Joel Brozovsky

foriras el la posteno de Direktoro de la Centra Oficejo de ELNA post ĉi tiu kongreso, kaj

Pro tio, ke

Joel Brozovsky servis en tiu posteno dum preskaŭ precize kvin jaroj, kaj

Pro tio, ke

Joel Brozovsky plenumis la devojn de la posteno elstare bone, lia dediĉiteco al Esperanto kaj ELNA estante klare videblaj je ĉiuj okazoj, kaj

Pro tio, ke

Joel Brozovsky ne nur per siaj propraj laboroj helpis al ELNA, sed per sia varma

kaj amikeca karaktero ankaŭ allogis volontulojn al laboro en la Centra Oficejo, kaj

Pro tio, ke

Joel Brozovsky ne limigis siajn laborojn por Esperanto al la nacia organizo, estante longtempa membro de SFERO kaj longtempa subtenanto de la revivigita diskutgrupo semajna en Berklio, kaj

Pro tio, ke

Joel Brozovsky multfoje montris sian scion pri Esperanto kaj ties historio en intervjuoj kun raportistoj, rezultigante vere allogajn kaj pozitivajn artikolojn,

Do, estu decidite, ke

La Estraro de ELNA, montru al Joel Brozovsky sian dankemon pro liaj multaj servoj al ELNA kaj al Esperanto dum la pasintaj kvin jaroj de laboro kiel Direktoro de la Centra Oficejo de ELNA. La Estraro

sugestas al la kongresanoj ke ili simile montru dankemon al Joel Brozovsky per unuanima aplaŭdo.

Aprobata unuanime la 13-an de junio, 2005, en Aŭstino, Teksaso.



FOTO: ĴENJA AMIS

# “La plej granda tasko de la organizaĵo estas pli bone informadi pri Esperanto kaj pri ELNA”

*Intervjuo kun Gary Grady, Estrarano*

*- Tiu ĉi estos jam via kvina reelektiĝo al la ELNA-estraro, se mi ne eraras. Ĉu vi povus mallonge rakonti pri viaj antaŭaj agadkampoj en la Estraro?*

- Mi dubas ĉu mi rajtas uzi tian grandan vorton por priskribi mian partoprenon en la Estraro. La veran laboron de ELNA traktas la diversaj komitatoj kaj komisiitoj kaj aparte, kompreneble, la Centra Oficejo. La respondecoj de la Estraro estas kunlabore fari decidojn aŭ rekomendojn pri la aferoj de la organizaĵo. La plej gravaj decidoj en kiuj mi partoprenis koncernis la Centran Oficejon – elekto de stabanoj, decido pri la bedaŭrinda neceso malpligrandigi la stabon, sed malgraŭ tio reteni la libroservon ktp. Krom tio, la plej grava alia afero estis la televida kurso “Pasporto”.

*- Ĉu vi povus rakonti, kiel ELNA (kaj la Esperanto-movado ĝenerale) evoluis dum la tempo kiam vi estis en la Estraro? Kion vi povus nomi kiel plej grava(j)n atingo(j)n de ELNA dum tiu tempo?*

- Kiam mi unue membriĝis en la Estraro, la diskutado kaj decidfarado okazis plejparte kadre de la Kongreso, pro la malfacileco glate interkomunikiĝi per interŝanĝo de poŝtaj leteroj. Simile la membraro konis unu la aliajn plejparte pro partopreno en kongresoj kaj en regionaj kunvenoj. En la lastaj jaroj la reto profunde ŝanĝis la situacion. La Estraro nun povas fari sian laboron dum la tuta jaro, kaj des pli grave, ankaŭ la plejparto de la membraro, ne nur tiuj kiuj ĉeestas la Kongreson, povas facile diskutadi la aferojn de ELNA.

La reto fariĝis granda avantaĝo ĝenerale al la esperantistaro, dank’ al, ekzemple, *ĝangalo*, *lernu.net*, centoj aŭ eĉ miloj de retaj diskutgrupoj ktp. Pere de la reto granda nombro de homoj ekscias pri Esperanto kaj komencis lerni kaj uzi ĝin. La reto tutcerte estas unu el la plej grandaj kaj gravaj disvolviĝoj por Esperanto en la historio de la lingvo. Sed samtempe, la reto iugrade malpligrandigas la tradician neprecon por organizaĵo kiel ELNA. Nun eblas lerni la lingvon sen lernolibroj kaj sekvi

novaĵojn sen surpaperaj gazetoj. Tamen restas bezono en (kaj ekster) Esperantio por libroj, gazetoj, centra oficejo kaj organiza strukturo, do certe restas bezono por ELNA. ELNA ankoraŭ estas grava kaj necesa, kaj ankoraŭ indas membriĝi en ĝi kaj subteni ĝin.

Do, la plej granda tasko kiu alfrontas la organizaĵon kaj ĝian Estraron estas pli bone informadi pri Esperanto kaj pri ELNA. Gravas pligrandigi la membraron, ĉar la granda membraro estas la fonto de volontuloj por taskoj grandaj kaj etaj. Se ni povas dividi la fiksjajn kostojn inter pli granda nombro de membroj, ni povus denove dungi duan stabanon en la CO, kio havus multajn avantaĝojn, kaj ni eble povus malpliigi la bazan kotizon.

*- Dum multaj jaroj vi instruis kaj informadis pri Esperanto. Kiuj estas la malfacilaĵoj ligitaj al informado kaj instruado en Usono? Ĉu vi povus doni konsilojn al novaj homoj en ELNA kiuj volas okupiĝi pri informado kaj instruado pri tio kiel plibonigi tiujn du flankojn?*

- Verŝajne la plej gravaj problemoj restas pli-malpli la samaj kiel en la pasinteco: angleparolantaj usonanoj ne sentas fortan bezonon lerni aliajn lingvojn pro tio ke ili tre malofte alfrontas neceson tion fari, kaj pro tio ke ili supozas ke ili jam posedas “la” internacian lingvon, la anglan. Samtempe ili ofte havas tre strangajn ideojn pri Esperanto. Sed diversaj aferoj almenaŭ iomete plibonigas la medion por ni: la



kresko de eksterlandaj ekonomioj (aparte en Azio), ekzemple, vekas pli da intereso pri aferoj ekster la propra lando. Kaj, denove, la reto prezentas multajn eblojn kiujn ni jam komencas uzi. Ekzemple, nun, kiam aperas erara mencio pri Esperanto en la gazetaro, ni rapide respondas, kaj rezulte mencioj fariĝas pli ĝustaj kaj pli favoraj.

Mi persone opinias ke la plej utila informado emfazas la praktikajn aktualajn avantaĝojn de Esperanto kune kun ĝia idealisma neŭtraleco. La plej utila instruado simile emfazas la praktikan flankon. Lernantoj devus lerni, krom vortojn kaj gramatikaĵojn, almenaŭ iom pri nia historio kaj literaturo, kaj des pli grave pri la landaj kaj internaciaj eventoj kaj organizaĵoj, pri la Pasporta Servo, pri la plej konataj gazetoj kaj plej interesaj retlokoj, ktp., por ke la lernantoj povu kiel eble plej rapide komenci vere partopreni nian viglan kulturon. Se ili vere uzas la lingvon, ili multe malpli probable restos eternaj komencantoj aŭ simple malaperos.

Preparis Jenja Amis

## Memoro Sopirata en Kvin Kontinentoj

Intima NASK estas. Manĝante sur teraso, rigardante montetaron verdan, sidis ni ĉirkaŭ tabloj rondaj, diskutis, konversaciis, babilis en lingvo intime nia.

Mirindeco invadis klasojn.

Scivolemon satigis programoj vesperaj.

Gramatiko, lingvistiko posttagmeze malfermis okulojn, kiam, samtempe, komprenado ampleksiĝis.

Tridek, entute – ni ĉiuj havas

adresaron. Ĉiu nomo havas memoron. Multaj memorigas pri sentoj forte ligitaj kun emocia sopiro.

Semajnon poste, al ĉiuj, iu enpoŝtigis koverton amotan. Post monato, telefone, ekaŭdita voĉo donis novaĵon varmigan. Konsentis la ekparolantoj:

Mi sentas la mankon de vi...

Mi sopiras al NASK.

Post pli da parolado, kompreneble, kaj mirinde sonis:

Ĝis la reaŭdo!...

Ĝis la reaŭdo!

Keneĉjo Goldbergo

# Esperanto USA havas novan redaktoron!

## La Redaktoro, Joel Amis

**Persone:** Mi naskiĝis la 5-an de majo, 1978 en Atlanto, Georgio. Grandan parton de mia vivo mi loĝas en Alpharetta, antaŭurba urbeto apud Atlanto (kvankam ni planas baldaŭ ekloĝi en la urbo Atlanto mem). En 2000 mi diplomiĝis de Ŝtata Universitato de Georgio pri la fako Religiaj Studoj. De 2000 ĝis 2002 mi loĝis en Japanio laborante kiel asista instruisto pri la angla lingvo en mezlernejo. Ekde oktobro 2005 mi laboras por la ŝtata registaro de Georgio.

En majo 2005 mi edziĝis al Ĵenja Zvereva. Ŝi estas aktiva esperantistino, kaj ni uzas Esperanton en nia ĉiutaga vivo.

**Esperante:** Mi eklernis Esperanton en decembro 1994 post hazarda malkovro de la lingvo en lingva enciklopedio. Ekde tiam mi lernis aŭtodidakte ĝis mi atingis fluan lingvonivelon. En 1996 mi plustudis per la supernivela Esperanta korespondkurso de ELNA. En somero 1999 mi studis en la intensa kursaro ĉe San-Franciska Ŝtata Universitato (kursaro nun nomata NASK). Mi krome sukcesis en la meznivela (plej alta nuntempe havebla) ekzameno de ILEI.

Rilate kaj la lingvon mem kaj ideologion, mi konsideras min sufiĉe tradiciema esperantisto. Se iu nomus min "idealisto" aŭ "verdstelano" mi tute ne ofendiĝus – male, mi konsiderus tion komplimento. Pro tio ke niaj lingvo kaj Movado estis fonditaj sur idealismo (ja la "Interna Ideo"), mi kredas ke ni ne rajtas neglekti tiun aspekton de nia kulturo.

Ankaŭ, Esperanto estas fundamenta parto de mia vivo, parto de mia memdifino. Mi uzas ĝin ne nur hodie, sed ankaŭ en mia ĉiutaga vivo (eĉ kiel mia ĉefa hejma lingvo!).

**Movade:** En 1997 mi helpis kunfandi la Esperanto-Societon de Metropola Atlanto (ESMA) kaj en 2000 kadre de tiu grupo helpis kunorganizi la ELNA-kongreson en Atlanto. Ankaŭ nun mi tre aktivas en ESMA.

Dum 2004 mi plentempe volontulis en la Centra Oficejo de TEJO (en la CO de UEA) en Roterdamo, Nederlando. Ekde 2004 mi redaktas la revuon de TEJO, *TEJO Tutmonde*. Krome, ekde 2003 mi estas vicredaktoro de la socikultura revuo de TEJO *Kontakto* (estinte ties ĉefkorektisto ekde 2002).

Mi membras en ELNA (kaj USEJ),

UEA, TEJO, ESMA kaj ILEI/AAIE. Mi estas ankaŭ junulardelegito de UEA por Atlanto. En 2003 la ELNA-membraro elektis min kiel estraranon.

Mi partoprenis ELNA-kongresojn en Montrealo (1998), Atlanto (2000), Bostono (2003) kaj Aŭstino (2005), IJK-ojn en Veszprém (1999), Lesjöfors (2003) kaj Kovrov (2004), UK-ojn en Zagrebo (2001), Fortalezo (2002) kaj Gotenburgo (2003), TEJO-seminariojn en Bruselo kaj Strasburgo, kaj diversajn aliajn renkontiĝojn kaj eventojn.

**Alie:** Krom Esperanto kaj la Movado, mi interesiĝas pri politiko, historio, lingvoj, vojaĝado (mi multe vojaĝis per Pasporta Servo), sano, kaj diversaj religiaj kaj filozofiaj temoj (ekz. rozkruismo, framasonismo, esoterismo, mistikismo, liberala anglikanismo, k.a.). Mi estas membro de la Rozkruca Ordeno, AMORC ([www.amorc.org](http://www.amorc.org)), kaj aktiva membro de la Atlanta Loĝio de AMORC.

## La Vicredaktoro, Ĵenja Amis

**Persone:** Mi naskiĝis la 5-an de septembro, 1978 en Kievo, Ukrainio. Mi laboris en multaj lokoj, sed plejparte – ĝis mia translokiĝo en Usonon printempe 2005 – mi estis ĵurnalisto por turismaj revuoj kaj ĵurnaloj. Mi diplomiĝis de Ukrainia Nacia Universitato "KPI" pri ĵurnalismo kaj redaktado (en la ukraina kaj la rusa). Mi ŝatas verki kaj redakti, kaj tenas esperon iam ankaŭ en Usono fari tion. Mi ŝatas ankaŭ lerni lingvojn – mi sufiĉe libere parolas la anglan kaj la germanan, kaj "hunde" (preskaŭ ĉion komprenas sed ne parolas) la hispanan. Mia gepatra lingvo estas la rusa.

**Esperante:** Mi eklernis Esperanton en 1999. Malgraŭ tio ke mi sciis pri Esperanto ekde infanaĝo (en sufiĉe malnova porinfana libro pri lingvoj, eldonita iam en la 60-aj, estis tre estima mencio pri ĝi kaj eĉ elementa leciono), mi eklernis ĝin nur en 1999, dank' al mia esperantista ĉefo. Mi partoprenis elementan vid-al-vidan kurson en Kievo, poste partoprenis TEJO-seminaron en 2000, kie mi plene enamiĝis al TEJO kaj Esperantujo. En 2001 mi kunorganizis TEJO-seminaron en Budapeŝto (Hungario). Fine de 2001 mi estis elektita kiel redaktoro de *Kontakto* – socikultura revuo de TEJO/UEA, kaj tiu tasko estas



granda honoro por mi. Ekde la komenco Joel Amis multege helpis kaj daŭre helpas al mi, unue kiel ĉefkorektisto kaj nun kiel vicredaktoro. Mi ĝojas kaj ĝuas verki kaj redakti en Esperanto, korespondi kun aŭtoroj, komposti kaj dezajni (mi tre esperas ke vi ŝatos la novan logotipon de **Esperanto USA** kaj ĝian dezajnon!) kaj ĝenerale esti parteto de UEA kaj TEJO. Mi estas ankaŭ vicredaktoro (kaj kompostisto) de *TEJO Tutmonde*, kiun redaktas Joel.

Same kiel por Joel, Esperanto estas natura parto de mia memo. Mi parolas kaj laboras en ĝi, la grandega parto de miaj amikoj estas esperantistoj, kaj eĉ mian unuan laboron kiel ĵurnalisto mi ricevis dank' al Esperanto! En 1999 mi ĵus finis E-kurson kaj volis ŝanĝi laboron. Kaj jen en edukekspozicio, kie mi deĵoris ĉe E-stando, oni proponis al mi verki artikolon pri Esperanto por nacia gazeto. Mi, kun ĝojo, faris, kaj restis labori tie kiel ĵurnalisto, kaj poste kiel vicredaktoro.

**Movade:** Mi estas en la estraro de Ukraina E-Asocio (ĝis printempo 2006), kaj informado pri Esperanto estis mia ĉefa kampo (krom verkado de artikoloj mi ankaŭ organizis kaj partoprenis gazetarkonferencojn kaj eĉ ricevis raporton en la tutukrainia televido). Mi ankaŭ membras en UEA/TEJO kaj, kompreneble, ELNA (ekde 2004).

Mi partoprenis kelkajn TEJO-seminariojn, IJK-on en Rusio en 2004 (tie mi redaktis/kompostis la kongresan gazeton) kaj ELNA-kongreson en Aŭstino 2005, kie mi same enamiĝis al ELNA kiel antaŭe al TEJO antaŭ kvin jaroj.

**Alie:** Mi interesiĝas pri politiko, historio, lingvoj, vojaĝado (kompreneble!), filozofio, fotado kaj naturprotektado. Mi amas ĉiujn bestojn, ŝatas spekti "Saturday Night Live", ŝatas ĉevalrajdi, legi kaj lerni ĉion novan. Same kiel Joel, mi estas membro de la Rozkruca Ordeno, AMORC, kaj aktiva membro de la Atlanta Loĝio de AMORC.

# “Austin is frenez about Esperanto!”

## Impresoj pri mia unua ELNA-kongreso

(daŭrigo. Komenco sur p.1)

### Tolerema, amikema, ribelema!

Kiam, post longaj horoj de vojaĝado, ni (mia edzo kaj mi) eliris el la klimatizita aŭtobuso, mi havis senton kvazaŭ mi troviĝus antaŭ harsekigilo. La aero estis varmega kaj seka, kaj la multegaj arboj en Aŭstino ŝajnis al mi vera miraklo! Kiel mi poste eksciis de la kongresanoj, multegaj teksasanoj volus loĝi en Aŭstino, kaj por tio estas pluraj kialoj. Unue, multe da verdaĵoj (teksasanoj diras ke nun en Teksaso estas pli da arboj ol kiam oni nur ekloĝis tie), puraj akvo kaj aero – en Aŭstino estas multaj naturaj fontoj kaj malmulte da industrio. Due, la urbo mem estas juna (pro multaj studentoj de la fama *University of Texas at Austin*), tolerema, amikema kaj – ribelema, t.e. tute ĝusta por esperantistoj (mi tute ne atendis vidi en Teksaso tiom da glumarkoj sur aŭtoj, kinejoj ktp. kontraŭ Bush)! Dum niaj noktaj promenoj multaj junaj aŭstinanoj montris klaran intereson pri Esperanto kaj demandis multe pri la lingvo, kaj aŭstina gazeto pri kulturaj urbaj novaĵoj eĉ aperigis anoncon pri la ELNA-kongreso. Malgraŭ ke la tekston proponis esperantistoj, la redakcio aldonis la frazon “Austin is frenez about Esperanto” – verŝajne, ili trovis tiun tradukon por “crazy” en la reto. Ni certe estis flatitaj!

Ni alvenis al Aŭstino ĵaŭdon posttagmeze, kaj, kvankam la kongreso komenciĝis nur sabaton matene, jam tiutage alvenis multaj kongresanoj. Iujn ELNA-membrojn mi jam konis interrete, pro ko-

munaj konatoj aŭ dank’ al ilia agado, kaj estis granda plezuro finfine konatiĝi kun ĉiuj persone. Laŭ mi, oni bonege elektis la kongresejon: la kristana (luterana) universitato *Concordia* estas sufiĉe granda ne nur por gastigi ĉiujn kongresanojn (ĉirkaŭ centon!), sed ankaŭ por doni grandajn ejojn por prelegoj, solenaĵoj kaj libroservo. Ankaŭ la kosto estis sufiĉe modera laŭ usonaj normoj. Kune kun ni en *Concordia* kongresumis ankaŭ alia grupo – iu kristana junularo. Fine de la unua kongresa tago la gejunuloj kun evidenta plezuro jam diris al ni “Saluton!”, “Kiel vi fartas?” je ĉiu renkonto.

La unua programero de la kongreso estis estrarkunsido, kiun rajtis partopreni ne nur estraranoj. Ĝi okazis unu tagon antaŭ la oficiala kongreso kaj daŭris sufiĉe longe – de la 8-a matene ĝis la 5-a vespere. Dum la kunsido estis preparolataj multaj gravaj organizaj aferoj – ekde la jara buĝeto de ELNA ĝis elekto de la nova direktoro kaj eventuala ŝanĝo de la nomo de ELNA. Tre bone impresis min la eldono de profesia vidbenda kurso *Pasporto al la Tuta Mondo* kun volontulaj kontribuoj de multaj homoj (kaj ne nur el Usono!), deziro kaj preteco eldoni *Harry Potter* (en Esperanta traduko) kaj aliajn librojn, kaj ĝenerale la bona financa stato de la organizo. Por Ukraina E-Asocio eldonado de libroj eĉ ne estas konsiderata pro tro limigitaj financaj rimedoj – la jara kotizo estas 1-2 dolaroj, kaj tio inkluzivas etan eldonaĵon kaj adreslibron.

### Vizitanto el la jaro... 1861!

La Interkona Vespero okazis vendredon vespere, en la formo de bankedeto, kun bongustegaj “fingromanĝaĵoj”, fruktoj, punĉo ktp. La Solena Malfermo okazis sabaton matene, kun salutoj de partoprenantoj, prezento de honoraj gastoj, emociplena prelego pri E-literaturo kaj diversaj amuzaĵoj, kaj la granda halo de la universitato estis plenplena. Tuj post la Solena Malfermo la



FOTO: STEVE BREWER

Kial ne?!

tuta kongresanaro eternigis sin per komuna fotado. Estis malfacila tasko trovi tempospaceton inter la aktivajoj por viziti la libroservon – tamen, kiel poste raportis Joel Brozovsky, ĝi estis la plej sukcesa libroservo dum multaj jaroj! La kongresa programo estis vere densega – oni devis elekti unu el kelkaj (ĝis kvar!) samtempaj programeroj, kaj post nur kelktaga kongreso mi ial havis la impreson ke ĝi daŭris multe pli longe – ukrainaj aranĝoj kutime ne estas tiel “densaj”.

La honora gasto de la kongreso estis Edwin de Kock, Sud-Afriko/Usono, fama E-poeto, kritikisto, esperantologo, misiisto, redaktoro, profesoro kaj teologo. Alia gravaj gastoj estis Laŭlum – ĉina esperantisto, fama pro siaj multaj tradukoj de ĉina literaturo kaj lernolibroj (ili haveblis en la libroservo) kaj gesinjoroj Grattapaglia, famaj pro sia bonfara agado: ili volontulas en infanprotektita eduka institucio *Bona Espero* en Brazilo. Iliaj prelegoj altiris plej multe da kongresanoj. La rekordulo de la kongreso estis Haruo Ros – li faris ok prelegojn!

Pro manko de spaco mi ne povas rakonti pri ĉiuj prelegantoj, sed unu prelegon ne eblas ne mencii – “Vizitanton el 1861”, kiu sendube estis la plej nekutima. La “vizitanto” (lin ludis Filipo Dorcas) estis metodista pastro kiu rakontis pri sia malfacila vivo. Li portis faman teksasan nigran ĉapelon kaj dikajn mantelon kaj havis malnovajn Bibliojn, volvitajn en ŝtofo.



FOTO: JENJA AM S

En ĝiaj vejnoj fluas muziko!



FOTO: JENJA AMIS

Ni eksciis de li pri Teksaso, pri la vivo de rajdantaj metodistaj pastroj (ekzemple, ke ilia averaĝa aĝo estis nur 28 jaroj aŭ ke ili ne rajtas forpreni la mantelon eĉ en varmegaj teksasaj someroj), pri la rilatoj inter blankuloj kaj nigruloj en 1861 en Teksaso, kaj ankaŭ multaj aliaj aferoj. Filipino ludas tiun rolon dum historiaj festivaloj, kaj li ĉiam donis respondojn eĉ al la plej malfacilaj demandoj.

Fine de la unua kongresa tago okazis vera bankedo kun amuza aŭkcio. Poste la




FOTO: JENJA AMIS

Thomas Alexander, dum la estrarkunsido

“kaproj” dividiĝis disde la “ŝafoj”. La “ŝafoj” restis por spekti la filmon “La horoj”, kaj la “kaproj” (inkluzive ankaŭ vian aŭtorinon) foriris al la “drinkeja promeno” – la organizantoj zorgeme indikis la “drinkejan itineron” sur la mapo en la kongreslibro (pro tio ke la kongreso okazis en kristana [evangeli-luterana] universitato, oni ne rajtis trinki eĉ vinon aŭ bieron en la kongresejo). Estis interesa sperto promeni laŭ la brile lumigitaj noktaj stratoj de Aŭstino, kiu laŭ la kvanto de kafejoj, restoracioj kaj diskotekoj rememorigis al mi Amsterdamon (sed tute sen maldecaĵoj!). Oni nomas Aŭstinon ĉefurbo de la viva muziko – kaj ĝuste tiel estas! Viva muziko aŭdeblas ĉie: en la diskotekoj, kafejoj kaj eĉ simple sur la stratoj! Kiam oni promenas laŭ la aŭstinaj stratoj, oni povus supozi ke oni klimatizas la aeron ankaŭ surstrate – la por-doĵ de la kafejoj estas malfermitaj, kaj malvarmigita aero eliras eksteren.

**Bonan vesperon!**

La dua kongresa ekskurso estis eĉ pli interesa ol la unua: temis pri la vizito al la fama ponto de Kongresavenuo, kiu fariĝis la plej granda urba vesperata “komunloĝejo” en Norda Ameriko! (legu pli en *Kontakto* 207, 2005:3; video-prezento pri vespertoj, kiun faris dum la kongreso Scott Redd, troveblas eĉ < <http://ek2005.retservalo.com/> >). Ĉiujare al Aŭstino venas pli ol miliono da libervostaj meksikaj vespertoj (komparu: en la urbo mem loĝas nur ĉ. 650 mil homoj!) – do, ĉiujare naskiĝas en Aŭstino almenaŭ 750 mil vespertidaj. Interese ke la vespertoj kiuj venas al la urbo estas plejparte inaj, kaj ke la idoj pezas ĉ. trionon de la pezo de sia patrino. La vespertoj-patrinoj trovas siajn idojn inter centoj da miloj de aliaj vespertidaj laŭ iliaj sonoj kaj odoroj.

La aŭstinanoj amas siajn vespertojn. Vi povas trovi bildojn kaj statuojn de vespertoj ĉie (eĉ aŭstina hoke-teamo nomiĝas “Ice Bats”), kaj centoj da turistoj ĉiutage iras al tiu ĉi ponto por rigardi vespertojn. Nun eĉ malfacilas kredi ke aŭstinanoj ne ĉiam estis tiel amikemaj al ili. Kvankam tiuj ĉi bestoj ĉiam loĝis en Aŭstino, en 1984 al la urbo venis multege pli da vespertoj ol kutime. Ili trovis bonegan loĝejon en la kuniĝoj de freŝ-renovigita aŭstina ponto. Multaj urbanoj tiam ne komprenis ke vespertoj estas utilaj kaj amikaj bestoj kaj ektimis ke ili povas transdoni malsanojn kaj do ĉiel provis forigi la vespertojn el la urbo... Sed – feliĉe por la urbo kaj la vespertoj – en 1986 al Aŭstino venis la organizo *Bat Conservation International*, kiu komencis grandan eduk-laboron kaj sukcesis klarigi al aŭstinanoj ke ves-

pertoj portas neniom da malbono, kaj la bono de ilia ĉeesto estas vere grandega: ili ja manĝas tunojn da insektaĉoj kaj tiel helpas agrikulturon, jam ne parolante pri kroma turisma mono kaj laboroj! Esperantistoj kun intereso babilis kun la “vespertaj tradukistoj” – volontuloj el *BatCon*.

**Hey, Esperanto, shut the &!\*# up!**

Post la vespertoj, ĉiuj dezirantoj povis iri al la kinejo por spekti la (fi)faman filmon *Incubus* (tiun tagon kaj tempon la organizantoj de la kongreso speciale aranĝis ĉe la kinejo!). La kinejo “Alamo” mem estas tre vizitinda kaj, evidente, tre populara en Aŭstino. Ĝi ne estas kutima kinejo – jam ekde komenco oni povas tion vidi laŭ la granda kvanto de pacifistaj kaj kontraŭregistaraj sloganoj en la vestiblo. La biletoj tie ne estas multekostaj (\$6), kaj eĉ estis ioma vico por eniri. Ĉe la eniro ĉiu vizitanto ricevis senpage glason da glaciakvo, kaj krome tie (eĉ dum la filmo) eblis mendi mangaĵojn kaj bieron (la prezoj estis tute akcepteblaj). Tiuj kiuj iam spektis *Incubus*, certe komprenas kial la kinejo foje eksplodis pro la ridego de esperantistoj... Jen nur kelkaj perloj: “Mia *viĝago*” (t.e. “mia vizaĝo”); “ho, mia *pajdo*” (t.e. “mia piedo”), “*malsupriin, malsupriin*” (t.e. “malsupren”), “ĉu vi volas *nagi* kun mi” (t.e. “naĝi”) ktp. Tamen, eĉ toleremaj aŭstinanoj ĉi-foje ne eltenis. Post aparte laŭta kaj longa ridegado (kun iuj aŭdeblaj flankkomentoj), iu finfine kriis: “Hey, Esperanto, shut the &!\*# up!”, sed tuj poste iu alia aldonis “‘*shut up*’ would be enough”!

Post la filmo ni veturis al la ŝtatkapitolo. Ĝi estas ne nur tre bela – evidentiĝis ke ĝi



(de maldekstre) Jair Pereira Barbosa, urbestro de Alto Paraíso de Goiás, Brazilo, lia edzino Aurora, Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia de Bona Espero kaj Joel kaj Jenja Amis




FOTO: JENJA AMIS



Steve Brewer dum la prelego pri hajkoj

estas la plej granda ŝtatkapitolo en la tuta Usono! Interese ke granda parto de la kapitolo estas... sub la tero – kaj eblas eĉ vidi parton de ĝi. Super la kapitolo flugis la jam konataj al ni vespertoj. Ŝajne usona “maksimumismo” estas eĉ pli granda en Teksaso – ja ĉio en



La teksto sube diras: “Hajko. La strangajn vortojn sur la blanka tablo ĉu mi komprenu?”

Teksaso ŝajnas granda – eĉ tasoj de kafo en kafejoj ŝajnis al mi absolute enormaj. Ja la ŝtato mem estas enorma – pli granda ol la tuta Ukrainio, kiu cetere estas la plej granda lando en Eŭropo, ne enkalkulante Rusion.

Por la lasta duontago kaj la fermo de la kongreso restis relative malmultaj homoj. La poemo de Laŭlum pri Aŭstino kaj la kongreso (ĝin laŭtlegis Russ Williams, ĉar la aŭtoro ne povis resti por la fermo) kortsitis ĉiujn ĉeestantojn, kaj mi sincere esperas ke ELNA-kongreso iam baldaŭ denove okazos en Teksaso – ŝajne, mi ĉiam serĉos kialon viziti la Ŝtaton de la Sola Stelo denove!

*Mi kore dankas ĉiujn organizantojn pro la bonega organizado kaj kreado de unika etoso dum la kongreso!*

Jenja Amis



FOTO: JENJA AMIS

Ĉe la kinejo Alamo, post la filmo Incubus

## Esperanto Captures 1.3 Billion Gold Medals In 2008



**An arch smile on Mr. Esperanto's stateless face, "Talk to me about impossible dreams, pal... WWII victory in**

**1945, man on the moon in 1969, renaissance in New Orleans in 200x..." He paused for a moment before rattling off again, "Hey, just ask Prof. Joe at Norman Park Senior Center, he'll dish out the whole nine yards. Once you've listened to his pitch, you draw your own conclusion. Okay?"**

Having known Joe all my life, I approached the dude one fine afternoon. Joe showed me a clipping from the San Diego Union Tribune and I strained my myopic eyes to make out the blurb.

*Norman Park Senior Center offers a Chinese language class from 3 to 5 every Sunday. Learn the Chinese language through a rare method of mastering the Esperanto alphabet to make pronouncing easier. The class will play Lingeon,*

*an algorithm game to learn phrases. Free.*

*Location: 270 F Street, Chula Vista.*

"Three new students showed up — one on August 28, and two on September 11."

"That's great. How are they doing?"  
 "Well, you and I both know the old Chinese saying about "melons ain't balls"— never perfectly spherical. The first student never came back, but the other two have. They wanted to learn some Chinese before they take off for a long vacation in China on September 21." Flipping my crazy beads on my Ching Dynasty abacus that I brought from China in 1947, "You mean they only attended two classes and expect to win gold in China?"

"No, but one of them left me a note saying I found the game (Lingeon) to be fun as well as going a long way in remembering how to say the letters — also remembering the phrases. I'm looking forward to getting the game in other languages."

"Talking about other languages, why Esperanto?" I relented.

"Two reasons: ELNA responded to my game with fireworks from day one, and I reacted to the Esperanto alphabet with disbelief."

As it turned out, Esperanto vowels and circumflexed consonants such as Ĉ, Ĝ, Ĥ, Ĵ and Ŝ sound Chinese. To top it off, their regular *C* is a dead-ringer; not to mention that funny *U* that waves into the most important word in any language.

"I've got a 12-year-old lass from Tijuana — I'll call her Marta — who talks like Zhang Ziyi (China's female Bruce Lee)." True, she's been with me since June." Joe beamed with hubris.

Despite his exuberance, I savor his favorite dish with a grain of salt. On the other hand, who had dreamed about victory in WWII, man on the moon, New Orleans renaissance?

George K. Wu  
 Chula Vista, California

# 90-a Universala Kongreso de Esperanto

23 – 30 julio, 2005, en Vilno, Litovio

Prezidanto Renato Corsetti nomis ĝin la “laborema” kongreso – pro la fakto ke ĉie, ĉiam, daŭre videblis kongresanoj laborantaj por prezenti, diskuti kaj lerni. Inter tiu laborado estis la inaŭguro de la DVD-versio de nia kurso, *Esperanto: Pasporto al la Tuta Mondo*.



Marjorie Boulton (dekstre) kun Diana Babeck Weichert spektantaj *Pasporton*

La kongresanoj lernis ke ĝi estas vere la plej ampleksa instruilo iam prezentita por lerni fremdan lingvon. Proksimume 60 personoj antaŭmendis ĝin dum la kongreso, kun subtitoloj en la angla, hispana, germana, franca, kaj Esperanto.

Ĉi tiu UK estis speciala por ni ankaŭ ĉar nia membro Boris Kolker estis elektita kiel Honora Membro de UEA. Ankaŭ Heta Kesaala el Finnlando, kiu oftege elektis vojaĝi kun la usonaj ekskursantoj, estis nomita Honora Membro de UEA.

Entute aliĝis malpli ol 3,000 partoprenantoj, el kiuj 42 usonanoj. Aliĝis, sed ne partoprenis, ankaŭ usonaj Honoraj Membroj de UEA William Harmon kaj Edwin de Kock. La kongresa temo estis “Universalaj Kongresoj: 100 jaroj de interkultura komunikado”. Malgraŭ la sukceso de la kongreso, ni daŭre serĉas manieron plivastigi partoprenadon. Laborgrupoj esploras manieron reformi la UK-ojn. SED, unu afero kiun ni neniam ŝanĝos estas la eblo intime amikiĝi pere de rektaj renkontiĝoj dum kongresoj. Unu



Robert Stalzer kaj Sepideh Laal, gratulataj de Lusi Harmon kaj Reza Torabi, ĉefo de la irana delegacio

afero kiu estis kiel “simbolo” de nia interkultura komuniĝado estis la anonco de la gefianĉiĝo de usonano kaj iranano.

Lusi Harmon

## Usonaj partoprenintoj de la UK

Anna kaj Larry Bennett  
James Briggs  
Walter Cebulski  
Francisco Cruzaley  
Randy Dean  
Jane Edwards  
Madeleine d'Estries

Ronald Glossop  
Rochelle Grossman  
Mary Hammersmith  
Lucille Harmon  
Greg Hewgill  
Frans and Dorothy Jahger  
Henry Janoski  
John Michael Justice  
Boris and Esther

Kolker Maria  
Kordylewska Leszek  
Kordylewski Jan Long  
Katherline Mc Bride  
Anderson Mills  
Werner Moeller  
Maria Murphy  
Todd Phillips  
Robert, Hanna,

and Kelvin Read  
Alexander Rybalov  
Miko Sloper  
Sofiya Soskina  
Jon Spelbring  
Robert Stalzer  
Robert Swenson  
Humphrey Tonkin  
Arnold Victor  
Steve Wagenseller  
Russ Williams

## Katrina Portis al Ni Bondezirojn

Post Uragano Katrina Jawaid Eahsan (ĝenerala sekretario de Pakistana Esperanto-Asocio) skribis:

*Se vi akceptas, Pakistana Esperanto-Asocio povas gastigi vin en tiu ĉi krizostato (angle: State of Emergency). Kvankam ni ne povas helpi pri veturo, ni tamen povas aranĝi senpagajn loĝadon kaj manĝadon por 100-200 esperantistoj en diversaj urboj de Pakistano.*

Mi (kiel Komitatano A por Usono) respondis ke kiam mi aŭdis pri la propono, mi pretis plori pro dankemo, ĉar ĝi estis tiel bonkora. Kiam mi aŭdis pri la propono, jam okazis plia uragano kiu ankaŭ kaŭzis evakuadon de hejmoj de personoj en Teksaso. Fakte, en tiu periodo ni ne povis kontakti nepon loĝantan en

Houston. Ni ne sciis tiam ĉu li estas sekura aŭ ne. Pro tio mi estis eĉ pli korusita.

Estas tre malfacile kompreni kiel granda estas la damaĝo ne nur al hejmoj, loĝ-lokoj, laborlokoj, sed ankaŭ al la tuta strukturo de vivo en tiu granda parto de la sudo de Usono. Mi eĉ ne pensis pri kiom da homoj mortis – ne nur pro la uragano sed ankaŭ pro neatento de nia registaro.

Mi klarigis ke estus malmultaj personoj kiuj, se ili perdis hejmojn, loĝlokon kaj labor-postenojn, povus vojaĝi al Pakistano. Tamen, la fakto ke tiu eblo haveblus, pro bonvolo de esperantistoj, certe estus psikologie grandega konsolo.

Ankaŭ nia prezidanto, Phil Dorcas, sendis oficialan dankmesaĝon nianome.

Kiu povis scii ke post nur kelkaj semajnoj, niaj samideanoj en Pakistano suferos eĉ pli grandan katastrofon... Prezidanto Dorcas skribis:

*Saluton gesamideanoj en Pakistano. Nome de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, mi sendas kondolencojn al vi ĉiuj, niaj amikoj, pro la granda tertremo kiu ĵus okazis en via lando. Mi vidis tian katastrofon antaŭ 35 jaroj en Limo, Peruo, kie mi helpis multajn homojn kiuj suferis terure. Niaj pensoj estas kun vi, inter la restaĵoj kaj ruinoj de la tertremo. Mi deziras ke vi memoru nian amikecon trans la mejloj. Elkore – Filipino.*

Filipo recevis respondon de Jawaid Eahsan la 10-an de oktobro kun dankoj kaj raportoj ke la Pakistanaj esperantistoj fartas bone.

Lusi Harmon

“If more and more people were to start learning Esperanto, we could live in harmony, with just a few wrong pitched notes”

This summer I went to my first *Universala Kongreso*, in Vilnius, Lithuania. It was the first time I had ever been to an Esperanto *Kongreso* outside of the U.S., and the first time I had been to Europe. I didn't know what to expect. I had spent hours speaking Esperanto with no English at my local club in Austin; I had corresponded by email with people on four continents; I had read whole novels in Esperanto. But in the U.S. almost every Esperantist I knew also spoke English natively. One sometimes wondered if the whole Esperanto experience wasn't an enormous, surreal, and very subtle prank. *The UK* cured me of that feeling.

I traveled with my son, who is 11, my daughter, who is 8, and my wife. My son comprehends Esperanto, but is quite a beginner. My wife and my daughter are even less experienced than him. We had already been in Europe for three weeks when we arrived, somewhat late, to the convention. My son attended the lectures, plays, and presentations with me.

The opening ceremonies and the first day impressed me with something I love about Esperantists: they seem to be both intellectual and high-minded without being phony. At least at this *Kongreso*, people disagreed

It's pretty amazing to see over 2000 people come to one place from all over the world and be able to communicate with each other. For only being a kid, I could not understand the more complicated lectures, but I could understand if someone asked me "How are you doing today?" and I could respond. Having everyone speaking one language might not be our biggest concern right now in the world, but sitting at a banquet table for two hours with people from Japan, Denmark, France, Germany, and the Netherlands, is a pretty interesting conversation.

Thanks to my "tour guide", a.k.a. my dad, I was able to really get into the jive of things. I might see this differently than other people, but I believe globalizing the world would help a lot in our modern day. Going to Lithuania for seven days was a pretty amazing trip. Not only is Vilnius a beautiful town, but I learned a lot at the




FOTO: LITOVA E-ASOCIO



Internacia arta vespero



FOTO: ALIAFLANKO.DE

was reserved for outside excursions. In the evening, there was often a single event for the entire *Kongreso*.

with each other in public, but they did not quarrel or bicker.

The meeting was organized into approximately five concurrent tracks of lectures, business meetings, and entertainment. Of these five tracks I was usually deeply interested in two of them. The mid-week day

The average age of the conventioners was older than I expected, but younger than the last *ELNA-Kongreso*; perhaps fifty. Many of the people seemed to be meeting old friends they had met before.

It was wonderful and frustrating to hear Esperanto spoken by so many different nationalities. I personally have a severe hearing loss, so understanding spoken speech, in English or Esperanto, is quite difficult for me. The lecture halls were often crowded and had insufficient amplification. I often could not understand what was said because I could not pick out the sounds. Nonetheless, I now understand that Russians, Italians, and Japanese all speak Esperanto with slightly different accents, but all can comprehend each other. Generally, the more experienced the speaker is, the more clearly they speak.

Many Esperanto associations use the *UK*, which is a moving pivot for all Esperantists, as a place to hold their business meetings. This gives the *UK* a much more buttoned-down feel than, I imagine, the *IJK* or other youth conventions. Personally, I enjoyed attending the business meetings of the *Internacia Scienca Asocio Esperantista* (ISAE) and the commission

same time.

If more and more people were to start learning Esperanto, we could live in harmony, with just a few wrong-pitched notes.

Kelvin B. Read, age 11



FOTO: RUSS WILLIAMS



FOTO: LITOVA E-ASOCIO



Dancado kun litova rokbando

Internacia arta vespero

for the Americas, but others might have preferred the entertainment.

The highlight of the convention for me was the banquet. I don't especially care for that kind of thing, but at the banquet my son and I sat with people from six different nations and three continents. We spoke about urban planning, public transport, and the non-Western traditional Japanese dress for an hour and a half. Of these people, only the Dutchman and the Dane and I could have conversed in English. This seemed to me a miracle, and part of the reason I had studied Esperanto in the first place. My head had known this was possible before; now my heart knows it.

There are two things I regret. Due to misunderstanding the schedule and bad

luck, I never got to meet my favorite author, Trevor Steele, who always seemed to have just been talking to whomever I was meeting. Secondly, my son's Esperanto was so weak that I constantly had to answer questions for

course, is not fully aware of what he experienced and how different it is than my own stifling upbringing in Tulsa, Oklahoma.

The conference had an associated children's *Kongreso*. I didn't consider sending my son to it, since in the first place I was nervous about letting my son camp away from us for a whole week in an unfamiliar country, and secondly his command of Esperanto wasn't great enough for me to be sure he could get along there. After seeing the children's *Kongreso*, I feel quite confident in it, and I think this was a missed opportunity for my son; he would have had a much better time at the children's *Kongreso*. My goal for the future is for him to learn enough Esperanto that he can participate in that.

Overall, the *Universala Kongreso* was the fulfillment of the experience that Esperanto promises: a profoundly international, world-wide group of people working and playing together in a common neutral second language. I wish I could share this hopeful and optimistic experience with every beginning American Esperantist; there is no stronger argument for Esperanto. If you have not yet done so, I recommend that you plan to attend an *UK* as soon as you are able.

Robert L. Read, PhD, age 40

## Southeastern Regional Esperanto Convention

The Esperanto Society of Metro Atlanta (ESMA) will be holding a southeastern regional Esperanto convention and courses March 31 – April 2, 2006 (Friday evening through Sunday afternoon) at Unicoi State Park in the beautiful north Georgia mountains, near the ersatz-Alpine village Helen. Although we're calling it a "regional" convention, everyone is invited!

Although the exact program has yet to be determined, we are plan-

ning to hold beginner, intermediate and (possibly) advanced Esperanto courses (depending on the amount of interest for each). And there of course will be cultural programs and ample opportunities to enjoy the tranquil natural setting. Also, if you have suggestions for the program, or want to contribute to the program, please contact us!

### Registration Fees:

Until November 30 – \$20  
 Until January 31st – \$25  
 After January 31 – \$30  
 At the door – \$35

Lodging must be reserved by 31

January to get the group rate; see the web page or send email for details. The cost is \$79/night for two people

For more information and for registration and other details, please contact Jim Henry at <jimhenry@pobox.com>; 770-300-0523; 4404 Mill Court, Duluth GA 30096.

### ESMA:

<<http://www.pobox.com/~jimhenry/esp/esma/sok2006/informo.htm>>

# Kiel Progresas Pasporto

*Kiam mi ricevos mian ekzempleron?*

The DVD version of *Esperanto: Pasporto al la Tuta Mondo* was inaugurated for members of ELNA at our national convention in Austin, Texas, in June. The first edition of the international version was inaugurated on Thursday, July 21 during the UK en Vilnius, Lithuania, this year.

Steve Wagenseller and Diana Babeck Weichert created a PowerPoint presentation, and, because of the "tickets" which Steve and Miko gave out for our presentation, we had a room-full. This, in spite of the fact that the most popular presentation of the convention – about "Vampiroj" by Jane Edwards, (the wife of Humphrey Tonkin) — was offered at the same time.

We had a "booth" during the UK where we used the white wall behind us to show scenes from the drama – or pictures of the actors. We also showed how the DVDs and CDs looked in the box we have for them, showed the written text and exercises, and managed to do a lot of work adding subtitles in the languages not already complete.

We also had conventioners from Japan, Korea, Italy, Russia, Hungary, Portugal, Sweden, Lithuania and Iran start on the arduous process of adding subtitles in their languages. We plan to have at least 12 languages in the final version.

Upon returning home, we prepared DVDs for all the ELNA members who had ordered them and mailed out about 15 copies. Then we discovered that while we were adding subtitles during the UK, we managed to include some errors which had previously been corrected, including



Steve Wagenseller and Jianping Zhao from *Radio Pekino* checking the Chinese subtitles

French subtitles appearing where Esperanto should have been. Therefore, we have had to re-edit the disks to replace the ones with errors.

**All orders should have been received by the time you read this article. If not, please let us know. Call or write the commissioner for *Pasporto*:**

**<lusiharmon@aol.com>, 2389 Thackeray Dr. Oakland CA 94611 – 510-531-8393.**

We have also started the process of making contracts with Esperanto organizations to produce the sets of DVDs and CDs in their own countries. Europe will be producing their own copies, as will China and Korea. In addition, we have made a contract with Ĝangalo, the Esperanto TV station in Brazil, to "stream" it over the net. It will not be copyable, but Ĝangalo will advertise the course, produce good copies, and sell them to Brazilians.



Miko Sloper, (the "father"), Lusi Harmon (producer) and Steve Wagenseller (the "detective")

Our audacious project seems to be reaching completion, but it keeps "morphing" into other related projects. Dictionaries are being created and additional songs are being written. We still need a book for inexperienced teachers with clarification as to the best way to advantageously utilize this modern adaptation of the "direct method". Another need we have now is for someone with time and talent to create a version for the blind. This would involve adding words to clarify what is happening. Are you interested?

Lusi Harmon

## Rezolucio pri Stanley Drake

Pro tio, ke

### Doktoro Stanley J. Drake

servis bonkore kaj sindone al la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko dum multaj jaroj, kaj

Pro tio, ke

D-ro Stanley J. Drake laboris multe kaj en kaj ekster la Movado por helpi multajn per siaj instrumaterialoj, sia tempo, kaj

sia sperto, kaj

Pro tio, ke

D-ro Stanley J. Drake kunlaboris kun multaj aliaj en la mondo per la organizaĵo La Internacia Societo de Amikeco kaj Bonvolo, kiu havas membrojn en ĉiu parto de la mondo,

Tial

la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko volas danki al **D-ro. Stanley J. Drake** pro

lia laboro kaj helpo al ELNA kaj al la Esperanto-movado, kaj deklari ke li estas

HONORA MEMBRO

de la **Esperanto-Ligo por Norda Ameriko**

Philip "Filipo" G. Dorcas

Aprobita unuanime la 12-an de junio, 2005, en Aŭstino, Teksaso.

# Kie Estas Usonaj Junulinoj?..

FOTO: ULF LUNDE



Dum la IJK en Kovrov (Rusio), 2004

**“Kio estas via profesio?” – “Programisto!” – “Ho plia komputikisto, bonvenon al la klubo!” (El subaŭskultita konversacio dum la kongreso en Aŭstino).**

Se vi iam partoprenis iun E-aranĝon en Ukrainio aŭ Rusio, vi ne povis ne demandi vin – kial en la ukrainia (rusia) E-movado mankas junaj viroj, kaj en la usona – junaj inoj?.. Ekzemple, en mia E-klubo en Kievo virinoj (junulinoj) estas kelkoble pli multenombraj ol viroj, kaj simila situacio estas ankaŭ en aliaj urboj de la lando.

Bedaŭrinde, mi ne povas elĉerpige respondi ĉi tiujn demandojn, ĉar ĝi estas tre komplika, sed jen kelkaj miaj personaj pensoj pri la afero. En Ukrainio, same kiel en multaj aliaj eks-sovetiaj landoj, virinoj ĝenerale estas pli socie aktivaj – verŝajne ekde la Dua Mondmilito, kiam ili devis transpreni multajn virajn taskojn pro foresto aŭ morto de multaj milionoj da viroj...

Virinoj en Ukrainio estas ankaŭ pli lingvemaj ol viroj. En fremdlingvaj fakultatoj kaj kursoj viroj estas tre raraj: en iuj klasoj entute ne estas viroj, ĉar ili ofte elektas teknikajn, komercajn aŭ jurajn kursojn. Ekzemple, en la grupo de mia fratino en la universitato (ŝi estas tradukisto de la franca) entute ne estis viroj, en mia grupo pri ĵurnalismo kaj redaktado/eldonado estis nur du viroj, unu el kiuj poste foriris de la universi-

tato. Ankaŭ en mia grupo pri la germana en Instituto Goeto entute ne estis viroj... En Ukrainio multaj homoj esperantistiĝas ne per la interreto, kiel ofte en Usono, sed pro la vid-al-vidaj E-kursoj: estas relative facile aranĝi E-kurson en universitato (plejparte oni varbas en la lingvistikaj fakultatoj), lernejo aŭ eksterlerneja kleriginstitucio. Do, pro tio ke multaj lernantoj de Esperanto estas lingvistoj aŭ lingvemuloj, jen ni havas tiom pli da virinoj ol viroj.

Antaŭ ol veni al Usono mi ja sciis ke la demografia situacio ĉi tie estas tute alia ol en Ukrainio – sed tamen eĉ por mi estis ioma surprizo ke mi estis ŝajne la sola virino inter la aĝoj 20 kaj 30 en la tuta kongreso en Aŭstino... Eble usonaj gejunuloj preferas viziti eksterlandajn renkontiĝojn?.. Ankaŭ la E-kunvenoj en Atlanto aspektas kiel tuta malo de tiuj en Kievo: al la klubkunsidoj en Ukrainio plejparte venas junulinoj – studentinoj, kaj nur kelkaj viroj, por la renkontiĝoj de E-Societo de Metropola Atlanto, male, venas plejparte viroj – mi preskaŭ ĉiam estas la sola ino – la nura escepto estas kiam kun iu el la viraj esperantistoj venas edzino...

Ankaŭ la aĝgrupoj en Ukrainio kaj Usono estas tre malsamaj: en Ukrainio nur tre malmultaj homoj en pensia aĝo aktivigas en la Esperanto-movado – kvankam kun kelkaj brilaj esceptoj. Nu, tio facile klarigeblas: la ekonomia situacio en la lando ne

estas bona, kaj la stato de pensiuloj en ĝi ofte estas malbona, se ne mizera. Bonŝance, homoj en pensia aĝo en Usono estas multe pli komfortaj ol en Ukrainio, kaj mi havis la impreson, ke la “plej granda generacio” (“Greatest Generation”) estas la plej aktiva en la usona E-movado. En tiu aĝgrupo ŝajne ne estas malegaleco inter viroj kaj inoj – kaj ŝajne virinoj eĉ pli multas. Mi ankaŭ kun ĝojo malkovris ke la “mezaĝa breĉo” en Usono apenaŭ ekzistas – almenaŭ kompare kun Okcidenta Eŭropo, kie la E-movadon plejparte konsistigas gejunuloj kaj pensiuloj, sen meza parto –dum la ELNA-kongreso en Aŭstino estis multaj homoj en la 30-aj, 40-aj kaj 50-aj jaroj.

Ŝajne, la respondo al la demando pri demografio rekte dependas de tio kiel kaj pro kio oni lernas Esperanton – en Usono tio okazas ĉefe pro la reto kaj ankaŭ dank’ al sciencfikciaj libroj. Sed ĉu estas aliaj kialoj? Kaj kial en la usona E-movado tiel (ŝajne) draste mankas neblankuloj?.. Ekzemple, dum la kongreso en Aŭstino, bedaŭrinde, estis eĉ ne unu neblankulo, kaj ankaŭ la sola aktiva nigrulo de la Esperanto-Societo de Metropola Atlanto (en Atlanto, interalie, 70% da loĝantoj estas nigruloj) estas esperantisto kiu translokiĝis en Usonon el Afriko... Por trovi respondojn al tiuj ĉi demandoj kaj aliaj demandoj kaj ekscii la eblajn solvojn por diversigi la demografion kaj en Usono kaj en Ukrainio, ni preparis etan enketadon inter usonaj kaj ukrainiaj esperantistoj. La demando por ukrainaj esperantistoj estis: “Kial en la ukrainia E-movado mankas junaj viroj”, kaj por usonaj esperantistoj – “Kial mankas en la usona E-movado junaj virinoj kaj ne-blankuloj”.

## Rigardo el Ukrainio

### Pli scivolemaj?

Mikaelo Lineckij, profesia esperantisto kaj instruisto (li instruas E-on al 10-12-jaraĝaj infanoj en la sesa klaso de liceo en Kievo) kaj muzikisto, supozas ke junulinoj en Ukrainio estas pli scivolemaj ol junuloj: “Ankaŭ por mi estas granda enigmo, kial en la E-movado en Ukrainio estas multe pli da junulinoj ol junuloj... En la liceo post fino de la sesa klaso apudas min nur la knabinoj... Klarigi tion mi ne povas. Verŝajne knabinoj estas pli scivolemaj en tiu aĝo... Se mi instruus en la okaj klasoj, eble la bildo estus iom alia.”

## La situacio en la ukraina E-movado estas la sama kiel en la socio...

Laŭ la opinio de Ĵenja Slovaĉevskaja, ankaŭ profesia esperantisto, instruisto kaj lingvisto, kiu instruas Esperanton en eksterlerneja infana kleriginstitucio en Kievo, Ukrainio, la situacio en la Ukraina E-movado estas la sama kiel en la socio: virinoj (junulinoj) estas tre aktivaj tie kie viroj (junuloj) ne sufiĉe aktivaj, ĉar viroj volas konservi la energion por “iuj gravaĵoj”: “Ni, kiel tiuj kiuj naskiĝas por doni kaj konservi vivon, ne povas permesi malviviĝi tion kion indas teni vivanta. Ĉar se ne ni – do kiu?.. Kaj viroj (junuloj) en Ukrainio pli emas pripensi ion kaj dubi – ĉu ili bezonas tion aŭ ne, ĉu ĝi estas utila aŭ ne, kaj krome – ĉu ili povas aŭ ne povas utiligi ĝin – eble, prefere eĉ ne komenci, por ne riski... La neproporcie granda forto de virinoj ĉiam estas rezulto de la malforto de viroj. Mi ne parolas pri viroj kiuj tamen riskis preni sur sin respondecon pri la afero, sed, bedaŭrinde, en nia socio ne tiom multas tiaj viroj. Kaj denove: kiu do, se ne ni?..”

### Trovi fianĉon?..

Jefim Zajdman, longtempa esperantisto-instruisto, emeritiĝinta programisto kaj esploristo pri la frua E-movado, gvidanto de klubo kaj ĉeforganizanto de muzika E-renkontiĝo por popularigi E-on al la ekstera publiko, opinias ke “eble la junulinoj lernas la lingvon por trovi fianĉojn”.

### Viroj tamen pli multas!

Paŭlo Moĵajev, postdiploma studento kaj instruisto (pri ĥirurgio), E-instruisto, muzikisto kaj tradukisto skribis ke li ne povas tuj konsenti ke junulinoj signife pli multas ol la junuloj: “Mi persone havas la impreson ke viroj ĝenerale kaj junuloj speciale estas tamen pli multaj ol virinoj kaj junulinoj. Kiel mi scias, tiu situacio estas tipa por tuta Esperantio, kaj la kialoj estas ja klaraj: viroj estas ĝenerale pli scivolemaj, pli memstaraj finance por povi partopreni E-aktivaĵojn, pli ambiciaj (do, Esperanto iusence estas por ili – almenaŭ por iuj – vica afero por pligrandigi sian memestimon), iom malpli ligitaj al familiaj zorgoj”. Paŭlo mem lernis Esperanton per la reto kaj li opinias ke lastatempe la plej grava afero kiu pligrandigas la kvanton de junuloj en la Movado kaj komunumo estas la interreto, dank’ al kiu eblas ne nur ellerni la lingvon, sed ankaŭ aktive praktiki ĝin: “Ja ne estas sekreto ke pri retaj kaj ĝenerale komputilaj aferoj la

junuloj okupiĝas pli ofte, pli aktive kaj eĉ pli sukcese ol la junulinoj”.

### Rigardo el Rusio Viroj en Rusio momente estas tre ekonomi-orientitaj

Katja Ignatjeva, Rusio/Svedio, tre aktiva esperantistino – eksa prezidanto de Junulara Esperanto-Asocio de Ĉuvaŝa Respubliko (Rusio), eksa Ĝenerala Sekretario kaj nuna Kasisto de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, povas paroli nur pri Rusio kaj ekskluzive pri sia persona impresado de la hejmurbo (Ĉeboksaro): “Mi vidas tri ĉefajn kialojn. Unue, ĝenerale la statistiko montras ke inoj inter loĝantoj de la urbo estas multe pli multnombraj ol viroj. Due, laŭ mi, temas pri scivolemo kaj kuraĝo. Viroj multe malpli facile kuraĝas provi ion novan – ili preferas fari nur la aferojn kiuj, laŭ la komuna opinio, estas iom “laŭmodaj”. Ili malpli facile kuraĝas havi novajn kontaktojn, teni novajn amikajn rilatojn. Trie, ĝenerale la intereso de viroj en Rusio momente estas tre ekonomi-bazitaj kaj do, Esperanto ne estas tiom evidenta ilo por pliriĉiĝi”. Katja aldonas ke certe estas aliaj kialoj kaj, krome – ne ĉie la situacio estas sama: “Mi scias ke en kelkaj aliaj urboj viroj kaj virinoj estas egalkvante reprezentitaj en E-klubo aŭ viroj kelkloke eĉ pli multnombraj”.

### Rigardo el Usono La reto kaj sciencfinkcio

Multaj el la enketitoj nomis la interreton kaj sciencfinkcion kiel gravajn kialojn kial tiom da usonaj esperantistoj estas viroj. Steve Brewer, vic-prezidanto de ELNA, profesoro kaj prezidanto de la E-Societo de Nov-Anglio, opinias ke ĝuste sciencfinkcio kaj la reto estas du el la plej gravaj kialoj: “Ili ambaŭ estas multe pli allogaj al viroj ol al virinoj. La reto nun havas ankaŭ multajn virinojn, sed por la unuaj dek jaroj (1984-1994, ni diru) estis kvaroble aŭ kvinoble pli da viroj ol virinoj en la reto”. Steve mem unue aŭdis pri Esperanto per la libro de Harry Harrison kaj unue lernis kaj uzis ĝin pere de la reto. Ankaŭ Chuck Smith, estrarano de TEJO, opinias ke la reto multe influas la demografian situacion en la E-movado en Usono.



Ukraininoj kun “Lenin” (dum la IJK en Kovrov)

### Ĉu Esperanto povas konkurenci?

Tracy Huber, aŭstinano, kunorganizanto de la ELNA-kongreso 2005, profesia masaĝisto, diras ke en Usono, krom uraganoj, kelkfojaj tertremoj, kaj aviadiloj flugantaj kontraŭ konstruaĵojn, oni kutime ne havas grandajn problemojn – konstanta malsato aŭ interna milito, ktp. – kiel en aliaj landoj, sed aldonas ke “al ni ĉiam estas multege da zorgetoj, kiel la pikiloj de kaktosoj, senĉese: ĉu la laboro iros al alia lando, ĉu ĉi tiu aŭ tiu nutraĵo estas malsaniga aŭ ne, ĉu la enspezo ĉi-monate sufiĉos por la elspezoj, ĉu iu ŝtelos personan informon por uzi ĝin akiri kreditkarton. Gepatroj zorgas pri la sekureco kaj sano de siaj infanoj, la prezo de ĉio plialtiĝas, la impostoj plialtiĝas, la enspezoj daŭras samnivele, pli da laboro ne helpas sed nepre devas daŭri... Multaj homoj el aliaj landoj diris al mi “usonanoj ĉiam laboras!”, kaj mi respondis “ni devas, aŭ ni iĝos kiel la senhejmuloj ĉe la stratkruĉiĝoj.” Nepre, senfine, senĉese, sen okazo por malstreĉiĝo. Do, nur la multaj distraĵoj kiel televido, muziko, filmo, komputilaj ludoj, ktp., donas iom da azilo de la senĉesa rivero de zorgetoj kaj laboroj. Ĉu Esperanto povas konkuri en tia medio? Ŝajnas ke ne. Sed, mi opinias ke estas sufiĉe da geusonanoj kiuj bezonas kaj bonvenigus la okazon, senti sin parto de ia “granda rondo familia.” Por ili, Esperanto povas esti la distraĵo bezonata. Do, kiel celigi la mesaĝon pri Esperanto? Tio estas mia laboro. Jen, ekzemple, estas aŭtoafiŝo de mi (tradukita Esperanten) ‘ESPERANTO: La Mondo Ĉe La Pinto De Via Lango.’”.



Dum malfermo de ELNA-kongreso en Aŭstino, 2005

### Simila allogas similon!

Unu el la kialoj kial ne multas mezaĝaj homoj en la E-movado en Ukrainio estas ke pluraj “junulaj” aktivaĵoj tute ne interesas ilin. Kaj samo validas pri “plenkreska” Okcidenta Eŭropo: ofte gejunuloj, unufoje vizitinte lokan klubon kaj trovinte tie preskaŭ senescepte grizharulojn, ne plu interesiĝas viziti ĝin denove. La samo, ŝajne, validas ankaŭ por Usono. Filipo Dorcas, la nuna prezidanto de ELNA, estrarano de Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto, fizikisto kaj inĝeniero, rimarkas: “Se ekzistas loka grupo aŭ landa asocio kiu enhavas plejparte unu specon de homoj, tio allogas pli da tiaj homoj. Kiam mi faris prezentadon pri Esperanto al la loka “Mensa” grupo, tio helpis tie, sed malhelpis en aliaj miaj grupoj. Ili, ne “Mensa”-anoj, simple opiniis ke Esperanto postulas grandan cerbon. Mi ne esprimis tion, sed tio estas impresio nur de la rilato kun mi kaj Mensa.”

Gary Grady, reelektita estrarano de ELNA (li estas ELNA- kaj UEA-membro ekde 1976), vicprezidanto de softvara kompanio kaj E-instruisto, diras ke similan gradon de blankeco aŭ vireco (aŭ la malon) oni trovas ankaŭ inter interesitoj pri sciencfikcio, partoprenantoj en kelkaj sportoj ktp: “La kialo ne estas ĉiam klara. Unu eble parta kialo estas ke sola virino aŭ sola neblankulo inter grupo de viroj kaj blankuloj sentas sin ne tute komforta kaj tial ne revenas, kaj do la grupo ne diversiĝas”. Li proponas ke ELNA, kunlabore kun lokaj grupoj, povus de tempo al tempo aranĝi

vizitojn al Usono de gravuloj el alilandaj E-movadoj, inkluzive virinojn kaj neblankulojn, kun helpo de lokaj grupoj aranĝi intervjuojn en publika radio kaj la gazetaro kaj vizitoj al lernejoj kaj universitatoj: “Povus esti ke vizito de Spomenka Štimec aŭ Anna Lowenstein instigus pli da usonaj virinoj interesiĝi pri Esperanto, kaj vizitantoj el Azio, Afriko kaj Latinameriko eble kaptus la atenton de membroj de rilataj etnoj en Usono”.

Li ankaŭ emfazas ke estas kelkaj bonaj kialoj celi aparte gejunulojn, kaj ne nur ĉar la usona movado bezonas pli da juneco: “La plejparto de esperantistoj ekinteresiĝas pri la lingvo kiel infanoj aŭ gejunuloj, kaj junaj interesitoj emas esti pli diversaj. Ekzemple estas multe da junulinoj kaj membroj de diversaj etnoj inter la studentoj de Esperanto en Nordkarolina Lernejo de Scienco kaj Matematiko”. Rilate tion, laŭ li, estus bone represi la romanon *Peter Jameson's Secret Language* de Sylvan Zaft kun pli bona kovrilo kaj donaci ĝin al kiel eble plej multe da lernejoj bibliotekoj.

### Gajnoj materiaj kaj nemateriaj

Ankaŭ materia flanko de la afero multe gravas en la demografia situacio – kaj en Usono kaj Ukrainio. Robert Read, aktivega membro de la E-klubo de Aŭstino, kunorganizanto de ELNA-kongreso en 2005 kaj nova estrarano de ELNA, pensas ke Esperanto, same kiel la sciencoj ĝenerale, estas plej alloga al homoj kiuj estas tre sekuraj en sia socia nivelo: “Same la fakoj de komputiko ĉe universitatoj ne ofte havas virinojn aŭ ne-blankulajn usonanojn.

Samtempe, virinoj nuntempe estas pli ol duono de la ĉeestantoj de juraj lernejoj (angle “Law School”). Mi supozas ke tio estas pro tio ke esti advokato estas altnivela dungo en nia socio, do kiam ni malfermis ĉi tiun profesion al virinoj, ili plenigis ĝin. Oni, plejparte, ne gajnas socian estimon nek monon per la sciencoj (kompare al advokato!), kaj, same, Esperanto ŝajne donas plejparte abstraktajn donojn. Pro ĉi tio, mi supozas estas malfacile varbi virinojn kaj ne-blankulojn al Esperanto. Sed mi ne estas memfida pri ĉi tio; eble estas pli simple: ili ne legas sciencfikcion kaj ne konas la ideon?..”

Ankaŭ Steve Brewer nomis ekonomion unu el la kialoj de la demografio en la usona E-movado: “Mi kredas ke blankuloj, pro siaj ekonomie privilegiaj pozicioj, pli kapablas lerni ion kio vere neniel servos por gajni monon aŭ konkurenci ekonomie. Aliaj eble ne havas tiun lukson...”

Filipo Dorcas opinias ke mono kaj tempo estas gravaj kialoj kial oni lernas aŭ ne lernas Esperanton: “Esperanto estas afero en la vivo kiu postulas tempon. Certe, la lingvo taŭgas por iu ajn kiu deziras bonan kaj belan komunikilon. Sed tio havas koston. Estas pli facile, laŭ mi, por iu kiu havas monon aŭ tempon havi Esperanton kiel ŝatokupon.”

### Ĉu tio ne “forpuŝos” la anglan?..

Steleto Kim – denaska esperantistino (ŝi ankaŭ instruis Esperanton ĉe la Universitato de Kalifornio en Berklio de 1999 ĝis 2003), kiu laboras kaj daŭrigas post-diploman studadon en la fako de edukado, respondis la demandon pri la rasa malekvilibro jene: “Ne-blankuloj ofte estas eksterlandanoj, kaj mi tro ofte aŭdas pri gepatroj kiuj ne instruas la indiĝenan aŭ nacian lingvon pro la (malĝusta) penso ke ĝi malrapidigos la lernadon de la angla. Tiuj gepatroj puŝas la infanojn lerni la anglan, kaj eĉ tio ne tiom sukcesas (estas polemika propono sur la kalifornia balotilo por novembro – ĉu permesi hispanparolantojn fari ekzamenojn en la hispana aŭ ne?). La angla ne estas facila lingvo, kaj niaj instruistoj ne bone instruas (alia ĝenerala opinio).”

### Apatia generacio

Joel Amis konsentas ke eblas parte klarigi la proporciojn de junuloj al junulinoj per la populareco de sciencfikcio kaj komputilaj aferoj. Tamen li rimarkas ke intensiĝas la problemon la malmulteco de gejunuloj entute en la (organizita) usona movado: “Se estus pli da gejunuloj entute,



FOTO: STANO MARĖEK



Rusinoj dum la UK en Gotenburgo

la manko de junulinoj ne estus tiel forte sentebla, eĉ se junulinoj restus relativa minoritato. Ekzemple, se estus 100 gejunulinoj en iu kongreso kaj nur 15% estus junulinoj, tiam estus tamen 15 junulinoj. Sed se ĉeestus nur dek gejunulinoj entute, kaj same nur 15% estus inoj, tiam estus nur unu aŭ du junulinoj. Do, simple la ĝenerala malmulteco de gejunulinoj intensigas la impreson de “manko de junulinoj”.

La malmultecon de gejunulinoj Joel klarigas jene: “Ŝajnas al mi ke la ĉefa problemo estas generacia apatio. Ne nur nia Movado, sed ankaŭ aliaj neprofitcelaj organizoj suferas de tia apatio. La ĝenerala inklino de la nuna junularo ne estas al idealismo (male de la 1960-aj jaroj, ekz.), do lerni lingvon kaj aliĝi al movado el idealismaj motivoj ne allogas ilin. Multaj gejunulinoj eĉ ne havas fortan emon voĉdoni, ĉar ili taksas politikon afero kiu ne koncernas ilin kaj ne helpas ilin materiale. Do, se malfacilas instigi gejunulinojn interesigi pri tio kiu fariĝas la prezidento de Usono, nur imagi kiom malfacile estas interesigi ilin pri iu lingvo (estas foje miraklo kiam usona junul[in]o interesigas pri ajna lingvo entute!) kaj movado kiu (ŝajnas al ili) donas neniun materialan profiton. Kaj, bedaŭrinde, ĉi tiu apatio koncernas gejunulinojn de ambaŭ seksoj kaj ĉiuj rasoj.”

Tamen Joel esperas ke, kiel kutime okazis en la pasinteco, idealismo kaj materialismo ciklas de generacio al generacio: “Eble en la venontaj jaroj venos pli idealisma generacio por kiu Esperanto estos pli alloga”.

### Ne emas lerni aliajn lingvojn

Steleto Kim supozas ke en la “nelernemo de Esperanto” grave kulpas tio ke usonanoj ĝenerale ne emas lerni aliajn lingvojn: “Oni povas kompari la valoron de lingvoj en Usono kaj Eŭropo ene de la elementaj lernejoj. En Usono, lernejoj ne devas fari

lingvajn kursojn ĝis la alta lernejo – kaj eĉ tiam, nur unu aŭ du jarojn, tute ne sufiĉe por akiri fortan lingvan kapablon. En Eŭropo, ne estas malofta afero renkonti homon kiu parolas tri, kvar, aŭ kvin lingvojn. Multaj usonanoj havas iom strangan pensmanieron (mia patro nomas ĝin “kultura imperiismo”), kredante ke ĉiuj en la mondo parolas la anglan. Do, kial lerni aliajn lingvojn? La angla estas la internacia lingvo! (pensas ili). Kaj iuj usonaj turistoj eĉ koleriĝas kiam fremdulo ne parolas la anglan”.

Laŭ la opinio de Steleto Kim, en Usono tre mankas ĝenerala scio pri Esperanto, kaj pro tio mankas interesiĝo: “Se mi menciis Esperanton en ĉambro da homoj, eble unu aŭ du el dek sciis kio ĝi estas. Pligrandigi la nombron de esperantistoj (viraj, virinaj, blankaj, neblankaj) estas grandioza tasko en lando kie ekzistas tiom da land-amo (kaj speciale nuntempe, malamo kaj timo de la eksterlando), kaj diversigi la Esperantopopolon estus, laŭ mi, eĉ pli malfacile.”

### Kiel diversigi?

Robert Read pensas ke por allogi pli da virinoj kaj neblankuloj necesas uzi konkretajn “materialajn” aferojn kiuj povas esti interesaj por ili. Li vidas la jenajn ĉefajn manierojn diversigi la demografion de la usona esperantistaro, kvankam li preferas ekscii kion pensas virinoj kaj neblankuloj pri la afero: “Unue ni devas ligi la lernadon de Esperanto kun konkreta utilo por junaj neblankuloj. Ekzemple, ĉu ni rajtas diri ke sukcesi en la AAIE-ekzamenoj vere faciligus la kandidatiĝon al universitatoj? (Mi opinias ĝenerale ke jes, ĝi estas bona por la vivresumo kaj kandidatiĝilo, sed mi preferus ekscii tion de la universitatoj mem.). Due, ni devas emfazi la propedeŭtikan efikon de E-o por la lernado de aliaj lingvoj. Trie, por virinoj, ĉu ni havas por-

virina-literaturo (angle: “chick-lit”)? Ĉu ni devas emfazi ke E-o estas bona ilo por vojaĝado? Laŭ mi, pli da virinoj revas pri vojaĝo al Eŭropo ol viroj, sed mi ne certas...”

Steve Brewer pensas ke diplomo de Akademio Internacia de Sciencoj de San-Marino ankaŭ povus allogi homojn: “Mirigis min, kiam mi partoprenis la finajn ekzamenojn de polaj studentoj pasintjare kaj vidis ke el Pollando estis multaj junaj esperantistinoj. Mi neniam vidis tiom da ne-grizharaj esperantistinoj en unu loko antaŭe. Ili uzis Esperanton por ricevi internacian diplomon. Ili kredis ke per Esperanto, ili plibonigis siajn ekonomiajn eblojn. Se oni pretus oferti tion al homoj en Usono, povas esti ke Esperanto estus pli alloga al pli diversaj homoj en Usono”.

Alia ebleco diversigi la demografion de usonaj esperantistoj estas pli multe instrui Esperanton en lernejoj. Julie Spickler, nova estrarano de ELNA, prezidanto de loka klubo en San-Franciska regiono, opinias ke se ni iam ajn povos enirigi Esperanton en la bazlernejojn, tio verŝajne helpos: “Sed pro tio, la ĝenerala kompreno ke Esperanto ekzistas, kaj kial ĝi estas, kiel verkis Claude Piron, la bona lingvo, devas plialtiĝi”.

Ellen Eddy, organizanto de la Nord-Amerika Somera Kursaro, levis la demandon pri demografio en la Usona E-movado dum la paŭzoj en la NASK-plankunsido: “Ni diskutis la pasintajn NASK-ojn kaj konstatis ke la plejmulto de junaj virinoj partoprenis en 2000 (nia lasta jaro ĉe SFŜU) kaj 2001 (la jaro ĉe Universitato de San-Francisko). Post la translokiĝo al SIT, la nombro de partoprenantoj duoniĝis, kaj junaj virinoj preskaŭ malaperis. Ĉi-jare, Sara, kiu havas 17 jarojn, venis de Novhampŝiro kaj estis la sola junulino. Dum la planado de NASK 2006, ni diskutis manierojn allogi pli da universitataj studen-

FOTO: ĴENJA AMIS



Aŭstinaj ĉeforganizantoj de la kongreso ricevas ĉies aplaŭdojn pro la bona organizado

toj. Ni intencas celi tiujn kiuj havas interenson pri lingvoj aŭ lingvistiko. Ĉu la sama kvanto de junulinoj kiel junuloj interesiĝas pri tiuj fakoj? Ni vidos.”

### “Ni ne maltrankviliĝu pri statistikoj, sed ni antaŭenigu niajn celojn!”

Enrique Ellemberg, longtempa Esperanto-instruisto, konsentas ke en ELNA estas malmultaj junaj virinoj kaj nigrujoj, sed aldonas ke malmultas ankaŭ junaj viroj... kaj, bedaŭrinde, estas malmultaj homoj entute. Li pensas ke junaj viroj pli facile vojaĝas al la renkontiĝoj ol la junaj virinoj, kaj pro tio ili pli ofte troviĝas en renkontiĝoj: “Ni bezonas pli da esperantistoj... de ĉiu aĝo kaj ĉiu sekso, de ĉiu etno kaj koloro. Mi same laboras por esperantistigi anglaparolantojn kaj hispanparolantojn. Bedaŭrinde, mi havas malmultajn lernantojn, kaj kelkaj loĝas en aliaj landoj. Mi provos esperantistigi studentojn – unue universitatanojn kaj eble mezlernejanojn!”

Ankaŭ Steleto Kim opinias ke simple tre mankas homoj: “Ĉu malmultas junaj virinoj pli ol junaj viroj en la usona Esperantomovado? Mi eble ne tion observis ĉar simple tiom malmultas gejunuloj – ne, esperantistoj! – en Usono. Kiam mi instruis Esperanton en la Universitato de Kalifornio ĉe Berklio, niaj klasoj estis sufiĉe miksitaj. Interese, plejparte niaj lernantoj estis studentoj de matematiko aŭ ekonomiko aŭ, kompreneble, lingviko. Kaj, plejparte, tiuj studentoj estis viraj. Tamen, mi havis la impreson (de psikologiaj studadoj) ke virinoj pli bone komprenas kaj lernas lingvojn... do miaj spertoj ne donas iajn ajn inteligentajn teoriojn, ĉu!”

Same Filipo Dorcas opinias ke ni simple

bezonas pli da membroj: “Ni devas starigi la punkton ke Esperanto estas por ĉiuj, – ĉies lingvo, ĉies Esperanto. Ni povas montri la diversecon kiun ni jam havas en nia membraro de ELNA kaj en lokaj grupoj. Ni povas internaciigi niajn kunvenojn, eĉ pli forte ol ili jam estas. Ni ne maltrankviliĝu pri statistikoj, sed ni antaŭenigu niajn celojn al pli aktiva asocio, laŭ la bazaj ideoj de la lingvo. Se ni faros tion, ĉio estos en ordo fine de la tago. Ni povas preparoli la statistikojn kaj kiel ni pli bone kunlaboru, sed mi kredas je la bono de la lingvo. Tio estas nia genia bazo, senrigarde al la kvanto de blankuloj, neblankuloj, virinoj, viroj, junuloj, maljunuloj, spertuloj, nespertuloj, saĝuloj, frenezuloj, geniuloj, aŭ eĉ idiotoj. La lingvo sukcesas kaj sukcesos!”

### Evidenta, sed ne katastrofa!

Don Harlow, la direktoro kaj longtempa laboranto de la CO de ELNA, konsentas ke la demografia situacio en ELNA (se ne en la tuta usona movado) estas malsama ol tiu en Usono ĝenerale: “Sed antaŭ ol trovi solvon, oni devos iom esplori la problemon. Unue, ĉu la problemo estas tia, kia vi prezentas ĝin? Almenaŭ en ELNA troviĝas sufiĉe multaj homoj kiuj devenas de Hispanlingvujo (ekz-e, en la Estraro troviĝas almenaŭ du tiaj homoj, el Meksiko resp. Kubo).” Don Harlow certas ke la malmulteco de junaj virinoj estas pli evidenta, sed eble ne katastrofa: “En nia datumbazo, el la membroj de 2005 por kiuj ni havas naskiĝdatojn kaj kiuj montriĝas maksimume 25-jaraj, proks. triono estas virinoj (laŭ mi, tiu proporcio kompreneble devus esti pli alta). Pri la nuna situacio de nigru-

joj en la usona E-movado, mi povas diri tion – mi nur memoras ke kiam mi aliĝis al la klubo en Losanĝeleso antaŭ 44 jaroj, la kasisto estis nigrujo (Bob Moore) kaj almenaŭ unu juna membrino ankaŭ estis nigra (Marcia Connerley). Sed povas esti ke la usona movado intertempe pli “blankpaniĝis” ... se jes, tio ja estas bedaŭrinde. Sed ĉar ni ne havas “rasajn” informojn pri niaj membroj, mi ne povas certi pri tio, almenaŭ rilate ELNA-n.”

Kaj kion VI opinias? La redakcio invitas ĉiujn dividi sian opinion kun anoj de ELNA surpaĝe de **Esperanto USA!**

*Koran dankon al ĉiuj kiuj partoprenis en la enketado! La temo de la venonta enketado estos: “Ĉu prospero de Esperanto dependas de la ekonomia situacio en la lando?” Esprimu vian opinion – skribu al la redakcio!*

preparis Ĵenja Amis

FOTO: ULF LUNDE



Dum la IJK en Kovrov

## Redakcia Geedziĝo!

Sabaton, la 7-an de majo 2005 en Atlanto, Georgio, geedziĝis **Kontakto-redaktorino** (kaj **TEJO Tutmonde-vicred.**, kaj nun vicred. de Esperanto USA) Ĵenja ZVEREVA kaj **TEJO Tutmonde-redaktoro** (kaj **Kontakto-vicred.**, kaj nun redaktoro de Esperanto USA) Joel AMIS (ambaŭ ELNA-anoj). La ceremonio okazis en la Atlanta Loĝio de la Rozkruca Ordeno, AMORC, en la ĉeesto de parencoj, esperantistaj amikoj, kaj aliaj rozkruccanoj.



FOTO: HARVEY AMIS

Kun esperantistaj amikoj: Sean Johnson, Chuck Smith, Randy Dean kaj Henry Spehar

# Esperanto Available to Everyone

*How you can help put Esperanto books on public library shelves*

**When I went off to college in Pasadena, a few years ago, not too many months after I matriculated my classmate Gene Fellner and I looked up, and visited, UEA's *ĉefdelegito* in the U.S., at that time Donald Parrish who lived with his wife in Los Angeles. Don in turn put us in contact with the Esperanto Club of Los Angeles (about whose existence we had known nothing), and from that time I participated in most meetings of the club until I graduated a few years later.**

Unfortunately, public transit in the L.A. basin was not, at that time, very convenient. Luckily, Don put me in touch with a neighbor of sorts, a patent lawyer named Bill Glenny who lived in the upscale suburb of San Marino just south of Pasadena. After that, six or eight times a year Bill would go out of his way to pick me up and drive me into downtown L.A. for our meetings.

William W. Glenny was born in 1916. He left us in 1989. He was one of the major motors of the Esperanto Club (later Association) of Los Angeles, and during his last years perhaps *the* major motor. He was also, at one time or another, and if I remember correctly, a member of ELNA's Board of Directors. He spoke Esperanto fluently, and was otherwise one of the most competent people it has been my privilege to know. The entry for him in the Esperanto Wikipedia is, IMHO, shamefully short, but we should perhaps be thankful that he's remembered at all in a document that only came into existence almost a decade and a half after his death. And perhaps someone who has read this and who also knew him can go in and add some information [http://eo.wikipedia.org/wiki/W.\\_W.\\_GLENNY](http://eo.wikipedia.org/wiki/W._W._GLENNY)).

Not long after Bill died, someone decided to honor him by establishing an ELNA fund in his name. The purpose of the Glenny Fund (Fonduso Glenny), it was decided, would be to place copies of David Richardson's book "Esperanto — Learning and Using the International Language" in public libraries around the

country. Since that time, people have contributed, not rapidly but consistently, to the Glenny Fund. Currently it contains almost \$1,600 dollars. Given that it costs about \$12 to provide a copy of the book to a library, that's enough for about 130 books.

While it is relatively easy for the Central Office to receive and process your donations to the Glenny Fund, it is much more difficult for the CO to spend them. It would not be impossible for the Director to take time out of his busy day to visit the occasional library here in California's East Bay and convince its librarian to put a copy on the shelf, but the Glenny Fund doesn't exist just to distribute a few books here in the East Bay; its purpose is to make them available around the country. So it would be a great help if all those members who have contributed and will, one hopes, continue to contribute to the Glenny Fund (thanks to all of you!!!) would also take an additional step and make sure that a copy gets into their local library.

How to do this? My recommendation, which I've discussed with our treasurer Bill Harris, would be as follows:

(1) Check to see whether, by some chance, your library (\*) already has a copy on its shelf. That will be in the 400 section (under the Dewey Decimal system), either very early (408.96 or thereabouts) or, more likely, somewhere in the 490s. If it does, you don't need to do anything else. If you don't find one sitting there, don't forget to check the card catalog (these days more likely to be electronic than physical), on the off-chance that the library has it, but that it's currently checked out.

(2) If the library *doesn't* have a copy, hunt up a librarian and talk to her/him about the possibility of their getting one. If you yourself have a copy, you might want to take it along and show it. If you don't, here's a description:

Richardson, David: Esperanto — Learning and Using the International Language. Bound, 367 pages. ISBN 0-939785-06-4. Includes: four chapters on

the history of the language problem and Esperanto (approx. 60 pages); a ten-lesson course in Esperanto, including the usual grammar explanations, vocabularies, drills, exercises and practice dialogues (approx. 110 pages); keys to the dialogues and exercises in the course; a heavily annotated reading section for the student who wants to go on (approx. 130 pages); a four-page bibliography for the more serious student; a fairly complete (roughly 4000 words) Esperanto-English vocabulary; and an index.


(3) If the librarian shows interest, and indicates that the book would indeed be shelved for the occasional interested patron (not sold off the following week for ten cents in a Friends of the Library book-and-cake-sale), suggest that he or she write to us (ELNA, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530) asking for a copy of the book and mentioning the Glenny Fund as a source. It is preferable, I think, that the librarian ask for the book, rather than for you yourself to do it, since that will give him or her a somewhat greater personal interest in keeping it once it arrives.

Again, contributing to the Glenny Fund and making sure that those contributions get spent are equally important activities, and I hope that you won't stint on either of them — at this point in time, particularly on the second. I look forward to hearing from your local librarians. I thank you for this, and I'm sure Bill Glenny, who would not have hesitated for a moment to make sure that the San Marino library had a copy on *its* shelf, would thank you, too.

(\*) Bill Harris pointed out to me that there's nothing to prevent you from visiting libraries in neighboring towns or areas, either.

Don Harlow  
Director of the Central Office  
Esperanto League for North America

FOTO: JENJA AMIS



Jim Henry dum ELNA-kongreso en Aŭstino, prelegante pri la organizado de kongresoj

## Kiel Organizi Kongreson?

Tio ĉi estas la komenco de serio de artikoloj pri organizado de Esperanto-kongresoj, specife de landaj kongresoj de ELNA, sed ankaŭ de regionaj kongresoj. Ĝi baziĝas sur la kongresa manlibro de ELNA, kiu troviĝas ĉe <http://www.pobox.com/~jimhenry/esp/esma/planoj.htm>. La originalan gvidilon verkis Frank Helmuth, Cathy Schulze kaj Bill Harmon; Ellen Eddy reviziis ĝin. Jim Henry plu reviziis kaj multon aldonis. Multaj aliaj homoj, ĉefe inter la lokaj kongresaj komitatoj de 1999-2005, donis konsilojn por plibonigi ĝin; iliaj nomoj troviĝas en la reta versio.

Se vi pensas ke eble via loko grupo povus organizi ŝtatan, regionan aŭ landan kongreson, vi estas bonvenaj kontakti min, Jim Henry ([jimhenry@pobox.com](mailto:jimhenry@pobox.com)), por demandi pri aferoj kiujn la artikoloj aŭ manlibro ne klarigas kaj peti konsilon pri viaj specifaj cirkonstancoj. Mi esperas ke ĉi tiu serio instigos al pli multaj lokaj grupoj organizi kongresojn kaj fari ilin pli efike. – Jim Henry

### Frua Planado

Loka Kongresa Komitato (LKK) formiĝas en kaj ĉirkaŭ la kongresa urbo, unu jaron, aŭ prefere multe pli frue, antaŭ la kongreso. Tiuj homoj esploru pri la lokaj eblecoj kongresi kaj elekti kongresejon, ĉu hotelon aŭ universitaton. Ĉiu kiu parolas al hotelistoj aŭ universitataj stabanoj skribu taglibreton pri la telefonaj konversacioj\* (kaj poste personaj vizitoj), por registri la faktojn – la prezoj por ĉambroj kiujn ili menciis (ekzemple) kaj kiu respondecas pri kio. En la unua periodo eble la LKK dividu liston de hoteloj kaj universitatoj inter si, kaj ĉiu LKK-ano kontaktu plurajn ejojn por demandi pri haveblaj kunvenĉambroj, prezoj kaj datoj kiam haveblas la ĉambroj.

Dum la unua esploro pri kongresejoj, esploru pri multaj per TTT, tiam telefonu aŭ retroŝtu al la ŝajne taŭgaj por havigi al vi pli bonan ideon pri iliaj kunvenĉambroj, prezoj ktp. Tiam sendu fakse aŭ retroŝte leterojn petante skriban proponon de tiuj kiuj laŭ la telefonaj konversacioj ŝajnas havi taŭgajn ĉambrojn ktp. Tiuj leteroj detaligu la bezonojn de la kongreso rilate al ĉambroj, tempoj kaj servoj (vi povas uzi kiel modelon leteron al la Ramada Inn Atlanta\* de Jim Henry en 1999).

Interparolu pri viaj trovoj kaj vizitu la lokojn kiuj ŝajnas plej taŭgaj. Elektu kongresejon (ni diru, ekzemple, hotelon) kaj elektu unu LKK-anon por ĉefe respondeci pri la hotelkontakto, kiu negocos pri la hotelkontrakto, dum la aliaj LKK-anoj faros aliajn aferojn (ekzemple, la buĝeton, aliĝilon, informfolion). La buĝeton, proponitan kotiz-tabelon kaj malnetan hotelkontrakton oni sendu al la Estraro de ELNA por aprobo\*. Kiam la Estraro

aprobas kaj la hotelkontrakto ŝajnas preta, la negocanta LKK-ano petu la hoteliston sendi la kontrakton al la Centra Oficejo (CO) de ELNA por ke la direktoro subskribu ĝin.

Je komenco de la planado, faru retroŝtan listgrupon, ĉe Yahoo Groups aŭ alia listoservo al kiu iu en la LKK havas aliron. En tiu listo membru ne nur la LKK-anoj, sed ankaŭ la direktoro de la CO, la redaktoro de *Esperanto USA*, la Komisiito pri Kongresoj kaj eventuale aliaj homoj kiuj volas helpi al la LKK. (En marto 2004 ni diskutis la ideon havi unu daŭran listgrupon, en kiu membru la LKK de la tuj okazonta kongreso kaj la LKK de la postjara kongreso. Tiel la LKK-anoj povus pli facile interŝanĝi ideojn kaj konsilojn. Sed ni decidis ke estus iom ĝene miksi la aferojn de du jarkongresoj. Do, ni faru po unu liston por jarkongreso. Sed homoj de unu LKK povas membri en la diskutlisto de alia, por lerni de la spertoj de aliaj, aŭ por foje konsili el sia propra sperto.)

Eble utilas havi ankaŭ kongres-planan vikion, en kiu vi povas registri la decidojn faritajn en la retroŝta listgrupo kaj dum personaj kunvenoj, krom listoj de taskoj jam faritaj kaj ankoraŭ farendaj, kun indikoj pri tio kiu respondecas pri ili. Vi povas konsulti la vikion de la aŭstina kongreso en 2005\*, kiun ni fakte ne uzis tiom multe kiom ni povintus.

Post la unua periodo (kiam la ĉefa kaj preskaŭ nura devo estas trovi kongresejon), la LKK kaj la Komisiito pri Kongresoj varbu helpantojn el la pli vasta regiono ĉirkaŭ la kongresejo kaj aliaj regionoj de Usono. Tio ĉi povos helpi rilate al diversaj taskoj kiuj ne postulas proksimecon al la kongresejo: ekzemple

fari kongresan retejon, analizi la aliĝilojn, verki aŭ redakti la kongresan libreton, varbi prezentantojn kaj gvidantojn por la programo, skribi invitleterojn por alilandanoj kiuj bezonas vizojn ktp. Helpantoj estos bezonataj ankaŭ dum la kongreso mem; por tiuj kiuj volas volontuli povas esti indiko en la aliĝilo\*.

### Elekti Kongresejon

Depende de la lokaj kondiĉoj, kongreso okazu aŭ en kolegio/universitato, aŭ en hotelo, aŭ en kongresa centro kun apuda hotelo. La elekto de bona kongresejo estas plej grava decido en la sukceso de la kongreso. (En la sekvantaj alineoj, por “hotelo” legu ĉiam “hotelo aŭ universitato”.)

Gravaj konsideraĵoj:

- Proksimeco al publika transporto.
- Proksimeco al restoracioj kaj taŭgaj celoj por ekskursoj\*.
- Interna aranĝo – ĉu la loĝejaj ĉambroj estas proksimaj al la kunvenaj ĉambroj? Ĉu la kunvenĉambroj estas proksimaj unu al la alia? Prefere la loĝado kaj kunvenoj estu en unu konstruaĵo, kaj ĉiuj kunvenĉambroj estu laŭeble proksimaj unu al la alia.

- Komplezema hotel-administrejo – se la hotelistoj ne respondas rapide al telefonvokoj, tio ne estas bona signo! Nepre vizitu la hotelon, vidu propraokule la kunvenĉambrojn kaj konatiĝu persone kun la hotelisto kiu respondecas pri kongresaj rilatoj antaŭ ol fine elekti lokon.

La LKK devas prizorgi la sekvantajn aferojn. Multajn el ĉi tiuj punktoj oni traktu en la hotelkontrakto.

- Malgranda ĉambro por la aferkunsido de la Estraro (ĝi devas havi sufiĉajn sidlokojn ĉe tablo(j) por la tuta Estraro plus kvar

funkciuloj, plus kelkaj sidlokoj (kiuj ne nepre devas havi tablon) por observantoj.

- Loko por registra tablo. Ĝi estu en bone videbla loko, ekzemple, la enira salono de hotelo. Oni bone direktu homojn al tiu tablo en la lasta antaŭkongresa bulteno\*.

- Pli grandaj ĉambroj por aferkunsidoj, prelegoj, diskutrondoj kaj ekumena diservo. Eble unu granda ĉambro (por la Solena Malfermo, distra vespero kaj Solena Fermo), kiu estas dividebla en du aŭ tri partojn per moveblaj vandoj. [La nombro de partoprenantoj en ELNA-kongreso variis en la lastaj kvin jaroj de 50 ĝis 95 homoj. Do, ni pretigu spacon por 100 homoj, sed buĝetu, por ne malprofiti, ke ni havos nur 50 homojn.]

- Spaco por la libroservo\*; minimume kvar tabloj (prefere ĝis dek, se haveblas tabloj, kaj spaco por ili), kun longeco ekde 8 futoj. Tiu ĉambro devas esti ŝlosebla. La stabanoj de ELNA mem havu la ŝlosilojn kaj ne devu peti de la hotelistoj kiam ajn ili deziras malfermi aŭ fermi la libroservon.

- Granda ĉambro (eble la sama kiel por Solena Malfermo ktp, sed kun alia seĝaranĝo) por Interkona Vespero.

- Manĝetoj por la Interkona Vespero.

- Bankedo, se estas konvena. (Ne devas esti en la kongresejo mem; foje estas en restoracio. Sed prefere ĝi estu tre proksima al la kongresejo kaj loĝejoj.)

- Manĝoj – se eblas, komune aŭ en la kongresejo aŭ en ĝia proksimeco. Se la kongreso estas en universitato, foje eblas aranĝi ke la kongresanoj povu manĝi en la universitata manĝejo. Alie, la LKK povas aranĝi kunajn manĝojn en certaj restoracioj proksime al la kongresejo; anoncu, ekzemple, ke “ni kunvenos en certa loko por kune piediri al hinda restoracio je la 12:00”. Estus ankaŭ bone se iu en la LKK farus liston de restoracioj en la kvartalo kun priskriboj, (mal)multekosteco, horoj, vojklarigoj ktp., kaj metus tiujn informojn en la kongresan libreton.

- Kafservo (kun teo kaj aliaj trinkaĵoj) en la mezaj partoj de la matenoj kaj posttagmezoj, kaj okaze de eventualaj publikaj kunvenoj.

- Duontaga ekskurso\*, se estas konvena.

- Loĝejoj, kiel eble plej malmultekostaj. En la hotelkontrakto estu mendo de certa nombro (ĉ. 75) de dormoĉambroj por ĉiu punkto de la kongreso, kaj kelkaj ĉambroj (eble 13: por la estraranoj, funkciuloj kaj Direktoro) la tagojn antaŭ kaj post la kon-

greso. Indiku kiel identigos sin la petontoj de tiuj ĉambroj. Ekz., iu ajn kiu mencias “Esperanto convention” aŭ “Esperanto League” aŭ “ELNA” devus ricevi la ĉambron kontraŭ la kongrese malalta prezo. La dato ĝis kiu la hotelo rezervos la ĉambrojn por kongresanoj estu klare indikita.

Kutime hoteloj insistas ke ili mem provizu la kongreson per ĉiuj manĝoj kaj trinkaĵoj; se la kongresanoj alportas proprajn, okazas “corkage charge” pli-malpli egala al la prezo se la hotelo mem disponigus la manĝojn. Sed foje oni povas havi esceptojn al tiu regulo; ni en Atlanto en 2000 provizis la babilejon per propraj manĝoj\*, kun permeso de la hotelistoj.

Kutime en la hotelkontrakto estas indikita minimuma nombro de “ĉambro-noktoj” kiujn devas mendi la kongresanoj, kaj provizora prezo por la kunvenĉambroj. Se ne sufiĉe da kongresanoj luas ĉambrojn, ELNA devos pagi la indikitan prezon por la kunvenĉambroj; sed se oni luas sufiĉan nombron de ĉambroj dum la kongreso, ELNA pagas nenion por la kunvenĉambroj, nur por la manĝoj. Tian kontrakton oni tamen evitu, se eblas, ĉar lastatempe hoteloj proponas eĉ pli malaltan prezon en la interreto, kaj saĝuloj kiuj mendas sian hotelĉambron rete ne kalkuliĝas en la nombro de ĉambro-noktoj.

Kromaj petoj al la hotelistoj:

- Permeso meti afiŝon kun la taga horaro ekster ĉiu ĉambro kaj direktaj afiŝoj en la salonoj kaj koridoroj por ke kongresanoj povu trovi la kunvenĉambrojn.

- Mapo de la ĉefetaĝo (aŭ de ĉiu etaĝo en kiu ni luos kunvenĉambrojn) por ke ni represu ĝin en la kongres-libreto.

- Vojklarigoj al la hotelo ŝofore kaj de la flughaveno, *Amtrak*- kaj *Greyhound*-stacidomoj.

- Mendo de larĝa ŝtuparo por grupa foto.

- Eventuale mendo de la hotela naĝejo por festeno.

- Kontakta telefonnumero por teĥnika helpo (kiu atingos veran homon, ne nur respondmaŝinon.).

- (baldaŭ antaŭ la kongreso) Ke la horloĝoj en ĉiu kunvenĉambro estu samtempigitaj.

- Ke la piano (se la kongreso uzos ĝin) estu agordita.

Hotelo ĝenerale pli bonas ol universitato en ĉio krom la kosto. La kunvenĉambroj

kaj dormĉambroj pli proksimas unu al la alia, kaj la hotelistoj faras por ni kelkajn servojn kiujn en la kazo de universitato ni devus mem fari. Ekzemple, kiam la kongreso okazas en universitato, la CO de ELNA devas kolekti monon por loĝado kaj pagi al la universitato, kaj ankaŭ doni al ili liston de homoj kiuj volas loĝi en la dormejo, kaj en kiuj noktoj. En la kazo de hotelo, la kongresanoj mendas siajn proprajn hotelĉambrojn. Hotelo ankaŭ proponas pli bonajn servojn al la loĝantoj: ekzemple, senpagan matenmanĝon, naĝejon, ekzercejon ktp. Multaj hoteloj proponas ankaŭ transporton de kaj al la flughaveno por siaj loĝantoj. Sed tamen ne ĉiuj hoteloj havas sufiĉe multajn kaj grandajn ĉambrojn por niaj bezonoj; aliaj havas sufiĉajn, sed tro grandajn aŭ tro multekostajn. En universitato somere ni ofte povas havi pli multajn kaj taŭgajn ĉambrojn kontraŭ malpli alta kosto. Ankaŭ la loĝado kaj manĝado kostas malpli por la kongresanoj, kaj tio allogas pli da homoj; la du plej ĉeestataj landaj kongresoj en la lastaj jaroj estis en universitatoj (MIT en 2003 kaj Concordia University en Aŭstino en 2005). Se pro la vetero en via regiono vi volas kongresi frue, en majo aŭ eĉ (se la Estraro aprobas) en aprilo, verŝajne universitato ne eblas pro ĉeesto de studentoj kaj okazo de klasoj.

(Estas aliaj ebloj por kongresejo. Parko ĝenerale pli taŭgos por regiona ol por landa kongreso, sed iuj parkoj ja havas kongrestaŭgajn kunvenĉambrojn kaj hotelecan loĝejon, krom kabanoj, lokoj por tendoj ktp. Ni iom diskutis la eblecon okazigi vojaĝan kongreson en kroŝŝipo, sed eble tio ne taŭgas pro altaj kostoj.)

(daŭrigota)

\* Ligiloj al ĉiuj paĝoj, ekzemplaj leteroj ktp. indikitaj per steleto (\*) troviĝas ĉe la originala paĝo <<http://www.pobox.com/~jimhenry/esp/esma/planoj.htm>>.

# Prof. Edwin Grobe Donacas Siajn Verkojn al la Mondo por Ĉiam per “Project Gutenberg”

Edwin Grobe, emerita profesoro de la franca lingvo kaj rimarkinda aŭtoro kaj tradukinto de klasikaj usonaj verkoj, konsentis donaci la permeson uzi sian tutan Esperantan verkaron al la mondo per la retpaĝaro Projekto Gutenberg <<http://www.gutenberg.org/>>. Projekto Gutenberg estas projekto por konservi la altnivelan literaturon de la mondo kaj fari ĝin senpage havebla kaj (plejparte) libere represebla.

## La Verkoj de Prof. Edwin GROBE

Tradukoj de klasikaj usonaj aŭtoroj, elangligitaj de Prof. Grobe:

1. Tri Noveloj, Mark Twain.
2. Tri Ceteraj Noveloj, Mark Twain.
3. Tri Noveloj, Sherwood Anderson.
4. Tri Noveloj, Washington Irving.
5. Tri Noveloj, Edgar Allen Poe.
6. Turno de la Ŝraŭbo, La (Vol. 1, 2 kaj 3), Henry James.
7. Falo de Uŝer-domo, La. Edgar Allen Poe.
8. Neĝoj de Kilamanĵaro, La. Ernest Hemingway.
9. Aliaj Tempoj, Edith Wharton.
10. Aventuroj de Toĉjo Saŭjero, La. (Vol. 1 kaj 2) Mark Twain.
11. Diamanto Tiel Granda Kiel Ric-Hotelo, La, F. Scott Fitzgerald.
12. La Longa Daŭro, Edith Wharton.
13. Mia Kontrabandulo, Louisa May Alcott.
14. Murdo de la Kadavrejo-Strato, La, Edgar Allen Poe.
15. La Meksikiano, Jack London.
16. Du Noveloj, William Faulkner.
17. Tri Noveloj, Brett Harte.
18. La Mistero de Marnjo Roĝeto, Edgar Allen Poe.

Ĉi tiuj verkoj estas trezoroj de la angla literaturo, kaj havi ilin bele elangligitajn estas duobla trezoro. Ĉi tiuj libroj estas haveblaj nun de ELNA, kaj, se oni pli preferas, kiel mi, legi de papero ol de komputilekrano aŭ preferas malaltkoston bone presitan libreton ol printaĵo de via propra printilo, oni devas aĉeti ilin de ELNA; la donaco de Prof. Grobe ne ĉesigos ilian haveblecon.

Prof. Grobe verkis ankaŭ 25 originalajn libretojn kiuj ankaŭ estas haveblaj nun-

tempe per ELNA, kaj ankaŭ por tiuj li fordonacis la permeson kopii ilin laŭ Projekto Gutenberg.

## La Valoro de Senpage kaj Libere Havebla Literaturo

Kiam mi eklernis Esperanton, la retpaĝaro de s-ro Don Harlow <<http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/literaturo.html>> estis la plej grava kialo kiu konvinkis min ke Esperanto estas grandega afero. La aro de literaturo tie estas serioza, diversa, kaj vasta. Tuj mi komprenis ke Esperanto malsimilas al aliaj planlingvoj, kiuj fiere montras nur unuopajn mallongajn rakontojn por tiel pruvis ke ili funkcias.

S-ro Harlow ankaŭ donis neformalan permeson al mi enmeti iom de liaj verkoj en PG, kiu inkluzivas sian longan tradukon “Tarzan de la Simioj.”

## Projekto Gutenberg – Kial ĝi Gravus

Projekto Gutenberg estas, kiel la retpaĝaro de s-ro Harlow, hejmo de senpage haveblaj, legeblaj, kaj ofte represeblaj verkoj, sed plejparte ili estas en la angla lingvo. Ili nuntempe havas 16,000 elektronikajn librojn (e-librojn). Proksimume 50,000 elŝutoj okazas ĉiutage. La ĉefpaĝo de la librokatalogo montras la lingvojn kiuj havas inter unu kaj 50 e-librojn kaj pli ol 50. Estas sep lingvoj kun pli ol 50. Estas nur kvin e-libroj tie en la Intenacia Lingvo nun.

Se ni enmetos la tradukojn de prof. Grobe, ni duone atingos la “pli ol 50 libroj”-liston, kiu, mi supozas, estas vidata de multaj homoj ĉiutage. Ĉi tiu mem gravas por la disvastigo de Esperanto. Sed eĉ pli bone, la verkoj en Projekto Gutenberg verŝajne restos eterne haveblaj tra la tuta mondo. Ni ne povas kalkuli kiom da legontoj ĝuos la E-ajn verkojn tie, aŭ kiom nur vidos ke ili ekzistas, sed mi kredas ke kvindek jaroj de nun multaj homoj estos spertintaj ilin.

Projekto Gutenberg diligente kontrolas la kopirajton de ĉiu verko kiun ĝi publikigas. Ĉi tio permesas ke oni sentime uzu la verkojn. Ĝi estas regata de usonaj leĝoj. Plejparte la tradukoj de prof. Grobe estas

tute en ordo, ĉar la klasikaj verkoj kiujn Grobe elektis estis tiel malnovaj ke la kopirajto jam finiĝis.

## Dividita Kontrolado

Kuniĝinta kun Projekto Gutenberg, estas subprojekto, angle “Distributed Proofreaders” aŭ “DP”: <<http://www.pgdp.net>>. Ĉi tiu estas bone organizita retpaĝaro kiu helpas multajn homojn kunlabori per kurtaj, kelkminutaj libertempoj pri la kontrolado kaj aranĝado de tekstoj por PG, precipe malnovaj, skanitaj kaj literlegitaj tekstoj. Estas Teamo de uloj tie kiu celas enmeti Esperantajn verkojn ĉe PG, nomita simple “Team Esperanto”. Ĉiu esperantisto estas tre bonvena retumi al “DP” kaj alliĝi al “Team Esperanto” por helpi. Ni jam havas projekton: kontroli la literlegajon de “La Falo de Uŝer-Domo”.

## La Kreema Komunumo kaj Esperanto

La fondinto de Projekto Gutenberg kaj Vikipedio, la verkistoj de Linukso, kaj s-ro Richard Stallman, kiu fondis la Liber-Softvaran Fondaĵon, ĉiuj estas parto de movado kiun ni povas nomi “Kreema Komunumo” (angle: *creative commons*). Ĉi tio estas komune havebla kaj uzebla aro de artoj kiuj riĉigas nin ĉiujn. Laŭ mi, Esperanto kaj la Kreema Komunumo estas naturaj fratoj, kune agorditaj al la sama espero por la homaro. Estas bona strategio uzi la ĉiesverkaron por disvastigi E-on; laŭ mi, ni esperantistoj devas esti la plej bonaj subtenantoj de la ideo de la Kreema Komunumo el ĉiuj grupoj en la mondo. Mi dankas al prof. Grobe kaj s-ro Harlow pro iliaj donacoj al la Kreema Komunumo de la mondo. Mi kuraĝigas ankaŭ aliajn kiuj posedas kopirajtojn, ĉu unuopaj homoj, ĉu organizoj, pripensi la eblon donaci gravajn verkojn al la Kreema Komunumo.

Mi pretas helpi esperantistojn rilate demandojn pri kopirajtaj aferoj kaj la Kreema Komunumo kaj Projekto Gutenberg.

Robert L. Read  
<[read@robertlread.net](mailto:read@robertlread.net)>

# Unua Originala Infanromano en Esperanto!

**La Kastelo de Vitro.** John Francis. UEA. Rotterdam. 2004. 197 paĝoj. \$28.70.

**Antaŭnelonge mi legis anonceton pri nova libro en Esperanto. Aparte la unua linio kaptis mian atenton: ROMANO DE JOHN FRANCIS POR INFANOJ. Miaj infanoj parolas Esperanton. Ili ankoraŭ ne legas romanojn, sed se temas pri io por infanoj, mi nepre volas legi ĝin. Laŭ la anonco, *La Kastelo de Vitro* estas unikaĵo ĉar ĝi estas la unua porinfana romano originale verkita en Esperanto.**

Ankaŭ la jena priskribo kaptis mian atenton:

*En La Kastelo de Vitro du geknaboj, Stela kaj Ernesto, dum somera vagado trairas misteran pordon malantaŭ kiu atendas ilin aventuro en magia mondo kun plej strangaj mirindaĵoj kaj grandaj danĝeroj. Kelkfoje la leganto eĉ povas senti en la verko trajtojn parencajn kun la famaj romanoj pri Harry Potter, kvankam pri influo ne temas, ĉar Francis finis sian romanon jam antaŭ dudeko da jaroj.*

Legante la libron, mi sentis pli grandan tenton kompari ĝin al la libroj pri Narnia de C.S. Lewis aŭ foje eĉ al *La Senĉesa Rakonto* de Michael Ende, en kiu la magia mondo konsistas el historioj kaj la fantazioj de infanoj. Ne temas pri malkovro, kiel en *Harry Potter*, ke oni jam loĝas en magia mondo, sed pri malkovro de pordo al alia mondo kiel en *The Lion, the Witch and the Wardrobe* de C.S. Lewis. La sola komparo kiun mi farus kun *Harry Potter* estas ke ankaŭ *Kastelo* havas propran “Whomping Willow”. La vorto *frakcio* en la unuaj priskriboj de tiu rompema planto sugestas la nomon “frakasa frakseno”, sed verŝajne ĝi estas speco de ulmo en tiu libro, do ni devas vivi sen tia aliteracio.

Sed ni ne restu ĉe tiuj komparoj, ĉar kun komparo al grandaj libroj estas granda danĝero ke la leganto havos tro grandajn atendojn. Sen kompari ĝin al la grandaj verkoj, *La Kastelo de Vitro* estas bona libro. Oni ja scivolas pri la venontaj okazaĵoj, kaj la rolantoj estas pli-malpli kredeblaj en tiu nekredebla mondo. Per belaj priskriboj la leganto facile povas imagi ke ankaŭ li estas en tiu mondo.


Originale verkite en Esperanto, la libro prezentas amuzetajn vortludojn, sed ne

troigas ilin. Troviĝas foje ankaŭ alineoj en kiuj oni sentas ke la aŭtoro vortumis tiel ne nur pro la signifo sed ankaŭ pro la belaj sonoj de la vortoj mem.

Tion dirinte, mi diras ankaŭ ke tre frue en la legado venis al mi demando: por kiu tiu libro efektive estis verkita? Ĉu fakte ekzistas en Esperantujo sufiĉe da infanoj en la ĝusta aĝo kun la necesa lingvonivelo por legi tiun libron? La legado mem ne estas malfacila. La literoj estas grandetaĵaj, kaj la vortumo bona, tamen troviĝas multegaj vortoj kiujn mi aŭ ne konas aŭ nur lastatempe lernis – kaj ne temas nur pri plantokaj besto-nomoj, kiel oni atendu en romano, sed pri multaj diversaj aferoj, foje kernaj por kompreno de la historio. Ĉu tio estos por vi (aŭ por viaj infanaj amikoj) ĝeno al la legado aŭ okazo por plibonigo de la vortprovizo, vi mem decidu.

Cetere, mi rimarkis malĝojigan kvanton da eraroj en la libro. Sur ĉiu tria paĝduo mi notis ion – tro ofte eraron; mankantajn citilojn, du finitivajn en unu frazo (“li volis estis certa”), adverbajn por adjektivo (“oni taksis ĝin krude”), mankantajn vortojn (“mi permesas” kiam de kunteksto ĝi devas teksti “mi ne permesas”), kaj diversajn aliajn tajperarojn (“baldekono” por “baldakono”, “oi” por “oni”, “helpi aliaj kavalirojn”, “reformos” por “refermos”, k.a.).

Ĉu mi fariĝas tro kritikema? Eble jes. (Kiom da tempo mi pasigis pensante ĉu eblas “renversi” akvofalon aŭ nur “inversigi” ĝin?) Estas sufiĉe facile preterrigardi tiajn dubojn, sed ĝi malfortigas la fidon. Kiam la aŭtoro nomas kroketan pilketon “ligna kuglo”, ĉu tio estas poezia pentrado aŭ eraro? Mi mem devis relegi la koncernan frazon multfoje antaŭ ol mi konstatis ke temas pri kroketo kaj ne kork-pafilo. Vidinte tiom da eraroj, mi komencis rimarki ilin ĉie, eĉ en frazeroj ne tute dubindaj (kiel “unu tagon” aŭ “unuĵ” aŭ la pravigebla frazo “kiel tio efikos nin?”) aŭ male, mi komencis pravigi tajperarojn se estus maniero por kompreni ilin (ĉu “turo de rado” aŭ “turno de rado”?)



En kelkaj partoj la aŭtoro tre bone sukcesas uzi “malfacilajn” aŭ maloftajn vortojn sen devigi kuradon al la vortaro. Se estas “pajaco”, poste sekvas priskribo de la pajaco. Alia bona solvo estas “urtikoj kaj aliaj verdaĵoj.” Oni ne devas scii la signifon de *pajaco* aŭ *urtiko* por kompreni la alineon. Mi ŝatus vidi pli de tiaj esprimoj en Esperantaj verkoj. Eĉ tiu aŭtoro povus fari tion pli sen troigi. Ekzemple, anstataŭ “virino kun blanka kufo” oni povus skribi “kun blanka ĉapeto” aŭ eble “kun blanka kufo sur la kapo”, ĉar mi dubas ĉu mezuma esperantisto scias la vorton. Mi certe ne.

Unu libro, al kiu mi ja ŝatus kompari ĉi tiun estas *Peter Jameson's Secret Language*. La temoj de la du libroj fakte estas tre malsamaj, ĉar Peter Jameson esploras la veran mondon, dum Stela kaj Ernesto esploras fantazian mondon, sed ambaŭ estas libroj porinfanaj.

La infanoj en ambaŭ libroj estas kredeblaj infanoj – foje ne perfektaj, sed plejparte bonaj modeloj por la leganto. Foje, okazas dialogoj kiuj verŝajne celas eduki la leganton. Tion Francis tre lerte faras en *Kastelo*, sen doni la impreson ke oni ĉeestas prelegon. Se unu infano parolas pri kronometro aŭ uzas vorton kiel

“parafhava”, la alia infano petas klarigon. Kiel mi menciis supre pri *pajaco* kaj *ur-tiko*, oni povus deziri ke la aŭtoro aŭ la rolantoj pli ofte klarigis vortojn kiel *trabo*, *humo*, *alo*, *ranfrajo*, *stativo*, kaj aliaj.

Stela, kutime tre bona modelo, verŝajne ankoraŭ ne lernis ke oni ne povas respondi “dankon” al ĉu-demando, ĉar en kelkaj landoj, tio signifas “jes” kaj en aliaj “ne.” Oni klare respondu per “jes, dankon” aŭ “ne, dankon.” La infanoj ja estas tre ĝentilaj, sed mankas al ili la scio pri tiu detalo

de la internacia kulturo.

Legante *La Kastelo de Vitro* mi nur malofte sukcesis legi tutan ĉapitron sen paŭzo, malgraŭ tio ke la historio ja estas interesa. La ĉapitroj ĉiam ŝajnis al mi tre longaj. Mi rimarkis ke aliaj porinfanaj romanoj havas multe pli da ĉapitroj. Ekzemple, *Peter Jameson's Secret Language* havas dudek ok ĉapitrojn. *Kastelo*, kelkajn paĝojn pli longa, havas nur kvin ĉapitrojn.

Parenteze, mi scivolas ĉu usonaj legantoj komprenus la simplan kaj logikan espri-

mon “murŝtuparo” se ili neniam efektive surgrimpis tion. Ĉu ni havas murŝtuparonj (angle: *stile*) en Usono?

Finfine oni devas rigardi la libron ne kiel aron de detaloj, sed kiel tuton. Pli bonan historion mi ne povus mem skribi. Mi tre ĝuis la legadon. Se vi ŝatas historiojn pri kavaliroj kaj gefeoj aŭ iam revis pri magiaj pordoj, mi supozas ke tiu libro plaĉos ankaŭ al vi.

Thomas Alexander

## Evangelio laŭ Marko

*En la Paŝoj de Jesuo: La Evangelio laŭ Marko en 30 Tagoj.* Jerald Veit (red.). 2004. 43 paĝoj. \$2.50.

Bazita sur la tradicia “Londona” Esperanta Biblio, ĉi tiu libro estas redaktita antaŭnelonge de Jerald Veit por la Kristana Inform-Centro. Li dividis ĝin en tridek partojn: unu parto por ĉiu tago de monato. Li uzis (apenaŭ) “grandan litertipon” por plifaciligi legadon. Eĉ la vortoj de Jesuo estas presitaj per grasaj kursivaj literoj, laŭ komuna gusto. Ankaŭ la versoj estas numeritaj. La eldono havas etan enkondukon fare de la redaktoro kaj listas la tagajn enhavojn laŭ temo (ekz. “Tago 7: La parabolo pri la semanto” kaj “Tago 9: Sanigo de la frenezulo”). Vi ĝuos eĉ la desegnaĵon sur la kovrilo de fiŝkaptistoj apud la maro. La papero estas nelaŭdinda sed sufiĉas. La kovrilo ne estas malmolega sed pezeta

papero. Ĝi havas eĉ verdajn krampojn!

Se mi ĝuste informiĝis, la unua eldono de la Nova Testamento en Esperanto aperis en 1912. Ĝi estis tradukita ĉefe de John Cyprian Rust kaj A.E. Wackrill de la Brita kaj Alilanda Biblia Societo. La teksto plejparte havas evidentajn sencojn kaj signifojn sed kelkaj frazoj ne facile kompreneblas por mi (ekz. “irejoj,” “Skriboj,” “buĉis la Paskon” anstataŭ “buĉis la paskan ŝafidon,” “al la viaj” por “al via familio,” “ofendiĝos” por “senfidiĝos,” kaj tre rimarkinde la minuskla “li” anstataŭ “Li” por “Jesuo”). Tamen, la tradukistoj laŭdindas pro sia malfacila tasko. Tamen, mi konsilas ke vi komparu ĝin kun via nacilingva Biblio por plu trovi kaj kompreni la faktojn, religiajn kaj historiajn.

Malgraŭ multe da fortoj, al ĉi tiu eldono mankas kelkaj helpoj de aliaj rimedoj. Ĝi enhavas nek klarigojn, nek

verskomparaĵojn, nek vortliston. Mi ofte serĉis mian vortaron (TYE de John Wells), sed pro la kleraj temoj tio estas kompreneble neevitebla. La Biblio ne estas romano, ĝi postulas oftan legadon. Vere, Jesuo ofte respondas temojn aŭskultindajn, do laboreto necesas.

Mi aprobas la eldonaĵon pro ĝia utileco kaj sufiĉa prezento. La redaktoro aranĝis ĉion laŭ bona gusto, kaj mi ne plendas. Iu ajn kiu deziras legi la Biblion ne eraras komencante per ĉi tiu libro. Danke al la redaktoro kaj la mallongeco de Marko (verdire la plej mallonga el la kvar Evangelioj, inkluzive de la Pli Longa Tekstfino, kiu estis uzata ĉi tie), vi povas rapide finlegi ĝin (eĉ se vi ne antaŭe finis ion ajn!). Ĝuu!

Anthony Williams

### Semajno de Homaj Rajtoj kaj Esperanto

Ĉiutage mi legas antaŭanoncojn rilate al eventoj okazontaj kunlige kun la 15-a de la venonta decembro, la tradicia Zamenhof-Tago kaj Tago de la Esperanto-Libro.

Vi aŭdis ke dum la pasintaj jaroj pluraj esperantistoj havis la ideon vastigi la signifon de la tago al “Tago de Esperanto” kaj doni al ĝi ankaŭ informan elementon per aranĝado de even-

toj kune kun aŭ por neesperantistoj.

Surbaze de ĉiuj ricevitaj ideoj, la Estraro de UEA, eksperimente ĉijare, deklaras ke la semajno de la 10-a ĝis la 18-a de decembro estu “Semajno de Homaj Rajtoj kaj Esperanto”. Tiu semajno inkluzivas la 10-an de decembro kaj la 15-an. Artikolo pri tio aperos en la venonta numero de la revuo Esperanto.

Nun la festo ebligas kaj agadon al la ekstero (pri Esperanto kaj lingvaj homaj rajtoj, pri la idealaj valoroj de nia lingvo) kaj la tradician pli internan agadon (festo de la libro en Esperanto, klubaj

kunveno memore al Zamenhof). Cetere, la ekzisto de alekstera elemento (homaj rajtoj) faras ebla kaj dezirinda la kunorganizado de eventoj kun neesperantistaj asocioj. Do, la limo je tio, kion oni povas fari, kuŝas nur en via fantazio kaj en la lokaj ebloj.

Mi deziras al ĉiu klubo tra la mondo sukcesan planadon kaj realigadon de la Semajno de Homaj Rajtoj kaj Esperanto!

Renato Corsetti, Prezidanto de UEA



# New from the Book Service

To order books from ELNA: (1) Send order by regular mail, with check or credit-card number and expiration date, to: ELNA Book Service, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530; (2) Order on-line with credit card at <<http://www.esperanto-usa.org/retbutiko.html>>.

Note: if you order with payment by credit card and the book you want is not in stock, we will back-order it for you and charge your card only when and if it comes back into stock. This service is not available for payments made by check. Prices given are basic, before discounts for ELNA members.

**Arne, la ĉefido.** *Leif Nordenstorm.* A short novel about a village in Scandinavia in the year 829, where Vikings and Christian missionaries collide. Illustrated by Pavel Rak. 2005. 112 p. 160x115. Paper. Czech Republic. ISBN 80-85853-77-9. NEW.  
**ARN001 \$8.90**

**Bildstria gvido al genetiko, La.** *Larry Gonick & Mark Wheelis.* Translated by Sung Ho Cho. An excellent, heavily illustrated introduction for the layperson and the beginning student of biology to the basics of a science which will – for better or for worse – shape the 21<sup>st</sup> century. 1996. 216 p. 220x155. Paper. Korea. ISBN 89-7616-155-6. NEW TO ELNA.  
**BIL002 \$15.00**

**Diaj revelacioj.** *Deĝuĉi Nao.* Translated by Maeda Ŝigeki. A selection of the divine revelations revealed to the founder of Oomoto by the god Uŝitora. These revelations, which constitute “a book of foretelling and warning”, form the basis of this variant of Shinto (which has made heavy use of Esperanto throughout its history). Includes a 28-page afterword which describes the history and doctrines of the religion. 1999. 247 p. 215x155. Bound. Japan. ISBN 4-88756-030-3. NEW TO ELNA.  
**DIA004 \$20.00**

**Diaj vojsignoj.** *Deĝuĉi Onisaburo.* Translated by Maeda Ŝigeki. Written by a co-founder of Oomoto, under the influence of the divine spirit Mizu. A special section describes the author’s life, the Oomoto concept of deity and spirits, and the phenome-

non of *kamigakari* (spirit-possession). 1997. 174 p. 215x155. Bound. Japan. ISBN 4-924501-01-8 C. NEW TO ELNA.  
**DIA003 \$20.00**

**Esplorado de vivĝojo.** *Hidemaru Deĝuĉi.* Translated by Eizo Ito. Thoughts about life and religion, written in 1923-1924 by a third-generation leader of Oomoto. 1986. 203 p. 210x150. Paper. Japan. NEW TO ELNA.  
**ESP029 \$16.00**

**Esplorado en Japanio: Religio Oomoto.** *Tadao Umesao.* Translated by Eizo Ito. Compilation of a series of articles about Oomoto by a world-famous ethnologist. Discusses the history and beliefs of the religion, its attitude towards and use of Esperanto, and several other religions related to or impacting on it (Baha’i, Spiritism, Die Blanke Fahne, the White Brotherhood, Cao Dai). Many photos. n.d. 38 p. 255x180. Paper. Japan. NEW TO ELNA.  
**ESP041 \$4.00**

**Fake pri Esperanto kaj Esperanto pri sciencoj.** *Zdenek Pluhar (red.).* Contributions presented at the 2004 Conference on Application of Esperanto in Science and Technology. Includes papers on (i.a.) electronic dictionaries, the Wikipedia, XML and the E@I organization. Contains some tables and diagrams. Papers are in Esperanto, abstracts in Czech, English and German. 2005. 84 p. 200x140. Paper. Czech Republic. ISBN 80-85853-78-7. NEW.  
**FAK004 \$15.80**

**Graveco de la fideleĝo, La.** *Oscar Wilde.* Translated from English by William Auld. Famous comic play about the hard-working Johano Worthing and his ne’er-do-well brother Fidel – both of them, the same person. *Esperantaj Kajeroj* #9. 1987. 79 p. 210x150. Paper. Great Britain. ISBN 0-9505323-7-1. NEW AT ELNA.  
**GRA008 \$4.80**

**Hidden perverse effects of the current system of international communication, The.** *Claude Piron.* Discussion of the several systems of organization-level international communication that function (to a greater or lesser degree) throughout the world, comparing their effectiveness and

cost-efficiency. From a speech given at an international youth forum in Novosibirsk in 1994. *Esperanto Documents* 48A. n.d. 15 p. 210x145. Paper. The Netherlands. ISSN 0165-2575. NEW.  
**EDA048 \$4.30**

**Interlinguistics and Esperanto studies: Paths to the scholarly literature.** *Detlev Blanke.* Translated from Esperanto by Humphrey Tonkin. Overview and guidebook to the technical literature, in both book and serial form, about interlinguistics in general and Esperantology in particular. Includes a comprehensive 21-page bibliography. *Esperanto Documents* 47A. n.d. 40 p. 210x145. Paper. The Netherlands. ISSN 0165-2575. NEW.  
**EDA047 \$4.30**

**Intimaj temoj en la Esperanto-beletro.** *Petr Chrdle (red.).* Contributions presented at the 2003 International Esperanto Conference held by OSIEK in Prague. Includes lectures by Christian Declerck, Gerrit Berveling, Vlastimil Kočvara, Miroslav Malovec, Eli Urbanová, Maria Butan, Jean-Luc Tortel and Eugene de Zilah. Illustrated by Pavel Rak. 2005. 103 p. 160x115. Paper. Czech Republic. ISBN 80-85853-74-4. NEW.  
**INT009 \$14.80**

**Kantoj kaj romancoj.** *Heinrich Heine.* Translated from German by Kalman Kalocsay and Gaston Waringhien. 260 poems selected from the works of one of the greatest German romantic poets of the early 19<sup>th</sup> century. Includes a short biography of Heine. *Stafeto: Bel-Literatura Eldon-Serio* #27-28. 1969. 381 p. 215x155. Paper. Spain. NEW TO ELNA.  
**KAN012 \$11.90**

**Liberpoeto, La.** *Dan Tirinaro.* Illustrated by Solemio Palermo. Long-lost poetry collection by an early Korean Esperanto speaker, originally published by the author in Paris in 1938. The author, in an era of rampant ultranationalism, considered himself a free citizen of the world. Includes photo section. 1999 (2<sup>nd</sup> ed.). 203 p. 220x145. Paper. Korea. ISBN 89-87281-01-9. NEW TO ELNA.  
**LIB002 \$10.00**

**Litova lingvo per Esperanto-okuloj.** *Marc*

*Vanden Bempt.* Good grammatical overview and introduction to the Lithuanian language, from the point of view of a speaker of Esperanto. Includes alphabet and sound-system, grammar, syntax, 47 pages of vocabulary organized by subject, some practice texts, and an alphabetical Lithuanian-Esperanto vocabulary. 2005. 184 p. 290x205. Paper. Belgium. ISBN 90 77066 15 2. NEW.

**LIT004** \$33.50

**Nanatasis.** *Robert Dutil.* Translated by Zdravka Metz *et al.* A solitary traveler in a canoe, wounded in an accident, discovers an unknown world, forgotten values, a different life. And Nanatasis, an Abenaki woman living in the wilderness, learns to her surprise how her human brothers and sisters live. 20 full-page color illustrations. Includes short Abenaki-Esperanto vocabulary. 2005. 114 p. 175x115. Paper. Canada. ISBN 2-9806246-1-6. NEW.

**NAN001** \$15.90

**Pekina Turisma Mapo.** Attractive bilingual (Chinese-Esperanto) fold-out tourist map of Beijing. Reverse contains information about hotels, telephone numbers of embassies (including U.S.), maps of Beijing's suburbs and administrative districts, and insert blowup maps of sights of interest. 2004. 750x520. Paper. China. NEW.

**PEK002** \$5.80

**Plena ilustrita vortaro 2005.** *Michel Duc Goninaz (ed.)*. Updated version (with errors corrected) of what is currently the most authoritative Esperanto dictionary. Contains 16,780 primary words and 46,890 lexical units, with definitions in Esperanto. Many illustrations and tables. 2005. 1265 p. 245x155. Bound. France. ISBN 2-9502432-8-2. NEW.

**PIV003** \$148.20

**Reĝo Edipo kaj Antigona.** *Sofoklo.* Translated from Greek by D. B. Gregor. The first and third plays in the cycle about Oedipus, King of Thebes, who discovers the hard way that if you don't want an answer, don't ask the question. Stafeto: Bel-Literatura Eldon-Serio #16. 1960. 215 p. 220x160. Paper. Spain. NEW TO ELNA.

**REG005** \$11.40

**Rigardante malantaŭen (en la jaro 2000).** *Edward Bellamy.* Translated by C. M. Hamaker. He fell asleep in May, 1887, and awoke to witness the American utopia at the

end of the 20<sup>th</sup> century. Considered one of the most influential American works of the end of the 19<sup>th</sup> century. Serio Utopia #1. 2005 (2<sup>nd</sup> ed.). 204 p. 210x145. Paper. The Netherlands. NEW.

**RIG001** \$19.90

**Romeo, Julieta kaj la tenebro.** *Jan Otčenašek.* Translated from Czech by Vladimír Vana. A novel of young lovers in Prague shortly after the assassination of Reinhard Heydrich, the Nazi *gauleiter* of Prague. Stafeto: Beletraj Kajeroj #26. 1967. 175 p. 185x120. Paper. Spain. NEW TO ELNA.

**ROM002** \$3.80

**Sed homoj kun homoj.** *Ziko Marcus Sikosek.* The author of *Esperanto sen mitoj* gives us an overview of each and every one of the first 90 World Esperanto Congresses, including three pages dedicated to Vilnius, 2005. Many photos. 2005. 197 p. 235x160. Paper. The Netherlands. ISBN 929017086-7. NEW.

**SED003** \$33.30

**Traduku!** *William Auld.* A collection of 56 difficult, because colloquial, paragraphs in English, followed by their translations into Esperanto and discussions of difficult points. Includes an index of English terms discussed and of Esperanto words used to resolve these points. These exercises originally appeared in *La Brita Esperantisto* 1991-1999. A must-have for the individual who wants to get a full command of colloquial Esperanto. Note: since this is British in origin, not all solutions may be applicable to American text. 2004 (2<sup>nd</sup> ed.). 116 p. 210x145. Paper. Great Britain. ISBN 0-902756-23-0. NEW.

**TRA012** \$17.00

**Murkalendaro + skribilo.** Large-format plastic-covered one-month wall planner, valid for all months, on which you can define your daily agenda for every day of the month with a grease pencil that comes with the planner and which is easily erasable at the end of the month.

**MUR005** \$6.50

**nenio dependas de ni.** *Pavel Korotenko & Grigorij Arosev.* 24 songs played (on guitar) and sung by Korotenko and Arosev; recorded during Russian Esperanto Days, 2002, Kovrov, Russia. 2004. CD. 70'20". Russia. NEW.

**NEN003** \$6.50

**Kaptita universo.** *Harry Harrison.* The complete science-fiction novel, translated by Andrej Grigorjevskij, read by the translator and recorded in MP3 format. Can also be transferred to an iPod or similar portable listening device. Includes various dictionaries and Winamp listening program for Windows machines. 2004. CD-ROM. 7hr41'. Russia. NEW.

**KAP005** \$7.80

**Vivaj koncertoj.** More than nine hours of music, recorded in 1997-2002 at various Russian Esperanto conferences. Includes Sergei Bozin, Mikaelo Bronštejn, Ĵomart kaj Nataša, Maša Kočetkova, Paša Korotenko kaj Griša Arosev, Vladimir Soroka kaj kompanio, Ekvinkso, Slavjanskaj Stomakoj, JoMo, Vladimir Ŝiškin, Ivan Naumov kaj kompanio, Andrej Obrezkov, Evelina Sokalova, Aleksandr Koval kaj Oĉjo, Anatolij Radaev, Slava Bondarjov and Miĥail Povorin. Can also be transferred to an iPod or similar portable listening device. Includes Winamp listening program for Windows machines. 2004. CD-ROM. 9hr30'. Russia. NEW.

**VIV019** \$6.50

**IJK-Televido.** More than two and a half hours of television film from the 2004 International Youth Congress (IJK) in Kovrov, Russia, on a two-disk set. First disk contains fairly low-quality IJK-TV film taken by Konstantin Viĥrov; second disk contains higher quality film by Thomas Cordonnier. Films are in format XviD (MPEG4). 2004. CD-ROM. 2hr39'. Russia. NEW.

**IJK001** \$6.50

**Adoru Mini-CD.** Intended to accompany the Esperanto hymnal *Adoru*, this mini-CD contains the complete Bible (in Esperanto and German), the Book of the Mass in Esperanto, and texts and melodies for many of the songs in *Adoru* in MIDI format. Also includes players for MIDI-format music for the Macintosh and Windows and Linü machines. N.d. CD-ROM. Germany. NEW.

**MIN002** \$4.30

**Al la ĝojo.** *Ludwig von Beethoven/Friedrich von Schiller.* Lyrics translated from German by Kalman Kalocsay and adapted by Konisi Gaku. Partitura of the finale of Beethoven's 9<sup>th</sup> Symphony, for multiple voices and accom-

panying instruments, with accompanying lyrics in Esperanto. 2004. 65 p. 250x180. Paper. Japan. NEW.

**ALL003** **\$9.40**

**Verkjo de Miyamoto Masao: 3.** *Miyamoto Masao*. Works (short stories, articles, poems, both original and translated), not otherwise collected or published in book form, by the well-known author and translator from the Japanese. Includes section of plates containing photos from the life of the author. 1993. 299 p. 210x145. Paper. Japan. NEW TO ELNA.

**VER012** **\$23.60**

**Decido pro amo.** *Okamoto Bunryō*. Translated by Ikai Yosikazu. Overview of the life and works of Sugihara Tiune who, as Japanese consul in Kaunas, Lithuania, early in World War II, in direct contravention of his orders from home provided transit visas to 2000 Jewish families, helping them to escape from the Third Reich. Illustrated. 2004. 23 p. 250x180. Paper. Japan. NEW.

**DEC001** **\$4.50**

**Amiko el la junaĝo de Maigret.** *Georges Simenon*. After *Maigret hezitas* and *Maigret kaj la maljuna damo*, the third Esperanto version of a novel about the world-famous French inspector-detective. Worth reading from a learning viewpoint as well, because it is very heavy on dialogue. Series Mondliteraturo #13. 2005. 124 p. 200x145. Paper. Russia. NEW.

**AMI001** **\$17.00**

**Bona rido.** *Axel A. Helm*. An old Swedish proverb says: "A good laugh will increase your life span." If so, this joke collection should keep you going to well beyond 100. 1965. 85 p. 185x120. Paper. Sweden. NEW TO ELNA.

**BON012** **\$5.40**

**Diccionario 2002 Español-Esperanto Esperanto-Español.** *Miguel Gutierrez Adúriz*. A recent comprehensive two-way dictionary for Spanish speakers. More than 12,000 Spanish words, 10,000 Esperanto roots. Includes tables of numerals, affixes, abbreviations at end of Esperanto section. 2002. 474 p. 170x110. Paper. Spain. ISBN 84-920931-2-9. NEW.

**DIC003** **\$22.40**

**Jaroj sur tero.** *Lakshmiswar Sinha*.

Autobiographical notes by one of the best-known pioneer Bengali Esperanto speakers, perhaps best known for his translations from the works of his mentor, the Nobel laureate Rabindranath Tagore. 1966. 126 p. 195x125. Bound. Sweden. NEW TO ELNA.

**JAR001** **\$10.70**

**Kelkaj faktoj pri la budhismo.** *Gunnar Gällmo*. An overview of the Buddha, his teachings, and the development of the community of this great world religion over the past two and a half millenia. 2002. 77 p. 210x145. Paper. Sweden. ISBN 91-85288-27-6. NEW.

**KEL002** **\$17.90**

**Kredo floroj kaj dinamito.** *Ernst Olsson*. Short biographies of three eminent Swedish subjects: Saint Birgitta, the biologist Linnaeus, and Alfred Nobel, inventor of dynamite and creator of the Nobel Prize. 1961. 79 p. 195x125. Bound. Sweden. NEW TO ELNA.

**KRE003** **\$8.00**

**Printempo de morto.** *Lajos Zilahy*. Translated by Ladislao Somlai. A passionate love story set against the background of the decadent middle class in early 20<sup>th</sup> century Hungary. 1947. 119 p. 190x125. Bound. Sweden. NEW TO ELNA.

**PRI003** **\$10.70**

**Ŝipestro rakontas.** *F. T. Lundquist*. Adventures of a Swedish sailor, as seaman and as captain, aboard sailing ships and steamships in the first half of the twentieth century. 1962. 72 p. 195x130. Bound. Sweden. NEW TO ELNA.

**SIP001** **\$8.00**

**Tra lando de Indianoj.** *Tibor Sekelj*. Translated by Ernesto Sonnenfeld, translation checked by Tibor Sekelj. Adventures of the well-known Esperanto-speaking globe-trotter in the back country of South America. 1970. 186 p. 195x125. Bound. Sweden. NEW TO ELNA.

**TRA013** **\$10.70**

**Insulanoj de Hemsö.** *August Strindberg*. Translated by Sten Johansson. A novel about amorous and marital relationships between people belonging to different classes, in which Strindberg "succeeds in combining the popular suspicion of those who wish

to climb out of their class with the contempt of those social superiors towards the person who is not content to remain a tailor at his work." 2005. 177 p. 210x140. Paper. United States. ISBN 1-59569-015-8. NEW.

**INS005** **\$12.00**

**Interna milito en Francio, La (1871).** *Karl Marx*. Translated by Vilhelmo Lutermano. One of Marx's more important and better known texts, with an introduction by Engels – a book about the historic events in France in 1871: documents and story from the siege of the Paris Commune. 2005. 1373 p. 210x140. Paper. United States. ISBN 1-59569-025-5. NEW.

**INT010** **\$12.00**

**Let's learn Esperanto.** *P. V. Ranganayakulu*. Written for the English-speaking market in India (includes comparisons to Sanskrit in the introduction), this is a compact and well-written textbook of Esperanto. Contains keys to exercises, grammatical tables, and an Esperanto-English vocabulary. 2004 (2<sup>nd</sup> ed.). 113 p. 215x140. Paper. India. NEW.

**LET004** **\$6.70**

**Lotte en Weimar.** *Thomas Mann*. Translated by Karl Schulze. The Nobel Laureate's very personal novel about court adviser Charlotte Kestner's 1816 visit to Weimar to "secretly" encounter, after forty-four years, the love of her youth – the author Goethe, who made her (and himself) famous in the romantic tragedy *The Sorrows of the Young Werther*. 2005. 445 p. 215x140. Paper. United States. ISBN 1-59569-021-2. NEW.

**LOT002** **\$27.00**

**...dum kristnaska tempo.** *Ralph Glomp*. 12 traditional Christmas carols, including several well-known to Americans ("Jingle Bells", "Oh Christmas Tree", "Silent Night"). Includes booklet with lyrics and seasonal photos. 2003. CD: 37'37". Germany. NEW.

**...jus per kares'.** *Ralph Glomp*. 11 popular-style pieces, including two versions of "La Esperanto" in modern and traditional styles. Includes booklet with lyrics. 2003. CD: 40'20". Germany. NEW.

# La Familio Bonvolo Vojaĝis Multe en 2005



## 4-a Azia Kongreso de Esperanto Katmandu, Nepalo 3-8 marto (2005) plus postkongreso

ELNA donacis ekzempleron de la DVD-versio de *Pasporto* al la Nepala grupo. Ĝi estis ĝoje akceptita de la entuziasmaj komencantoj. Natalie Sera instruis uzante ĝin, kaj la grupo multe uzis ĝin por prepari por la pli granda prokrastita kongreso kiu okazis en aŭgusto.

## Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK) 4-22 julio, Brattleboro, Vermont

kie *Pasporto* estis refoje la ĉefa studmateriale por la komencantoj.

## Oficiala Inaŭguro de la DVD-Versio de *Pasporto* dum la 90-a Universala Kongreso de Esperanto

Prezentita la 28-an de julio en Vilno, Litovio. Prezentis ĝin la direktoro, Lusi

Harmon, kun la helpo de du el la ĉefaj aktoroj: Miko Sloper (la patro) kaj Steve Wagenseller (la detektivo).

## Nord-Okcidenta Regiona Esperanto-Kongreso (NOREK) 19 – 22 aŭgusto, Calgary, Kanado

Refoje *Pasporto* estis prezentita kaj uzita por instrui komencantojn. Tiu ĉi NOREK estis prov-arango por la venonta TAKE (Tut-Amerika Kongreso de Esperanto) okazonta en majo 2007.

Ekskursante en la centro de la urbo, ni trovis skulptaĵon kiu montras kion la virinoj devis fari por gajni la rajton voĉdoni. En la konstitucio de Kanado, virinoj ne estis konsiderataj kiel "personoj".

Nur post kiam ili fariĝis "personoj" en 1929, ili rajtis voĉdoni.

## 12-a Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto (ARE) Sylver Bay, Lake George, Novjorkio, 8-10 oktobro

(Ankoraŭ okazos ĉi-jare)  
**8-a Nacia Kongreso en Meksiko**  
Acapulco – 4-8 decembro  
Respondeculo: Luis Raudon –  
lraudon@yoli.com.mx

## PLANU PAROPRENI KONGRESOJN, KLASON, EKSKURSOJN EN 2006!

## Tut-Kalifornia Esperanto-Konferenco (TKEK) 24-26 marto, Davis, Kalifornio

## Sudorienta Regiona Kongreseto Ŝtata Parko Unicoi Helen, Georgio 31-a de marto – 2-a de aprilo, 2006

## 54-a ELNA kongreso – Novjorko, Novjorkio (dato ankoraŭ ne fiksita).

## 37-a Nord-Amerika Somera Kursaro 3-21 julio, School for International Training, Brattleboro, Vermont

## 91-a Universala Kongreso de Esperanto Florenco, Italio – 29 julio – 5 aŭgusto

Sekvos speciala post-kongresa ekskurso al Malto. Lusi Harmon jam survojas al Florenco kaj Malto por konfirmi detalojn. Se vi deziras scii pri specialaj prezoj kaj aranĝoj, nepre estu certa ke Esperanto Vojaĝ-Servo havas vian nomon kaj adreson. Informo estos sendita fine de la jaro.

**ESPERANTO VOJAĜ-SERVO**  
1824 EUCLID AVE. BERKELEY,  
CA 94709  
(510) 531-3893  
<lusiharmon@aol.com>



Ellen Eddy kaj Lusi Harmon  
ĝuas la ekskurson en Kalgario

Esperanto League for North America  
PO Box 1129  
El Cerrito CA 94530

Non-Profit Org  
US POSTAGE  
**PAID**  
4345 Oakland, CA  
Permit #